

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscriptions to A.E.A. \$16
(Individual, Club & Federation)
Additional Family Member \$4
Pensioners & Full-time Students
pay a minimum of \$8.



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.

Prezidanto: R. L. HARRY, AC, CBE, 8 Tennyson Crescent, Forrest, A.C.T., 2603

Sekretario: S-ro F. J. FALLU, 10 Sumersett Avenue, Oakleigh South, Vic., 3167

A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. ELLIOTT, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036.

Kasisto: S-ino I. FALLU, 10 Sumersett Avenue, Oakleigh South, Vic., 3167

Korespondaj Kursoj: S-ro J. Moore 7 Pelican Street, Emu Park, Queensland, 4702

N-ro 185 (265)

MELBOURNE

Jan.-Feb., 1981

NI GAJNIS NOVAN MEMBRON POR LA EKZAMENA KOMISIONO



Kun granda plezuro kaj ĝojo mi anoncas, ke **William Trevor Steele**, kiu komencis la studon de Esperanto antaŭ nur dek jaroj, kaj ne nur raketis en n'ian Esperantan ĉielon, sed ankaŭ en niajn Esperantajn korojn, ĵus fariĝis kun honoro la sesa gajninto de nia Aŭstralia Norma Klereca Diplomo, kiun fondis D-ro Cyrus John Caldera en la jaro 1952 post longa strebado por starigi en n'ia lando tiun plej altan ekzamenon laŭ la modelo aprobita de la Akademio de Esperanto.

Por starigi la unuan provizoran komisionon la tiama prezidanto de la Akademio de Esperanto, J. R. G. Isbrucker, provis kaj fine akceptis la jenajn sep personojn, kiujn li permesis

funkcii, ĝis la tempo, kiam ni jam havos tri gajnintojn niajn proprajn. Tiuj estis laŭ alfabeto ordo: F. R. Banham, C. J. Caldera, C. C. Cowling, A. Fridenbergs, I. P. Hanks, K. G. Linton, kaj P. E. Schwerin, el kiuj Pearl Hanks estis la sola virino. D-ro Caldera fariĝis la unua komisionestro kaj Pastro Cowling la unua sekretario.

Kiel ni jam atendis D-ro Caldera la unua gajnis la diplomon en la jaro 1955, kaj tuj instigis min sekvi lian ekzemplon, sed mi avertis lin, ke forpasos iom da tempo, antaŭ ol tion fari, ĉar mi ĵus fariĝis Ĉefdelegito por U.E.A. kaj kasisto de A.E.A. kaj bezonis iom da tempo por efike organizi tiujn du oficojn. Tamen mi trovis la necesan tempon por verki mian romanon, "Kanakano el Kananam", por prezenti al la komisiono kiel tezon. La verko estis akceptita, kaj eldonita en 1960, kaj mi fariĝis la dua gajninto en 1961.

D-ro Caldera tuj petis min instigi Reg Banham provi la ekzamenon, sed antaŭ ol li konsentis, mi tre facile sukcesis persvadi Len Newell, kiu antaŭ nelonge alvenis en Aŭstralio kun jama internacia famo. Li sukcesis kun honoro kaj fariĝis la tria gajninto en la jaro 1962, kun la rezulto, ke la provizora komisiono ĉesis funkcii. D-ro Caldera tiam petis Len fariĝi komisionestro pro tio, ke li estas profesia instruisto. Li akceptis kaj mi fariĝis sekretario. La saman

jaron Reg Banham prezentis sin, kaj fariĝis kun honoro la kvara gajninto.

Forjasis pluaj ses jaroj, antaŭ ol ni sukcesis venki la modestecon de Fay Koppel, kaj persvadi ŝin provi la ekzamenon, kiun ŝi gajnis kun honoro same kiel ĉiuj aliaj. Ŝi do fariĝis la kvina komisionano en la jaro 1968.

Bedaŭrinde, en tiu sama jaro, en kiu Fay fariĝis komisionano, Len Newell vojaĝis eksterlanden kun sia edzino, kaj Reg Banham konsentis agi kiel komisionestro dum lia foresto. Tamen, Len neniam revenis, sed mortis pro koratako apud Parizo, do necesis, ke Reg Banham daŭrigu en tiu ofico. Ses jarojn poste, kiam Reg Banham mortis en aŭgusto 1974, mi devis kombini la oficojn de komisionestro kaj sekretario.

Nia nombro do reduktiĝis al la necesaj tri, kaj pro granda aĝo D-ro Caldera jam ne deĵoris, kaj nur mi kaj Fay daŭre funkciis.

Tamen, la sesa gajninto, Trevor Steele, kiu brile sukcesis, ne nur konservis la tradicion de sukceso kun honoro, sed estas la plej juna ĝis nun, kaj li faris tion en la sama jaro, en kiu li sukcesis fariĝi Magistro de Artoj ĉe la Universitato de Kvinzlando. Ni ankoraŭ deziras pli da kandidatoj por la Klereca, sed mia longa maltrankvilo rimarkinde malkreskis pro tio, ke Trevor Steele aliĝis al la komisiono.

Ĉiu esperantist(in)o en Aŭstralio gratulas lin.

Ken G. Linton, Komisionestro.

A. Einihovici (Perth)

MODERNA MEDICINO

En plenega atendejo de multokupata kuracisto, malforta maljuna virino aspektis tre nervema, atendante sian vicon. Kiam oni vokis ŝian nomon, ŝi rapidis en la kuracĉambron, kaj voĉtremante, preskaŭ senpripe, diris al la kuracisto: "Bonvolu, S-ro doktoro, aŭskulti mian koron".

La kuracisto kompreneble ekprenis la stetoskopon, kaj petis ŝin senvestiĝi. Sed la virino haltigis lin kaj diris: "Formetu tiun ilon, mi deziras, ke vi aŭskultu mian koron, mian animon, pri miaj ĝenoj, kiuj ne permesis al mi dormi, pri miaj turmentoj, pri miaj ĉagrenoj, pri la drogdependo de mia filo, kio kaŭzas al mi stomakdoloron, pri mia suferado pro la gravediĝo de mia deksesjara, needziniginta filino, kiu kunvivis kun sia amorulo. Kaj tiele en la sama monotona voĉmaniero, la virino senĉese daŭrigas siajn plendojn.

La kuracisto preskaŭ tute ne aŭdis ŝin, preskribis medikamenton, kelkajn flavajn tablojdojn kaj diris al ŝi: "Nu, prenu tiujn tablojdojn trifoje tage dum du semajnoj, kaj poste revenu, sendube vi pliboniĝos." La virino, pli trista ol antaŭe, kapturte malsupren, senespera forlasis la kuracĉambron sen saluti la kuraciston.

Tiu kadro spegulas kaj montras la tragikan aspekton de nia nuntempa medicina kuracado. Tiu epizodo montras la mankon de persona, intima kaj konscienca kunlaboro de kuracisto kaj paciento. Ĝi atestas la mankon de homa psikologia traktado, la mankon de atento al psika streso de la paciento, kio estas tre grava, ĉar la psika streso nuntempe afliktas pacientojn pli ol toksa, organa malsano.

Ni kuracas malsanulojn kaj ne malsanojn. Eble la malnova diraĵo "menso sana en korpo sana" estas aplikebla nun pli ol antaŭe. Tio estas la unua punkto de nia analizo de nuntempa medicino, kaj ni diskutos tri punktojn.

La dua punkto estas la misinterpretado, miskoncepto de la ĉefa origino de homa malsano kaj ĝi estas tre grava, ĉar, kiel en aliaj problemoj, oni devas scii kaj koni la originon, la kaŭzon, la devenon.

Estas bone konate, ke kiam ia malagrablaĵo okazas, oni kutime kulpigas iun ajn krom sin mem. En kazo de malsano oni kulpigas la ĝermojn, kaj oni sentas sin kontenta. Sed la kaŭzo estas NE en ĝermoj, sed en kondiĉoj, kiujn ni mem kreas, nome neglektante la sanigan nutradon.

Por komprenigi tion, por klarigi, mi donas al vi ekzemplon, personan sperton. Unu el la plej belaj dikaj arboj en mia ĝardeno estis mortonta. Oni suspektis blankajn formikojn, kiel la kaŭzon. Mi tiam invitis oficiston de la agrikultura societo, la plej kompetenta en tiu sfero. Li faris aperturon en la arbo, kaj trovis amason da insektoj. Post kiam li esploris detale, li diris al mi, ke tiuj insektoj invadis la arbon, ĉar la arbo estis jam malsana, kaj la malsano mem estis kaŭzita de nekorekta kaj difektita nutrado.

Same okazas je la homa malsano: la malsano estas kaŭzita NE de ĝermoj, sed de toksado, akuta aŭ kronika, de venenaj substancoj, kiuj produktas detruon de korpaj ĉeloj, kaj tio pretigas bonan terenon por la invado de ĝermoj. La toksado produktita de tiuj venenaj substancoj estas kaŭzita de malsaniga

kaj difektita nutrado, alivorte, de nia ĉiutaga nutrado.

La homa korpo posedas siajn proprajn defendajn rimedojn, kiuj konstante klopodas liberigi ĝin de tiuj venenaj substancoj, liberigi ĝin de siaj malpuraĵoj.

Tio estas farita per hepato, renoj kaj aliaj organoj. Se tiuj organoj de la paciento ne estas afekciitaj, se ili ne prezentas gravajn difektojn, ĉu hereditajn, ĉu akiritajn, la rezulto estas favora. Sed se la malsanulo jam de antaŭe suferas iun difekton en la hepato aŭ alian organdifekton, tiam la rezulto estas duba. La viviga energio devas ne esti elĉerpita; pro tio, higiena kaj saniga vivo, kiu konservas sendifekta la vivigan energion, ja estas la unika kaj vera defendo je kiu ni povas kalkuli okaze de malsano.

Tiun punkton la popola saĝeco sankciis per la esprimo "prevento estas pli utila ol kuracado." — Unu pomo tage.

Estas vere, ke ne ĉiuj malsanoj estas kontroleblaj, kiel ekzemple tiuj de genetica origino — hereditaj. Gravan rolon ludas la hereda faktoro, ĉar malsanaj gepatroj ne povas naski sanan infanon. Kompreneble la sola rimedo estas la eblo elekti la gepatrojn, sed

Tamen 80-85 procentoj el ĉiuj tipoj de homaj malsanoj evoluas nature kaj resanigo estas spontana, meminicita, sen ekstera instigo.

Prof. Alberto Gyorgye, fama hungara biokemiisto, kiu gajnis "Nobelan Premion" en 1937, eltrovis post multaj jaroj de serĉado per biokemiaj eksperimentoj, ke la problemo de sano kaj malsano dependas de la nutrado kaj ekscesa uzado de drogoj. Fakte, nia fizika bonstato, kaj ne malpli la mensa bonstato, dependas de du faktoroj: de la manĝoj kiujn ni konsumas kaj de la organoj, kiuj digestas la manĝaĵon, ĉefe de la stomako kaj hepato. Kaj tiuj organoj estas la ĉefaj defendiloj kontraŭ la malsano.

Jen la kerno de la problemo. Nia nutro-konsumado, la manĝaĵo nuntempe estas tiel diferenca de tiu de la primitiva homo, same kiel la nuntempa homo estas diferenca de la primitiva homo. Krom tio okazis granda ŝanĝo en la homa nuntempa nutro-konsumado, kaj manĝomanieroj, nome: La manĝaĵo nun estas kuirata kaj tro kuirata; la manĝaĵo estas sala kaj tro abunde sala; la manĝaĵo estas maŝine kaj kemie traktata. Diete parolante, la nutro-konsumado estas tiel diferenca de tiu de primitiva homo.

Aliflanke la homaj digestaj organoj,

la stomako kaj hepato tute ne ŝanĝiĝis. La homo trairis la evoluon de miloj da jaroj kaj fakte restis kun la sama hepato de la primitiva homo. Ĉi tie do estas la bazo de la problemo. La hepato kaj la stomako, kiuj estas samaj kiel de la primitiva homo, NE povas digesti la fuŝitan, ŝanĝitan nutraĵon de la moderna homo. Kaj ĉar la stomako kaj hepato estas du ĉefaj defendiloj kontraŭ malsano, estas evidente, ke ni devas nepre fari radikalajn ŝanĝojn en elekto de nutraĵo, kvalite kaj kvante, ŝanĝon en niaj manĝokutimoj, en niaj kuirmetodoj kaj en nutraĵfabrikaj industrioj. Ni ne povas ŝanĝi hepaton, do ni devas ŝanĝi la nutrokonsumadon.

Ni devas ankaŭ memori, ke manĝado kaj nutrado tute ne identiĝas. La homo ne utiligas la tutan manĝaĵon kiun li englutas, sed nur tion, kion li digestas kaj asimilas. Ni ĉiuj estas dietopekuloj, ni ĉiuj manĝas tro multe, sed nur malgranda parto de tio kion ni manĝas vere nutras nin. La fama sciencisto William Osler tiurilate sarkasme diris: "La plejmulto de tio kion ni manĝas ne estas necesa. Ni utiligas nur kvaronon de tio kion ni englutas, kuracistoj konsumas la aliajn tri kvaronojn".

La tria punkto de nia diskutata problemo estas la ekscesa uzado de drogoj, precipe la stimulantaj drogoj. Tiu problemo de drogoj estas problemo de krimologio, de sinmortigo. Ĝi estas vera tragedio kaj danĝero por la sano de individuoj, por familioj, por nacioj kaj por la homaro.

Ĉiuj scias ke la konsumado de drogoj estas teroga, kaj la terura prezo atingas la sumon de bilionoj da dolaroj. Kaj tio okazas nur pro tio, ĉar malsanuloj serĉas rimedojn ekstere, anstataŭ fidi je si mem, je la defendkapablo de sia propra organismo. Ili neglektas la tre malnova aksiomon, ke la ĉefa kuracado estas farata laŭ naturo; ĝi estas la plej perfekta resaniganto, kiam ni donas al ĝi la oportunon por utiligi la naturan defendkapablon de la organismo.

Milton diris: "Ne kulpigu la naturon. Ĝi faris sian parton, nun faru vian." La naturo povas kuraci la malsanon kondiĉe ke la viviga energio ankoraŭ ne estas elĉerpita. Nia organismo estas provizita de specialaj glandoj, kiuj sekretas karakterizajn substancojn. tiel-nomatajn hormonoin; tiuj hormonoj stimulas kaj eliminis la akumulitajn infektitajn substancojn; sed kiam la stimulantaj drogoj restimulas la jam elĉerpitan organismon, la rezulto estas perfortiga kaj fatale danĝera.

Same okazas kiam oni vipas la tro lacegan ĉevalon, perforte devigante ĝin daŭrigi la laboron. Pli logike estus, ke la besto ripozu, ke oni metu ĝin en paŝtejon, kie ĝi povas sin nutri per pura plenvitamina nutraĵo kaj reakiru la forton por sukcese labori. Alivorte, kiam la persono estas malsana, la glandoj efike laboras kaj eliminigas la maksimuma kapablo de la organismo. Sed estas nelogike kaj danĝere aldoni aliajn stimulantajn droĝojn, kiuj pli elĉerpigas la jam elĉerpitan organismon.

Memoru, ne ekzistas mirakloj en medicino. La naturo plenumas sian taskon metodike kaj malrapide. La provo, la peno de homo rapidigi la sanigprocezon per stimulantaj droĝoj tre ofte estas fatala. Estas rimarkinde ke akutaj malsanoj tre malpliigas lastatempe. Tio estas la rezulto de la progreso de la sanitara inĝenierarto kaj plibonigitaj vivkondiĉoj de la malriĉaj klasoj kaj NE al vakcinoj kaj al droĝoj. Bedaŭrinde oni elspezas milionojn da dolaroj por eltrovi novajn pli potencajn droĝojn, anstataŭ eltrovi la respondon al bezonoj, kiujn saniga nutrado postulas. Laŭ miaj informoj ekzistas nur unu universitata katedro por la studado de la dieto kaj scienco de homa nutrado. Verdire, tiaj katedroj devus troviĝi en ĉiu universitato de ĉiuj landoj.

Estas necese kompreni unufojon por ĉiam, ke la droĝoj NE kuracas la mal-

sanojn, ili nur servas subpremi, por ŝtopi la simptomojn, ŝajnigante ke ili resanigas. La droĝoj kuracas la simptomojn, sed nek la malsanon, nek la malsanulon. Por fini tiun tragikan ĉapitron mi citus kion prof. Osler diris, kaj multaj sciencistoj konfirmis, ke "la juna kuracisto komencas la profesion per 20 droĝoj por ĉiu malsano, sed la maljuna kuracisto je la fino de sia medicina kariero uzas nur unu droĝon por 20 malsanoj.

La problemon de la malsano oni povas solvi NE per droĝoj, same kiel oni ne povas solvi la problemon de la krimoj konstruante pli da malliberejoj. Nia tasko en la nuntempa medicino do estas: edukadi la popolon laŭ la principo, ke la naturo estas la plej perfekta kuracanto, eviti malpliigon de organisma defendkapablo per ŝanĝo de niaj vivmanieroj kaj manĝmanieroj; neniam uzi malvivantajn nutraĵojn; neniam uzi mortan produkton, kiun oni kutime trovas sur bretoj de droĝmagazenoj, eviti la uzadon de droĝoj, kiam eblas.

Radikala ŝanĝo estas urĝa. La unuan lokon en la kuracado okupas la dieto. La aforismo de Hipokrato, patro de medicino, ja diras en mirinda koncizeco, ke "Via nutraĵo estu via kuracisto".

(Prelego de D-ro A. Einihovici ĉe la 22-a Aŭstralia E-Kongreso en Sidnejo).

KIE ESTAS SUDA NOV-KIMRUJO?

BERNARD GOLDEN

Oni vane serĉos tiun loknomon en **Poŝatlaso de la Mondo** (PAM - 1971) aŭ en **Plena Ilustrita Vortaro** (PIV - 1970), ĉar neniu Nov-Kimrujo estas registrita, nek suda nek norda. En la artikolvorto "Kimro" en PIV troviĝas Nova Sud-Kimrujo, kiu laŭ la kumeto de elementoj, ne povas esti la sama loko kiel Suda Nov-Kimrujo. PIV informas, ke Nova Sud-Kimrujo estas unu el la ŝtatoj de la Aŭstralia Federacio kaj ĝia ĉefurbo estas Sidnejo. Kontrolante la registron de la urb-nomo "Sidnejo" en PIV oni tuj solvas la enigmon; ĝi estas havenurbo en Suda Nov-Kimrujo! Sajnas, ke la leksikografioj, kiuj kompilis PIV estis devintaj pli profunde studi siajn geografiajn lecionojn por ne krei nomojn de neekzistantaj lokoj. Jam okazis sufiĉe da polemikado en Esperantujo rilate nomojn de landoj, kiuj vere estas troveblaj.

Kio okazas, se nove bakita esperantisto, dezirante korespondi kun leter-amiko en Aŭstralia, adresus sian leter-

on al iu en Suda Nov-Kimrujo? Ĉu la poŝtoŝtupo resendus la koverton kun stampo: tekstanta "loko nekonata"? Probable ne, ĉar oni tuj rekonus la intermikson de la du adjektivoj "suda" kaj "nova". Cetere, sendube ĉiu en Aŭstralia scias, kie troviĝas Sidnejo. Aŭ eble estus pli bone diri "preskaŭ ĉiu" scias tion.

Unu, kiu ne scias tion, estas la verkinto de **Aŭstralia: Koncizaj Faktoj** (AKF), belaspekta ilustrita broŝureto publikigita en 1974 de la Aŭstralia Ambasado en Bonno, FRG. Sur p. 11 estas listo de ŝtatoj kaj ĉefurboj en du kolumnoj. Apud ĉiu ŝtato la ĉefurbo estas en la ĝusta loko krom ĉe la unuaj du kun la plej multnombra loĝantaro. Sidnejo troviĝas dekstre de Viktorio, dum la ĉefurbo de Nova Sud-Kimrujo aperas kiel Melbourne! Kiel povas esti, ke Sidnejo, grandurbo kun preskaŭ 3 milionoj da loĝantoj, estas tiel malfacile situebla?

Kiu interesiĝas pri la problemoj de

loknoj en Esperanto povas kompari kaj iliaj respektivaj ĉefurboj en la tri la esperantigon de la aŭstraliaj ŝtatoj menciitaj verkoj.

PIV	PAM	AKF
Nova Sud-Kimrujo	Nova Suda Valeso	Nova Sud-Kimrujo
Sidnejo	Sydney	Sidnejo
Viktorio	Viktorio	Viktorio
Melburno	Melbourne	Melburno
Kvinslando	Kvinslando	Kvinslando
Brisbano	Brisbane	Brizbano
Sud-Aŭstralio	Sudaŭstralio	Sud-Aŭstralio
Adelaide	Adelaide	Adelajdo
—	Okcidentaŭstralio	Okcident-Aŭstralio
—	Perth	Perto
Tasmanio	Tasmanio	Tasmanio
—	Hobart	Hobarto
—	Norda Teritorio	Norda Teritorio
Darvino	Darwin	Darvino
Federacia Ĉefurbo	Federacia Teritorio	Aŭstralia Ĉefurba
Kanbero	de la Ĉefurbo	Teritorio
	Kanbero	Kanbero

Komparante tiujn ĉi nomojn, oni tuj rimarkas, ke PIV estas mankhava, ne registrinte la Esperantajn formojn de **Perth**, **Hobart** kaj **Darwin**, kaj ne menciinte Okcident-Aŭstralion kaj Nordan Teritorion. En PAM, nur la ĉefurbo "Kanbero" estas asimilita. Inter la formoj de urbnoj en AKF kaj PIV estas jena diferenco: la nomo en la unua verko spegulas fonetisman tendencon (Brizbano, Adelajdo), dum en PIV dominas la grafismo (Brisbano, Adelaide). Neniu granda diferenco distingas la nomojn de la ŝtatoj en la tri verkoj kun la ecepto de la okulfrapa nomo "Nova Suda Valeso" en PAM! De kie ĉerpi la redaktoro tiun tute nekutiman formon?

Rigardante la mapon de Britio en PAM, oni trovas ankaŭ tie, ke la tradicia loknomo "Kimrujo" estis anstataŭigita per "Valeso". Tiu ĉi propra nomo estas evidente la esperantigo de la angla **Wales**, sed kial ĝi estis enkondukita? Antaŭ ol PAM estis el-

donita en 1971, oni universale uzis en Esperanto la zamenhofan radikon- "kimr-". PIV ja registras alian sinoniman radikon, "gval-", sed ĝi estis mortnaskita, kaj tiu sorto certe atendas ankaŭ "Valeso". La kimra popolo ne volonte uzos ĝin, ĉar la tradicia Esperanta vorto devenas de ilia propra kelta lingvo. Ĉu iu en Aŭstralio preferas "Nova Suda Valeso" al "Nova Sud-Kimrujo"? Mi ankoraŭ ne vidis "Valeso" en iu ajn alia publikigaĵo. Kaj jena demando estiĝas: se "Valeso" estas landnomo, kiel nomiĝas ĝiaj loĝantoj? Ĉu ili ankoraŭ estas kimroj aŭ ĉu ili transformiĝas en valesanojn? Se tio okazas, kiel nomi aligentan loĝanton en Valeso? Antaŭe estis eble fari tiun distingon por la vortoj "kimro" kaj "kimrujano". La enkonduko de la nebezona radiko "vales-" nur kaŭzos konfuzon. Ĝi estas ekzemplo de manko de klarvido sur la leksikografia tereno de Esperanto.

UN ELDONIS EN ESPERANTO

La Oficejo por Publika Informado (OPI) de la Unuiginta Naciaro en New York eldonis unuafoje la plej bazan dokumenton de UN, t.e. Ĉarto de UN kaj statuto de la Internacia Kortumo' (34-paĝa).

La teksto estas plibonigita, kompare kun la teksto de la sama dokumento eldonita de UEA mem en 1970.

OPI, krome, repris la jam elĉerpitan alian dokumenton 'Universala deklaracio de homaj rajtoj' (unufolia), kies unua eldono okazis en 1976.

Ambaŭ dokumentoj, legindaj por ĉiu nuntempa internaciulo, estas akireblaj ĉe OPI (UN, New York, NY 10017, Usono).

Klubo por aŭtistoj — ĉu vi jam aliĝis?

Ĝi nomiĝas IEKA (Internacia Esperanto-Klubo Aŭtomobilista). La unua celo de IEKA estas aplikado de Esperanto kiel solvo de la lingvaj problemoj en la aŭtomobilistaj medioj. La membronombro kreskas ĉiujare. Nun IEKA havas proksimume 1200 membrojn en 35 landoj, kaj troviĝas 29 landaj reprezentantoj, sed ĝis nun ĝi havas nur kvin aŭstraliajn membrojn. Fariĝu dumviva membro per sendo de \$4.00 al nia Ĉefdelegito, S-ro K. G. Linton, 4/2 Lyons St., Glenhuntly, Vic. 3163.

AŬSTRALIA= =KRONIKO

● **TOOWOOMBA:** 3-a Somera Lernejo: Aliĝis entute 33 lernantoj Ili venis el N.S.K. (14), Kvinlando (13), Kanbero (3), Okcidenta Aŭstralio (2), Viktorio (1), Instruas Trevor Steele (7), Ray Ross (12), Jean Lehane (11), Annie Spencer (3). Detala raporto sekvos venontnumere. (Robi, 13-1-81).

La decembra kunveno de nia klubo okazis la 15-an de dec. kun 8 membroj. Planoj por la federacia konferenco en majo estis diskutitaj kaj ni decidis denove aliĝi al A.E.A. La Zamenhofa Festo okazis je la 6-a ĉe la sekretariino Sandra Connors, kiu bone prizorgis la aranĝojn. — Jean Lehane.

● **SYDNEY:** Je 17/11 J. Harwood parolis pri alumetoj kaj li montris diversajn paperajn alumetujojn. Semajnon poste Tom Elliott parolis pri "Bjelke Teritorio" (Kvinlando) kaj sia ferio en la profunda nordo. Steve Cooper parolis pri sia ferio en Japanio.

La Zamenhofa Festo okazis je 13/12 en la Esperanto-Domo. Parolis S-ro Ralph Harry laŭ la temo "Paco, la Zamenhofa Celo", al tre atentema aŭdantaro. Aliaj distraĵoj estis skeĉoj prezentataj de gelernantoj de Bettie Hart (de Hurstville Primary School), paroladeto de K. Schwerin pri fruaj tagoj de la movado, "Cindrulino" kaj kelkaj skeĉoj preparitaj por sonbendoj uzataj en radio-elsendoj de Roger Springer. Inter la eroj ni kantis.

—M. Chaldecott.
● **MANLY:** Je 21/11 okazis aferkunveno por plani agadon en la nova jaro. Estis decidite starigi 4 kursojn en la Vespera Lernejo.

Je 7/12, en sunbrila vetero, 50 klubanoj kaj geamikoj renkontiĝis en la domo kaj ĝardeno de Ruth Carruthers por Kristnaskfestoj. Post trinkado, babilado kaj bongusta lunĉo, sekvis kristfestaj kantoj, gvidataj de Marjorie Duncan kaj Peg Ford-Lewis ĉe la piano. Margaret Liston kaj Robbie Robertson prezentis amuzajn dulingvajn skeĉojn kaj la tre ĝuinda renkontiĝo finiĝis per prezentado de donaco al Ruth pro ŝia helpo kaj bonkora gastamo.

—Eunice Graham.

● **KANBERO:** Nia klubo okazigis sian Zamenhofan Vesperon je 10/12. Ĉeestis 11 membroj kaj 3 gastoj. La Prezidanto (S-ro Ralph Harry) bonvenigis la ĉeestantojn,

prezentis ekspozicion de libroj kaj gazetoj kaj paroladis pri "Zamenhof kaj lia kredo." Ges-roj Ellyard kaj la Prezidanto prezentis kun mondmapo kaj bildoj vojaĝon ĉirkaŭ Esperantujo en 1980. Sekvis filmo "La Kvina Fasado" kun komentario en Esperanto. Tiam la ĉeestantoj partoprenis ludon, aranĝitan de S-ino Ellyard, kaj sekvis vespermanĝo.

En la venonta jaro la klubo kunvenos ĉiun lundon je 19.30-a en la salonoj de la Aŭstralia Instituto de Internaciaj Aferoj, Hotel Canberra Conference Centre, Commonwealth Avenue, Yarralumla.

Membroj gestigis en oktobro Ges-rojn Bossong el Nederlando kaj multe ĝuis la okazon. —M. Ellyard.

● **MELBOURNE:** La Zamenhof-Festo okazis je 6-a dec. en la salono de la skoltinoj. Ĉeestis 45 membroj de ĉiuj 4 Melburnaj kluboj. La festparoladon faris S-ro Ralph Harry pri la temo: "Zamenhof kaj lia kredo" (Komuna lingvo en multkultura mondo). Elstaris la akordion-ludado de Jim kaj Jennifer Dimo, kiuj prezentis popularajn klasikajojn kaj latin-amerikan muzikon. La grupoj de Malvern kaj Waverley prezentis skeĉojn kaj Ges-roj Koppel deklamis poemojn. S-ro R. Reed amuzis la ĉeestantaron per "Irlandaj Serĉoj". "La Espero" kaj bonega vespermanĝo konkludis sukcesplenan feston.

● **ADELAIDE:** Sudaŭstralia E-Societo festis la Zamenhofan Vesperon je la 13-a de decembro en la hejmo de Ges-roj van den Boogaard. Ĉeestis proks. 25 membroj kaj gastoj, kiuj manĝis, trinkis, babilis kaj ĝuis la amikan etoson. Tiu estis la lasta kunveno en 1980 kaj ni denove kunvenos en februaro. —R. Felby.

● **PERTH:** La jara kunveno okazis je 3-a de decembro kaj 14 membroj ĉeestis. La Ligo havis en 1980 sesdek membrojn kaj 39 "asociajn" membrojn. La kunveno akceptis proponon altigi la kotizojn al \$10 por membroj kaj al \$5 por pensiuloj kaj "asociaj" membroj. La estraro por 1981: Prez Jack Hawks, Vic-Prez: Rene Smeets, Sekretario: Chris Dean; Kasisto: Owen Loneragan; Biblioteko: S-ino D. Dean. En 1981 la Ligo denove kunvenos ĉiun 2-an kaj 4-an merkredon en la monato en kolegio "Nedlands".

La Zamenhofa Festo okazis je 15-a decembro en la memserva restoracio ĉe la kolegio Nedlands. Janek Volak nova enmigrinto el Pollando, tre elokvente paroladis, dum D-ro Einihovici tradukis lian prelegon por la ĉeestantoj

neesperantistoj. Jacqueline Walker pri-skribis "tipan aŭstralianon" kaj Shirley Gradussov rakontis pri siaj vizitoj al Kastelo Gresillon, Anglujo kaj Malto. Opera kantistino Valerie Melrose kaj akordionisto Gino Gobba ĉarmis la ĉeestantojn.

La Perta gazetaro plurfoje raportis lastatempe pri la multtalenta Jacqueline Walker, nur 16-jara, kiu i.a. gajnis premion de "Alliance Francaise" kaj atingis unuan lokon en la universitata enir-ekzameno. Krome ŝi fariĝis la plej bona ekzamenito en Biologio. Jacqui intencas studi medicinon kaj niaj gratuloj akompanos ŝin survoje al la "Doktora Diploma".

A.E.A. Estrar-Kunsido

La 6-an de dec., 1980 kunvenis en Melburno la Prezidanto (S-ro Ralph Harry), la Sekretario (S-ro Jack Fallu), la Kasisto (S-ino Ivy Fallu) kaj la Vic-Prezidanto (S-ro Ken Linton). Pro okupiĝo pri preparoj por la Zamenhofa Festo, Vic-Sekretario Herbert Koppel ne povis ĉeesti.

La Prezidanto raportis, ke nome de la asocio li sendis kondolencojn al S-ino Maddern kaj familio, al S-ino Matasin kaj al S-ro Koppel, kies frato mortis. Li ankaŭ gratulis la novan prezidanton de UEA, S-ron Maertens, kaj promesis la subtenon de AEA.

Pere de Ges-roj Einihovici li salutis la Pacifikan Kongreson en Vankuvero kaj sonebende prelegis. S-ro Harry reprezentis AEA (6/12) en Seminario por konsultado kun la Aŭstralia Nacia Komisiono por UNESKO kaj disdonis ekzemplerojn de angla teksto de sia prelego. "Esperanto: Komunlingvo por Multkultura Mondo".

La E-Ligo de Okcidenta Aŭstralio (S-ino Einihovici) petis financan helpon por sendi F-inon J. Walker al Toowoomba. La klubo en Launceston, post peto de la Prezidanto decidis, ke ili ne povas helpi per la interezo de sia kapitalo. La Estraranoj notis, ke la "Stipendia Fonduso" jam atingis \$1,000, kaj ke granda proporcio estas donacita de O.A-anoj. La Estraro decidis donaci \$100 el la ĝenerala kaso, repagenda en 1981 el la interezo de la Fonduso.

Lernolibroj: La Prezidanto raportis E.L.O.A. deziris helpon havigi 90 ekzemplerojn de la lernolibro de Makarian. La Libro-Servo ne povas helpi kaj rekomendis, ke oni aĉetu stokatan libron La Estraro konsideras, ke ĝi ne povas helpi.

Radioelsendoj-Kasetoj: S-ro Roger Springer petis helpon por dissendado de kasetoj, kun lecionoj kaj skeĉoj, faritaj de li kun la helpo de la Klubo de Manly. La Estraro decidis donaci \$100 al tiu celo, kaj inviti S-ron Springer agadi kiel Komisiito por Kaseta Sonebenda Servo de AEA. La kasetoj, kiujn ebligis la \$100, estu prunteblaj far kluboj, kiuj persvadis radiostaciojn uzi ilin.

ILEI-Kongreso en Aŭstralio: Rezentantoj de ILEI en Aŭstralio ricevis proponon de la Ligo okazigi konferencon en Aŭstralio, en Melburno aŭ Kanbero, en kolegio, inter Kristnasko kaj la Nova Jaro. S-ro Koppel indikis, ke li helpu pri organizado en Melburno se 5 aliaj kapablaj organizantoj ankaŭ helpus. La Kanbera E-Klubo ne povus helpi en tiu jarsezono. Decido: Informi ILEI ke ili verku konkretan proponon, prefere en la sama urbo, kie okazos iu tutaŭstralia konferenco, antaŭ aŭ post tiu konferenco. Kiam oni difinos la helpon deziran de AEA, tiam la Estraro estus preta konsideri la aferon. (Ralph L. Harry, 12/12/80).

SUKCESIS PRI AŬSTRALIA NORMA ELEMENTA EKZAMENO

S-ro Hermann Stuckstedte,
Carnarvon, W.A.

F-ino L. W. BURROWS, P.O. Rollington, Q'ld., 4816, serĉas kasetamikon (in)on kiu deziras (malrapide) paroli kun ŝi pri div. temoj.

Kara Redaktanto:

Interesis min la mencio de "troboj" sur paĝo 332, de nia decembra numero de A.E. Tiu estas kvarsilaba piedo, kiun mi nomas "pentobrakoj", kaj Brendon Clark nomis "anapestino", krom ke tiu ekzemplo enhavas katalekton en la paraj versoj. Jen estas poemeto far Brendon Clark, kiu aperis sur paĝo 65 de lia "Kien la Poezio". Ĝi havas tiun saman metrikon, krom ke mi iomete perfortis ĝin enmetante katalekton, ĉar tion farante, mi devis uzi elizion, kiun Brendon rifuzis uzi.

Kia vorto povas vibri
Al la stela labirint',
Aŭ rezoni tra la tempo,
Ĝis la plej unua hor'?"
Kia vorto povas diri
Nian amon al mortint',
Aŭ elkanti la muzikon
Ĉe la fundo de la kor'.

Ken G. Linton.

23-a AŬSTRALIA ESPERANTO-KONGRESSO

2-9 Jan., 1982 — Adelaide, S.A.

La kongreso okazos en la "Lincoln College", tre bele situita kolegio en Norda Adelejo, ne tro malproksima de la urbcentro. Ĉiuj kongresanoj povos loĝi en komfortaj ĉambroj en la Kolegio kaj la kosto por la ĉambro kaj ĉiuj manĝoj estos proks. \$20 tage.

Kongres-Kotizo: Antaŭ 30-6-1981: \$15.00; Pensiuloj, junuloj: \$10.00
Ekde 1-7-1981; \$20.00; Pensiuloj, junuloj: \$15.00.

Sendu vian kongres-kotizon al la kasistino **S-ino B. Randles, 35 Roslind Street, Kensington Gardens, S.A. 5068.** Se vi deziras loĝi en la Kolegio, aldonu \$10 kiel deponon por loĝejo. Se vi deziras ricevi kvitancon aldonu afrankitan koverton.

3-a Listo de Aliĝintoj:

16. Winifred Addis, Adelaide
 17. Bettie Hart, Sydney
 18. Ilja Grahovac, Sydney
 19. Barbara Williams, Melbourne
 20. John Paroz, Brisbane
 21. Jean Lehane, Toowoomba
 22. Brig. Isabel Gale, Melbourne
- Laŭŝtata distribuo: Suda Aŭstralio 8; Viktorio 5; N.S.K. 5; Kvinlando 3; A.C.T. 1

LA "A.E."

SUBTEN — FONDUSO

Antaŭe raportita	\$1079.10
S-ino H. Banham, Brisbane	\$12.00
S-ino B. Randles, Adelaide	\$10.00
	<hr/>
	\$1101.10

FONDUSO POR ESPERANTO-STIPENDIO

Antaŭe raportita	\$914
Ralph Harry, Canberra	100
S-ino D. Threlfall, Perth	20
S-ino E. Palmer, Perth	20
S-ro R. Alvaro, Perth	5
S-ino J. North, Perth	5
J. A. Paroz, Brisbane	20
F-ino B. Allatt, Brisbane	10
S-ino I. Einihovici, Perth	50
F-ino O. Hunt, Perth	21
S-ino B. Randles, Adelaide	10
	<hr/>
	\$1175

TINY GOLDSMITH-FONDUSO

Ges-roj A. & E. Oliver, Orelia \$24.00

CORRECTION

Nobody's perfect. We have a very careful typist, proofreader and compositor, but errors will creep in.

I would rather be considered illegitimate than illiterate, so I would like to correct two errors in the biography of Ralph Harry.

(1) The correct version is:- Alas, one day there was a power failure. All was confusion — chaotic, compounded confusion. Said Ralph, "I can tell you how" etc. (The full stops make all the difference.)

(2) Ralph doesn't want to hold the REIGNS of government. He wants to guide, and direct, by taking the REINS. He has no ruler complex.

Arthur Cocking.

Due to lack of space, this month's 'WHO'S WHO', by Arthur Cocking, had to be held over for our next issue.

RECENZOJ

RIGARDO AL NORVEGUJO estas nova, belaspekta broŝuro, tradukita el la norvega lingvo de Prof. D-ro C. Stop-Bowitz kaj eldonita de la Reĝa Ministerio de Eksteraj Aferoj. Estas la unua fojo ke norvega ministerio oficiale uzis Esperanton en siaj persajoj. Tiu multkolora broŝuro estas senkoste havebla de ĉiuj norvegaj diplomataj oficejoj aŭ de la Norvega Esperantista Ligo, Boks 942, Oslo 1, Norvegujo.

SUBSCRIPTIONS FOR 1981

for Individual Members, Clubs and Federations \$16

Additional Family Members: \$4

Pensioners and Full-time Students pay a minimum of \$8 (additional donations welcome)

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscriptions to A.E.A. \$16
(Individual, Club & Federation)
Additional Family Member \$4
Pensioners & Full-time Students
pay a minimum of \$8.



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.

Prezidanto: R. L. HARRY, AC, CBE, 8 Tennyson Crescent, Forrest, A.C.T., 2603

Sekretario: S-ro F. J. FALLU, 10 Sumersett Avenue, Oakleigh South, Vic., 3167

A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. ELLIOTT, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036.

Kasisto: S-ino I. FALLU, 10 Sumersett Avenue, Oakleigh South, Vic., 3167

Korespondaj Kursoj: S-ro J. Moore 7 Pelican Street, Emu Park, Queensland, 4702

N-ro 186 (266)

MELBOURNE

Marto, 1981

ŜVARCAJ* ANALOJ 1980

En la jaro 1980, kiel en antaŭaj jaroj, oni povis rimarki, ke unu temo ripetigis en preskaŭ ĉiu lando, sen rigardo al politikaj, lingvaj, rasaj aŭ anagramatikaj limoj. Sendube 1980 estis jaro de strikoj, bojkotoj kaj okupado de ambasadorejoj.

Eĉ antaŭ la fino de 1979 iranaj studentoj eniris kaj kaptis la usonan ambasadorejon en Teherano. Tie ili strikis kontraŭ la CIA kaj restis kun siaj garantiuloj dum la tuta jaro. Tiuj strikanoj tute ne estis kristanoj sed islamanoj. Prezidento Carter (pron. kate) sendis ekspedicion al Irano por savi la kaptitojn, sed en la dezerto la sablo bolas, kaj la usonaj helikopteroj ne bone funkciis. Sajne Jaĉjo agis kun sincero, sed post la fiasko li estis sen Ĉiro, kaj ne povis avanci. Do li devis serĉi musketon por helpi lin en lia eksterlanda politiko.

En Usono estis multaj strikoj dum la jaro. La plej grava estis en Kalifornio, kie la gajaj geaktoroj rifuzis fari novajn filmojn ĝis ilia ĉefo, la guberniestro, fariĝos Prezidento de Usono. Tial, ĉar popolo ne povas esti eterne militanta aŭ por ĉiam rigardi ripetitajn malnovajn filmojn, la usonanoj elektis Ronaldon, kaj resendis Jaĉjon (la patron de la boaca amikino) al la Ebenaĵoj de Georgio (rim, ne al Gruzia Georgio!). Tie li devos kunekzisti kun sia frato Vilĉjo, kaj sendube kultivos

sian arakidan aŭ arkadian ĝardenon, verkos libron pri siaj jaroj en la Blanka Domo, kaj vivos feliĉe eterne. La vako en la Blanka Domo pleniĝas per vakero. Post la bedaŭrinda morto de Mae West (pron. mej ŭest) estas Prezidento Reagan kiu diros "Venu iam al mia ĉambro kaj vidu min".

Sur la Monto Helena, kiu erupciis dum la jaro, iuj personoj ankaŭ strikis. Ili rifuzis eliri el siaj domoj, eĉ kiam evidentiĝis, ke la falo el la ĉielo estas lafo. Eble ili deziris krei en Usono modernan Pompejon por allogi turistojn, kiel oni faras en Napoli. Tien iris la Reĝino de Britio dum sia vizito al Italio por studi la bildojn. Kompreneble oni devas pagi por gapi, sed la fotistoj neniam sukcesis en sia plano kapti la Reĝinon kaj maldecan bildon en la sama kadro.

Alia striko en Usono estis organizita de tiuj boatuloj kiuj eskapis el Kubo kaj eniris tendaron en Florido. Post kelkaj monatoj en la Lando de la Liberuloj ili decidis, ke estus preferinde loĝi en Kubo eĉ kun Kastro ol ĝui en Usono la planan vivon de enmigrinto.

En Aŭstralio okazis, en 1980, kelkaj tre seriozaj strikoj, kiuj paralizis la ekonomian vivon de la nacio. La ŝoforoj de ŝarĝatombiloj rifuzis labori se aliaj veturiloj uzas la saman ĉefvojon. La sindikalistaj amikoj de la

aŭstraliaj indiĝenoj rifuzis labori por minadkompanioj, kiuj boris truojn en la bieno de indiĝenaj triboj. Evidentiĝis, ke kiam ajn oni trovis bonan lokon kie eble troviĝas nafto, la loko fariĝas sankta, kaj la kompanio devis pagi grandan sumon al la indiĝenoj kaj al iliaj amikoj kaj advokatoj. Felice oni evisit strikon sur la hipodromo Flemington la tagon de la Melburna Pokalo, sed en aliaj partoj de Aŭstralio ĉiuj ĉesis sian laboradon dum la ĉevaloj kuris. En Aŭstralio ankaŭ kelkaj sindikalistoj postulis laboremajnon de nur 35 horoj — aliaj preferus septagan semajnfino. Sed plej serioze la laborantoj en bierfabrikejo rifuzis labori dum pluraj semajnoj. Pro tio la tradicia aŭstralia trinkaĵo preskaŭ malaperis, kaj estis minaco de socia diserigo. Fine en la publika servo la sindikatoj multe plifortiĝis, kaj insistis, ke oni permesu flekseblajn laborhorojn, tio estas, ke ĉiu oficisto rajtas komenci sian laboron kiam ajn li deziras, kaj ĉesi tuj kiam li/ŝi laciĝas.

En Norda Irlando estis longa malsatstrikto far teroristoj en prizono nomata "Laborinto". Ili postulis la staton de militkaptitoj eĉ herooj. Ili insistis, ke ili ŝtelis, brulis kaj mortigis nur pro politikaj motivoj, kaj ili pretendis la rajton porti siajn proprajn vestojn, kaj esti senlaboruloj. La brita registaro de Manjo Thatcher opiniis, ke oni ne rajtas ŝanĝi registarojn per eksplodoj, kiuj mutilas aŭ mortigas virojn kaj postlasas vidvinojn kaj orfojn. Dum tiu striko okazis kontraŭstrikto de protestantaj lojalistoj, kiuj deziris ankaŭ liberiĝi de la laborado kaj porti neuniformajn vestojn. Felice, kelkajn tagojn antaŭ Kristnasko, la malsatstriktoj flaris anglan kristnaskan meleagron, kaj ankaŭ pudingon kaj sekfruktan torteton. La 53taga striko ĉesis.

En Granda Britio la konata ĵurnalo "La Tempoj" preskaŭ mortis pro striko de ĵurnalistoj, kiuj ne ŝatis la novan presteknologion. Ili pretis uzi skribmaŝinojn kaj aliajn modernajn ilojn sed ne deziris vidi siajn erarojn montritajn sur ekrano. La ĵurnalistoj argumentis ke la novaj metodoj kontraŭis la liberecon de la gazetaro, jam minacatan de UNESKO sub la influo de UEA.

La virinoj de Granda Britio strikis kontraŭ alia amasmedio — la kinejoj. Liberigitulinoj bojkotis filmojn en kiuj la amoro estis violenta. Ilia slogano estis "Faru amoron ne militon!" La

viroj protestis, ke ili nur deziris paĉjan vivon.

La Reĝa Familio, la unuan fojon en la brita aŭ triba historio, organizis sindikaton por protekti sian rajton al privateco en la Palaco kaj la reĝa trajno. La Princo Karulo postulis la rajton dormi en la trajno sen onidiroj. Li asertis, ke li preferas adori la diinon Dianan per ĉaso ol turisti en Hindio kun Indira. Dum la princo kaj lia familio bojkotis la gazetaron, kaj planis neatenditan anoncon pri fianĉiĝo, la Princino Karulino, filino de unu el la Gracioj, ekسدziĝis. Spite de akvolutoj kaj aerolitoj ŝi ne povis plu dormi, kaj ŝi ne plu ŝatis pasigi la nokton parolante kun sia edzo.

La Reĝino, la patrino de la Princo, vojaĝis al Aŭstralio por inaŭguri novan konstruaĵon en Kanbero por la Alta Tribunalulo. La konstrulaborantoj strikis por pli altaj salajroj, sed la Ĉefĵugisto, Kavaliro Garfield Barwick (pron. barfild garvik) persvadis ilin, ke estis ilia devo prepari ĉion por la vizito de la Reĝino. Kavaliro Barfield bonvenigis la Reĝinon. Aliaj civitanoj ankaŭ ĉeestis kun balonoj. Ili ne povis malebligi al la Reĝino planti junan eŭkaliptarbon, sed ili ŝtelis ĝin dum la nokto kaj movis ĝin al sia propra ĝardeno.

La nura mondskala bojkoto de la jaro estis la rifuzo de kelkaj landoj sendi atletojn al la Olimpiaj Ludoj en Moskvo, se oni ne permesis al la rusaj soldatoj en Afganio reiri hejmen por la Ludoj. Kompreneble multaj sportistoj, eĉ amatoroj, deziris partopnei en la Ludoj, eĉ se kelkaj soldatoj ne ĝuas la saman sperton. Ili deziris ĝui la vilaĝan vivon, paroli kun fremduloj, uzi la funkciantajn telefonojn eksterlanden, kaj vidi la konstante ŝanĝiĝantan koloran tapeton en la stadiono, kaj la ĉarman ursidon kiu forflugis per balonoj. Kelkaj ankaŭ deziris venki en sia perferata sporto kaj gajni oran aŭ arĝentan medalon, aŭ almenaŭ bronzan haŭton. Ne al glavo soifanta sed al Volga survelata la Ludoj vokis la homan familion.

Certe la plej grava striko de la jaro okazis en Pollando. Tie situas Gdansk, kie en antaŭaj jaroj estis dancigo. Ĉi tiu jaron la registaro dancigis la laborantojn kiam, post la sindikata striko, ĝi donis al ili la rajton striki. Eĉ la plej solidaj laborantoj dancis sur la stratoj. Ilia slogano estis: "Eĉ Kristanoj povas fariĝi strikanoj". Ĝi estis varma somero ("Monato").

En la somero ankaŭ okazis la Universala Kongreso en Svedio. Kiel kutime tiu kongreso estis ankaŭ danciga, kun solena sed gaja balo por gekongresanoj. Estis nur unu striko en la Kongreso. La Prezidanto, Humphrey (pron hamfri) Tonkin rifuzis daŭre servi en tiu posteno, kaj oni devis elekti novan ĉefon. Felice oni trovis alian

viktimon kaj la laborado de UEA povis efike, senstrikte antaŭeniri, en sankta harmonio.

La slogano de via analisto estas: "Neniu striko sen HENRIKO".

[*Raymond Schwartz (elparolu Svarc), franca verkisto kaj humoristo, 1894-1973, kies "Analoj" ofte aperis en "Sennacieca Revuo"]

LA 3-a ESPERANTA SOMERLERNEJO EN TOOWOOMBA

La ĉiudujara somerlernejo okazis la 3-an fojon en la kadro de "Darling Downs Institute of Advanced Education", ĉe la konata ĝardenurbo Toowoomba. La Instituto provizis ankaŭ kiel kutime, kursojn pri muziko, pentroarto, skulptarto, lignogravuraĵo tekstarto, ceramikarto kaj aliaj artoj kaj teknikoj.

Bazan kurson por E-komencantoj instruis S-ino Annie Spencer per la rekta metodo de la Moderna Lingvo-Centro, ellaborita de S-ino Audrey Childs-Mee, kiu enkondukis ĝin en la somerlernejon antaŭ 2 jaroj. La lernolibroj estis "Practical Course in Esperanto" de Szilagyí, kaj "Esperanto Baza Kurso" de la Moderna Lingvo-Centro. Ĉeestis la bazan kurson Melissa Dawe, 10-jaraĝa, kaj Michelle van Brunshot, 14-jaraĝa, ambaŭ studentinoj de la lernejo "Holy Name" en Toowoomba, kiuj en eseo-konkurso gajnis stipendiojn de la Kvinlanda E-Federacio.

Post-komencantan kurson instruis S-ino Jean Lehane, kiu responsas pri la naskiĝo kaj daŭra sukceso de la somerlernejo en Toowoomba. 12 studentoj progresis per "Step by Step" de Butler, kaj "Privilegia Vojo" de Setala.

S-ro Ray Ross gvidis 9 prezentantojn laŭ "Paŝoj al Plena Posedo" de Auld, kaj S-ro Trevor Steele prezentis literaturan kurson al 7 altgraduloj per la "Baza Literatura Krestomatia" de Benzik kaj la novelo "Fianĉo de l'Sorto" de Rosbach. Paroprenis la literaturan kurson S-ino I. Einihovici kaj F-ino Jacqueline Walker el Okcidenta Aŭstralio, post longa kaj multekosta veturo. Cetere, la ĉarma 16-jara Jacqueline juŝ atingis elstaran sukceson en abiturianta ekzameno, gajninte la plej altan poentaron en la tuta ŝtato, kaj intencas studi la kuracarton en la universitato.

Unu studentino devenis el Viktorio, S-ino Doris Morrison el Wonthaggi, la

aliaj el Kvinlando kaj Nova Sud-Kimrujo. La gvidantoj pridiskutas la eblecon de somerlernejo en N.S.K., ekzemple en Armidale aŭ Bathurst, por allogi en la estonto pli da gesamideanoj el la sudaj ŝtatoj; ĝis nun la sudanoj estis la malplimulto en ĉiu somerlern-eja kurso.

Oni povis veturi per aŭtobuso al la centra kolegio por ĉeesti koncertojn de la muzikaj studentoj kaj de la ABC Sinfonio; multaj kursanoj trovis la muzikon ege ĝinda. Sabate okazis subĉiela rostoffesto ĉe la centra kolegio, kie ni Esperantistoj parolis kun aliuloj kaj iom propagandis la lingvon.

Dimanĉe multaj samideanoj el Brisbane alvenis por ĝui piknikon kune kun la kursanoj en "Lions Park", kelkajn kilometrojn ekster la urbo. Iam suno brilis kaj ni rostis la kutimajn bifstekojn kaj kolbasojn. Bedaŭrinde la Toowoomba veterano, S-ro H. V. Petley, devis pardonpeti pro malsano, esperinde ne grava.

Ĉiutage ni naĝis en luksa naĝejo, kelkaj eĉ naĝis dum la nokto, ĉar la luno brile lumigis la pejzaĝon. Ĉiutage ni provprezentis teatraĵon "Cindrulino", ĝis merkredo la 21-a, kiam la gekursanoj kaj kelkaj geamikoj ĉeestis en tre granda kaj luksa teatro. S-ino Joan Green ludis la ĉefrolon de Cindrulino mem, kaj Profesoro R. G. Robertson ludis la princon. S-ino Katie Wright elstaris kiel la feina baptopatrina, portante flugilojn speciale desegnitajn kaj konstruitajn de inĝeniera profesoro el la aviadila fako. S-ro Trevor Steele deĵoris kiel reĝisoro, kaj kompreneble multaj aliaj gesamideanoj ludis rolojn kaj helpis la geaktorojn; la teatraĵo merite ricevis multe da aplaŭdo, eĉ de la ne-esperantistoj. S-ino M. Ellyard aranĝis distrajn vesperojn kaj mem prezentis erojn kune kun la edzo, ambaŭ anoj de la Kanbera Klubo.

Je jaŭdo (22/1) okazis la 74-a naskiĝ-

datreveno de nia veterano Wre Chandler, kiu eklernis Esperanton antaŭ 64 jaroj. Ceremonie Tero Lahteenmaki el Finnlando prezentis specialan kukon al S-ro Chandler, kiu ricevis elkorajn gratulojn de la tuta ĉeestantaro.

La kurso daŭris pli longe ol antaŭe, de la 11-a ĝis la 23-a. Je la fino, la du studentinoj en la baza kurso prezentis al la tuta kursanaro tre amuzan skeĉon pri internacia amika kunveno en restoracio. La klara elparolmaniero kaj la juneca vervo de la knabinoj multe plaĉis al ĉiuj, kaj S-ino Spence rajtis fieri pri la rezulto de sia instruado.

Ci-foje ni loĝis en Downlanda College, porknaba lernejo. Ĉiuj konstruaĵoj estis imponaj, eĉ luksaj, la manĝĉambro, la klasĉambroj, la teatro kaj la naĝejo, ĉiuj bonaj, krom la

dormĉambroj, oni devas diri kun bedaŭro. 30 sinjorinoj dormis kune en unu granda ĉambro kaj disponis nur unu necesejon, kredeble tio sufiĉus inter junaj knaboj, sed tute ne por sinjorinoj, La litoj estis malmolaj, kaj se unu ne povis dormi, neeviteble ŝi vekis aliajn. La responsuloj certigis al ni, ke ili strebos por trovi pli bonan dormlokon antaŭ la venonta somerlernea kurso en 1983.

Necesas emfazi, ke la kosto estis malalta. Kiel en Sidnejo, oni devas elekti, ĉu pagi sufiĉe da mono, aŭ ricevi malmultekoston loĝejon. La organizantoj de kongresoj kaj kursoj devas lukti kontraŭ inflacio; se loĝloko kiel "People's Palace" aŭ "Downlands" ne taŭgus, vi mem devus trovi hotelon aŭ loĝi en trenveturilo. — ROBI.

NOVAĴOJ EL NOV-ZELANDO

Grandece - eta, sed kvalite - ega!

Jen kiel nov-zelandanoj priskribis sian ĉi-jaran kongreson. Neniu loka grupo estis preta organizi la 1981-an kongreson, do la centra estraro en Wellington decidis organizi "mini-kongreson" je la 9-a kaj 10-a de januaro. La kongreso okazis en la halo de la "Societo de Amikoj"; ne estis kongreskotizo, kaj esperantistoj, el aliaj partoj de Nov-Zelando, devis mem prizorgi loĝlokojn kaj ĉef-manĝojn, sed aliaj manĝetoj estis haveblaj en la kongresejo.

La tridek kvin esperantistoj, kiuj partoprenis, ĝuis agrablan kongreson. Prof. J. Adcock kaj S-ro J. Major gvidis 2 lingvosesiojn kaj okazis 3 aferkunsidoj. Laŭ la kasraporto la organizo havis profiton en 1980 de \$210.70 kaj la librofako montris profiton de \$78. Okazis kelkaj interesaj prelegoj, inter kiuj estlaris raporto de S-ro Jim Allan, pri la kongreso en Stockholm kaj de Ellen Lymburn pri la 2-a Pacifika Kongreso en Vancouver.

La nova estraro konsistas el Jim Allan (Prezidanto), Ralph Dearnley (Vic-Prez.), Fred Adams (Gen. Sekretario), S-ino M. Richardson (2-a Sekr.), S-ino M. Wansbrough (Kasisto), H. W. R. Peterson (Redaktoro kaj Libro-Servo) Prof. J. Adcock (Eduka Oficisto), Fred Wood (Konstanta Kongresa Sekr.) Oni decidis, ke la 47-a Kongreso okazos en januaro 1982 en Christchurch.

Trafa komento de Fred Wood (Auckland) ĉe la N.Z. E-kongreso: "La junularo ofte forte subtenas idealajn movadojn, kial ne Esperanton?"

NOVAĴOJ EL JAPANO

(De nia japana korespondanto
Bun'ichi Iizaki)

La 9-a Internacia E-Renkontiĝo okazis de la 7-a ĝis la 9-a de novembro, 1980 en la E-Domo de Yoyogi, Tokio. La ĉeftemo de la renkontiĝo, kiun partoprenis 25, estis pri "diskriminacio". Aŭstraliano Steve Cooper prelegis pri la diferenco inter laborkondiĉoj en Aŭstralio kaj Japanio. Stefan McGill, nuna direktoro de la UEA Centra Oficejo prelegis pri la lingva ĝangalo en la Eŭropa Komunumo. Stefan McGill ankaŭ prezentis filmojn pri Nederlando kaj Nov-Zelando. Oni longe diskutis pri seksaj diskriminacioj, pri etnaj-rasaj diskriminacioj speciale ĉe koreoj-japanianoj.

La Japana E-Instituto decidis profiti de la vizitoj de eksterlandaj Esperantistoj por organizi kulturajn prelegkunvenojn. S-ro William R. Harmon, prezidanto de la E-Ligo por Norda Ameriko estis la unua prelegisto. Li prelegis pri "Lingva Diskriminacio en Usono," Poste venis Stefan McGill, kiu parolis pri "Japanaj Festivaloj ĉarmas min". Lia nova edzino, Loes Demmendaal, prelegis pri Nederlando.

Aŭstralianoj kiuj intencas viziti Japanion kaj havas interesan temon por prelegi, estas invitataj kontakti la "Japanan Esperanto-Instituton", Waseda-mati 12-3 Sinzuko-ku, Tokio.

Junulara Kongreso

Oaxtepec, Meksikio, 10-17 julio 1981

Membroj, kiuj interesiĝas pri tiu kongreso, povas akiri flugfoliojn kaj aliĝilon ĉe Ĉefdelegito Ken Linton, 4/2 Lyons St., Glenhuntly, Vic., 3163.

AŬSTRALIA= =KRONIKO

● **PERTH:** La Ligo havas novan, tre entuziasman membron. S-ro Janusz Wolak estas juna enmigrinto el Pollando. Li deziras restarigi fortan junularan movadon en Aŭstralio. Plej grave, li deziras organizi kurson por instruistoj, en kiu partoprenos 1-3 instruistoj de ĉiu lernejo en Perth. Por allogi instruistojn al tiu kurso, li proponas premion de \$2000 por tiu instruisto, kiu finos la kurson kun la plej bona rezulto kaj poste havos la plej grandan E-klason. Per tiu kurso por instruistoj li esperas, ke Perth fariĝos "la plej forta E-medio en la tuta mondo." Li jam ellaboris 65-horan Esperantologian Seminarion. (Ni forte esperas ke S-ro Wolak sukcesos kolekti la sumon de \$2000 por efektiviĝi sian planon.)

La Ligo intencas gvidi 7 kursojn por komencantoj. I.a. S-ino Vera Payne instruos en la Teknika Lernejo de Subiaco kaj S-ino Ruth McGrath en la Eduka Centro por Plenaĝuloj.

20 membroj partoprenis sukcesan seminarion en la hejmo de Ges-roj McGrath (18/1). Inter la 23-a kaj 26-a de januaro la Ligo partoprenis la "Festivalon en Hyde Park". Cent miloj da vizitantoj preterpasis la standon kun E-afiŝoj. Ankaŭ finance la festivalo estis plena sukceso. Membroj vendis plantojn, virinajn antaŭtukojn kaj kukojn kaj la fina rezulto estis \$358.

● **ADELAIDE:** Ni kunvenis en la Universitato je la 3-a de februaro. Dum 1981 ni intencas kunveni, dufoje monate, la unua kunveno por studado kaj instruado kaj la dua por konversacio.

Post la instruado je la 3-a de februaro, ni diskutis la grandan, multflankan literaturon de nia lingvo.

—Beryl Randles.

● **MELBOURNE:** Je 19/1 S-ro Henry Rosengren daŭrigis sian prelegerion pri militkaptiteco en Germanujo, lia transloĝigo al internigejo apud Opolje kaj poste apud Krakovo, por labori en fabriko de I. G. Farben. Bonvenaj gastoj de la kunveno de 2/2 estis Ges-roj R. Felby el Adelaide. S-ro H. Koppel aŭdigis senbendan programon de la E-grupo "Merkurio" en Rotterdamo (1-an parto). La 2-a parto aŭdiĝis je 9/2.

La iarkunveno okazis je 16-a februaro. La kasisto (S-ro Errol Chick)

raportis pluson de \$4.98. La sekretario (H. Koppel) raportis ke la Melburna E-Societo havis en 1980, 26 membrojn kaj neniajn kursanojn (1979: 28 membrojn kaj 3 kursanojn). Oni elektis la jenan estraron: Prez: S. Kanaĉki; Vic-Prez: H. Beechey; Sekr. H. Koppel; Kasisto: E. Chick; Bibliotekisto: Fay Koppel; Inform-Oficisto kaj Kas-Kontrolisto: Ken Linton.

Ce la distra vespero de la 23/2, S-ro Errol Chick montris diapozitivon pri vojaĝo en Ĉinio (ĉefe pri Shanghai). Bonvena gasto estis S-ino Junkton el urbeto apud Milwaukee, Usono.

La **OAKLEIGH ESPERANTO-GRUPO** elektis la jenan estraron: Prez: Jack Fallu; Vic-Prez: N. Butkunus; Sekr: R. Reed; 2-a Sekr. Ivy Fallu; Kasisto: Ann Hearn.

La "Waverley-Grupo" elektis F-inon Isabel Gale kiel prezidanton; S-ron George Holding kiel sekretario kaj Evelyn Ellis kiel bibliotekiston.

● **CANBERRA:** S-ino M. Ellyard instruas klason de 8 komencantoj kaj S-ro Ralph Harry klason de 4 progresantoj. En katolika lernejo St. Vincent's, Aranda, S-ino Ellyard instruas 40 infanojn (11-12 aĝaj) en 2 klasoj. Ankaŭ la 2 instruistoj ĉeestas kaj intencas lerni. La instruistoj instigos la infanojn fari la hejmtaskojn kaj praktiki la lingvon.

● **SYDNEY:** Nia unua kunveno okazis je 2-a de februaro. La temo estis "Nekrologoj por la Perdita Somero". Dum la tuta kunveno oni ridis. Ĉiu parolis pri diversaj temoj, kaj mirakle ĉiuj parolis Esperante. Plejparte ni leĝere disputis pri la peketoj de la aliaj membroj.

Je 9/2 estis la Jarkunveno. Elektiĝis la jenaj estraranoj: Prez: M. Chande-cott; Vic-Prez: T. Elliott, D. Gould, J. Harwood; Sekretario: M. Chaldecott; Kasisto: S. Fanos; Bibliotekisto: D. Gould; "A.E." Korespondanto: Wre. Chandler; Libro-Peranto: T. Elliott. Kas-Kontrolistoj: Betty Hart kaj Colin Pollard. Ni multe diskutis la programon de propagando, kaj finfine decidis lasi la aferon al la estraro.

16/2 prelegis Shirley Fanos pri "La Juneco de Zamenhof" Sekvis vigla diskutado. Rimarkinda estis la vigla uzado de Esperanto, 1981 promesas esti malbona jaro por la "Krokodiloj".

—Wre. Chandler.

● **MANLY:** La 27-an de januaro okazis la 21-a jarkunveno. Elektigis: Prez. Robbie Robertson; Vic-Prez.: Arthur Cocking, Frank Preacher; Sekr.: Betty Cleminson, Kasisto: Frank Mangan; Bibliotekisto kaj Libro-Agento: Helen Stone.

Marjorie Duncan proponis ke la klubo kontaktu sociojn por la handikapitoj por oferti senkostajn lecionojn, kiel gastoj por la Internacia Jaro de la Handikapitoj. Pluraj sin proponis por instrui. Sekvis artikolo en la loka ĵurnalo pri tiu propono, kaj enketoj estas jam ricevitaj.

La 3-an de feb. komenciĝis 4 kursoj ĉe la *Vespera Lernejo*. 34 ĉe-estis. Marj. Duncan instruas la komencantojn, R. Robertson la progresantojn, Betty Cleminson la altgradulojn kaj Eunice Graham gvidis konversacian grupon.

Feliĉa okazo estis la prezentado de ora insigno por dumviva membreco de nia klubo al Kay Morrison pro ŝia senlaca kaj bona laboro kiel Bibliotekisto kaj Libro-Agento dum la pasintaj 14 jaroj. — Eunice Graham.

● **ST. LUCIA:** Pro la malsano de Winsome Greenhalgh neniu kurso por komencantoj okazos en 1981. Tamen, du membroj de nia grupo instruos ĉe la ĉambroj de la Brizbana Societo por tiuj, kiuj deziras studi dumtage.

La lastjara kurso daŭrigos ĉe St. Lucia la studadon en literaturo, dramo kaj interparolado ĉiumerkrede kiel kutime. — W. Greenhalgh.

● **BRIZBANO:** La 26-an de januaro ni rekonvenis, post la ferjo-periodo, ĉefe por diskuti planojn rilate al instruado. Ni decidis starigi la kutimajn kvin klasojn, kune kun la normala konversacia grupo, ĉiun lundvesperon. Ankaŭ pro petoj de kelkaj personoj ni intencas provizi dumtagan klason por komencantoj, kies gvidanto estos Annie Spencer. Ni bonvenigis 12 komencantojn al la normala vespera klaso la 2-an de feb. kaj ĝis nun, estas 4 por la dumtaga klaso. Entute, dek el niaj anoj ĉeestis la Somerlernejon en Toowoomba kaj ĉiuj tre ĝuis la viziton. Almenaŭ 3 membroj intencas partopreni la Universalan Kongreson en Brazilo.

— Ray Ross.

● **TOOWOOMBA:** La jarkunveno okazis je 16-a de februaro. 7 personoj ĉeestis. Prezidanto (J. Lehane) kaj sekretario (S. Connors) restas la samaj.

Kvar klubanoj studis la lingvon dum 1980, kaj kvar ĉeestis la Someran Lernejon. S-ro Sato Williams raportas ke du lernejoj (Gabbinar kaj 'Holy Name') daŭre instruas Esperanton ĉi-jare. Planoj pri la federacia konferenco en Toowoomba (16-17 majo 1981) estis diskutataj. — Jean Lehane.

● **ROCKHAMPTON:** Okaze de prezento de la "Paul Harris Award" al Urbestro R.B.J. Pilbeam, gastparolanto S-ino Margaret Gibson, MBE parolis al 200 gerotarianoj pri tutmonda interkomprenado, kaj rekomendis Esperanton tiucele. Bona raporto pri ŝia parolo aperis en "Rockhampton Bulletin" de 3/3.

Fino Joyce Turner revenis de Sud-Afriko, kie ŝi renkontis Esperantistan leteramikon dum feria vojaĝo.

—Joyce Turner.

● **KAPRIKORNIA MARBORDO:** Ni komencas 1981 kun 8 anoj, kiuj studas kune nun dufoje ĉiusemajne. Ni bonvenigas novulino Kathy Austin, kiu jam bone progresas. — John Moore.

23-a AŬSTRALIA ESPERANTO-KONGRESSO

2-9 Jan., 1982 — Adelaide, S.A.

La kongreso okazos en la "Lincoln College", tre bele situita kolegio en Norda Adelejo, ne tro malproksima de la urbcentro. Ĉiuj kongresanoj povos loĝi en komfortaj ĉambroj en la Kolegio kaj la kosto por la ĉambro kaj ĉiuj manĝoj estos proks. \$20 tage.

Kongres-Kotizo: Antaŭ. 30-6-1981: \$15.00; Pensiuloj, junuloj: \$10.00 Ekde 1-7-1981; \$20.00; Pensiuloj, junuloj: \$15.00.

Sendu vian kongres-kotizon al la kasistino S-ino B. Randles, 35 Rosling Street, Kensington Gardens, S. A. 5068. Se vi deziras loĝi en la Kolegio, aldonu \$10 kiel deponon por loĝejo. Se vi deziras ricevi kvitancon aldonu afrankitan koverton.

4-a Listo de Aliĝintoj

23. Ken Linton, Melbourne
24. D-ro T. Einihovici, Perth
25. Idyss Einihovici, Perth
26. Eve Matasin, Sydney
27. Vera Henderson, Sydney
28. Jack Fallu, Melbourne
29. Ivy Fallu, Melbourne
30. Alice Longson, Perth

- 31. Stan Bruton Castlemaine, Vik.
 - 32. Sybil Martin, Brisbane
 - 33. Doreen Owen, Perth
 - 34. Chris Dean, Perth
 - 35. Dolly Dean, Perth.
- Laŭstata distribuo: Viktorio 9; Suda Aŭstralio 8; N.S.K. 7; Okcidenta Aŭstralio 6; Kvinlando 4; A.C.T. 1.

LA "A.E."

SUBTEN — FONDUSO

Antaŭe raportita	\$1101.10
Dr. K. Bowling	4.00
F-ino Barbara Williams, Melbourne	4.00
S-ro E. Errey, Geelong, Vik.	5.00
S-ro V. Gueltling, Sydney	2.00
	<hr/>
	\$1116.10

**FONDUSO POR
ESPERANTO-STIPENDIO**

Antaŭe raportita	\$1175
Dr. C. Caldera, Perth	20
S-ino I. Caldera, Perth	20
S-ino M. Gray, Perth	10
S-ino R. Lane, Perth	10
S-ro S. Kanački, Melbourne	10
S-ino A. Sedgely, Perth	7
S-ino A. Hancock, Perth	10
S-ro V. Gueltling, Sydney	2
	<hr/>
	\$1264

Voĉo el Svislando

... (vian revuon) "mi ĉiam legas kun plezuro, aparte interesas min la biografioj en via "Who is who," (D-ro Arthur Baur, Estro de Svisa Radio Internacia, Esperanto-Fako).

"Project — Komunikado"

S-ro Roger Springer komencis bonege per sonbendoj, kiuj konsistas el skeĉoj en angla kaj Esperanto, verkitaj kaj luditaj de diversaj samideanoj. Du radiostacioj, 2 MCE - FM Bathurst kaj 2NUR - Newcastle jam dissendas ĉiusemajne eron elektitan el tiuj skeĉoj. Ni invitas vian partoprenon.

Por kontakti nian komitaton, elektu klubanon kiel komunik-korespondanton (K.K.K. - Kluba Komunik-Korespondanto). Per la K.K.K. transdonu proponojn kaj ideojn pri estontaj radio-programoj. Helpu la ekfunkciigadon de la projekto kaj kontaktu la administranton de radiostacio apud vi: ni provizos son-

bendon, taŭgan por tiu projekto. Ĉar ni bezonas monon por pagi niajn elspezojn, bonvole helpu per aĉeto de la unuaj 5 kasedoj por via klubo, po \$2, la kvin kasedoj por \$10. Ili utilas por distri klasanojn aŭ donacu ilin al eksterlandaj korespondantoj, kiuj samtempe emas lerni la anglan.

Skribu al: "Media Correspondent", Manly Esperanto Club, Box 415, Manly, 2095.

A.E.A. CORRESPONDENCE COURSES.

1981 PRICE LIST

The price of each course includes tuition by post until the course is completed to the student's satisfaction.

1. **BONAN TAGON.** Introductory; includes book and cassette \$10
Optional extra: NIXON 2-WAY DICTIONARY (very good for beginners) if desired with Course 1 or 2 add \$2.90
(If ordered separately, \$3.40 posted)
2. **JEN NIA MONDO.** Excellent cassette conversation course, with book as well as cassette \$16
3. **The ESPERANTO TEACHER** course (20 lessons) with the textbook and "WELLS" 2-way dictionary \$18
The ideal "refresher" for "rusty" Esperantists.
4. **PROGRESSIVE** course, with the useful-ever-after book "Step by Step in Esperanto" Adds polish and confidence \$20
5. **ADVANCED** course "DEK KVIN PASOJ" by W. Auld, with the textbook "PASOJ AL PLENA POSEDO" included \$22
A "must" for intending authors in Esperanto.

Order direct from: John Moore, 7 Pelican St., EMU PARK, QLD. 4702.

Make cheque or money order payable 'Australian Esperanto Association'

KOTIZOJ POR 1981

por individuaj membroj, kluboj kaj Federacioj: \$16
por Familianoj: \$4
Pensuloj kaj Plentempaj Studentoj pagas almenaŭ \$8 (aldonaj donacetoj bonvenaj)

WHO'S WHO IN AUSTRALIAN ESPERANTO

9. MARJORIE DUNCAN (nee Gray)

The girl sent FROM Coventry

Actually, Marjorie was lent, rather than sent. In 1938, she came to Sydney on loan — as an exchange teacher — but, to our great good fortune, she has been a permanent resident here for many years.

She had been teaching in a Church Hall in a Yorkshire school — 2 classes of over 10, with no partition, different teachers, different subjects. And there, sitting at a desk behind, sat the Headmaster, with a cane, skilled and ready to rule.

Marjorie gained a wealth of experience in our city and country schools and was now, after a year, ready to return home. On 1st Sept., 1939, she sailed to N.Z. en route to England. War was declared Sept. 3rd, so she was soon back in N.S.W., where she was promptly re-employed.

Early in 1942, Marjorie joined the Army. (She was already trained in maintenance of trucks, mapreading, signalling etc., having spent 12 months as one of 80-week-end volunteers.) The entire group of women enlisted together and were billeted in the Showground. There, they slept on straw in the horse stables. Blankets, no sheets. They took over Ambulance Transport from men bound for New Guinea.

Marjorie drove day and/or night in the city and country for 4 years. Her particular charge was a Chev. field ambulance — 12 men sitting or 4 stretcher cases. She was usually alone, but sometimes had a medical orderly. She met hospital ships, trains and planes. "They also serve, who only stand . . ." Marjorie stood by at anti-aircraft stations and also stood guard duty at Randwick H.Q., where, armed with a whistle she protected a fleet of ambulances.

In 1946 Marjorie, discharged from the Army, said goodbye to Archie Duncan and his family. They had befriended and virtually "adopted" her.

Back in England with her parents, but far from her birthplace Coventry and from her friends, Marjorie found herself at a "loose end". Bournemouth, whence her parents had moved, was a delightful resort, but it lacked some-

thing. That something was provided when she read in the local paper an article about a group of Esperantists travelling to Denmark for the Universal Congress. It proved an inspiration. In 5 months Marjorie had learned enough Esperanto to go with them and was immediately "hooked".

She formed a new group in Bournemouth. This became the nucleus for the LKK which arranged the 34th Universal Congress in 1949. Marjorie's special job was to organise hotel accommodation for the 1500 visitors, and help with the entertainment. In 1951 she was President of the LKK which organised the British Esperanto Congress in Bournemouth.

In 1946 she had returned to teaching, and by this time was instructing in 3 Esp. centres each week and attending a Congress in Europe every year.

1953 saw Archie Duncan on a visit to Bournemouth. He married Marjorie in Oct., and together they sailed for Australia. The next year she resumed teaching here — first at the Spastic Centre, and later (indeed, until her retirement) at the Far West Hospital School in Manly. This was Marjorie's forte and joy.

In 1959, urged on by Penny Ferguson and several Sydney Club members, Marjorie organised a public meeting at Manly Evening College. An Esp. class was begun and in 1961 the Manly Esperanto Club was formed. The Club (in which she is not only a foundation member but also an Honorary Life Member) has persisted ever since. Her brainchild is now a robust adult!

Marjorie helped organise the National Congress in Manly in 1968 and the Post Congress in '76. She also, as well as being Assistant Minister for Entertainment in the '80 Congress, organised, arranged and led the highly successful 1980 Post Congress in Manly.

Marjorie has always shown a flair for organisation, for quiet, yet firm and determined control. This, plus her charm of manner, and her ability to "keep on keeping on" have made her a most acceptable import from Britain.

—ARTHUR COCKING.

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscriptions to A.E.A. \$16
(Individual, Club & Federation)
Additional Family Member \$4
Pensioners & Full-time Students
pay a minimum of \$8.



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.
Prezidanto: R. L. HARRY, AC, CBE, 8 Tennyson Crescent, Forrest, A.C.T., 2603
Sekretario: S-ro F. J. FALLU, 10 Sumersett Avenue, Oakleigh South, Vic., 3167
A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. ELLIOTT, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036.
Kasisto: S-ino I. FALLU, 10 Sumersett Avenue, Oakleigh South, Vic., 3167
Korespondaj Kursoj: S-ro J. Moore 7 Pelican Street, Emu Park, Queensland, 4702

N-ro 187 (267)

MELBOURNE

Aprilo-Majo, 1981

1981 — INTERNACIA JARO DE HANDIKAPULOJ

Norberto Saletti — Bologna (Italio)

Dum sia 2433-a sesio, okazinta en 1975, la Asembleo de Unuigintaj Nacioj aprobis dokumenton, nome "Deklaro pri la rajtoj de la handikapuloj". En ĝi legeblas beleagaj difinoj pri aprioraj rajtoj je homa digno, pri protekto kontraŭ ia ajn diskriminacio, ktp. Tamen, la plej grava afero estas ĝuste la ekzisto de tiu impona, belega deklaracio. Fakte, se, kiel verŝajnas, ĉiuj landoj konsentas pri la forigo de ĉia ajn diskriminacio, kial oni decidis, ke 1981 estu la "jaro de la handikapuloj"?

Ĉiuj homoj amas infanojn, sed ja bezonis jaron de la infano por eltrovi, ke en pluraj landopartoj infanojn oni taksas kiel varon; Maŭ Zedong diris, ke virinoj estas la alia flanko de la ĉielo, sed oni bezonis jaron de la virino por eltrovi teruran subpremon fare de la viroj kontraŭ la virinoj. Do, estu bona-vena la jaro de la handikapuloj, se pere de ĝi la homaro eltrovos, ke en la 20-a jarcento oni taksas homojn kiel nesamrajtan klason.

Kerna punkto, en la difino de handikapuloj, estas la difino de . . . "normala": kelkaj arogas al si la rajton difini kiuj estas la normalaj homoj, kaj metas en iun moralan geton la aliajn. Fakte, ja ekzistas diskriminacio kontraŭ handikapuloj sed ofte ĝi ne estas tuj evidenta: ekzemple, la fakto, ke en pluraj landoj la publikaj palacoj estas

alireblaj nur de homoj, kiuj povas marŝi, pro la ĉeesto de tro da ŝtupoj aŭ la tro malgrandaj liftoj, kiuj ambaŭ malebligas, ke rulseĝuloj vivu civilan vivon. Tio estas kaŝita diskriminacio. Ankaŭ je la nivelo de jargonoj, ofte estas uzataj ofendaj vortoj, kiuj, medicine, estas terminoj por malsanoj: ekz. "kreteno", "idioto" ktp. En la literaturo, precipe en tiu de la pasinta jarcento, ofte la krimuloj estis ĝibuloj, lamuloj, blinduloj. Eĉ aliajn malsanojn ili havis, malsanojn, kiujn intertempe oni nomas handikapoj.

Por kio, do, konkrete utilos la "Jaro de la Handikapuloj"? Espereble ĝi ne fariĝos okazo por retoriki pri tiuj niaj malbonŝancaj amikoj, kiuj, pro fizikaj aŭ mensaj kaŭzoj ne vivas kiel ni. Mi esperas, ke ĝi fariĝos okazo por konkreta plibonigo de la vivkondiĉoj de ne malgranda parto de la homaro, kiu vivas malfacile pro objektivaj malfacilaĵoj absolute sendependaj de propra volo (neniun mi konas, kiu mem elektis sian handikapon), sed ĉefe pro la neatento de la alia parto de la homaro, kiu sin iluzias, ke ĉio jam estas en ordo, kaj, ke jam ekzistas leĝoj kiuj helpas la malbonŝancajn gefratojn ktp.

Ni ja scias, ke en kelkaj landoj la plejparto de la enloĝantoj suferas je ia handikapo, ĉefe pro la nesanaĵ vivkondiĉoj, malbona nutrado, ofte ĉefa

kaŭzo de handikapo, superstiĉaj pensoj en kelkaj landoj, laŭ kiuj infanoj nas-kigintaj kun videblaj fizikaj handikapo-estis filoj de l' diablo aŭ pruvo de pekoj sennomaj: troaj estas la ekzemploj de handikapo kaj handikapuloj, montrataj en cirkoj, kiel strangaj nehomaj estuloj: se la Jaro de la Handikapuloj liberigos nin je tiaj stultajoj, ĝi estu bonvena.

Iom retorike, eblas aserti, ke la Jaro de la Handikapuloj estas bonega, por ke la homaro, finfine kaj entute, forigu por ĉiam diskriminacion kontraŭ homoj, kies sola "kulpulo" estas ne povi supervenki ŝtuparojn, aŭ kompreni rapide divenludon.

Kia estas la utileco de la Internacia Lingvo Esperanto en tiu kadro? Mia-takse, ĝi povas utili por disponigi al la registaroj amason da informoj, aliel malfacile akireblaj, por unuigi la

klopodojn, kiujn oni faras en pluraj mondpartoj por solvi (aŭ klopodi solvi) la problemon de la reenociigo de la handikapuloj. Sed, ĉu la socio estas jam preta por akcepti tiujn homojn kiel samnivelulojn? Jen la kerna punkto: kaj ĝuste por tio utilos la Jaro de la Handikapuloj: por ke neniam plu homoj sin turnu kiam ili vidas handikapulojn, surstrate, por ke neniam plu ili fingromontru lamulojn aŭ ĝibulojn. Jaro de la Handikapuloj estas jaro de konvinkiĝo ne nur por la registaroj, por ke ili pretigu leĝojn helpe al la handikapuloj, sed ĉefe por la popoloj, por ke ili akceptu senkondiĉe vivi flankalfanke kun tiu ne tro malgranda minoritato: la handikapulo.

(La aŭtoro, prezidanto de Itala E-ista Junularo, etas mem handikapulo, pro poliomiĵelito kiam li estis du monatojn aĝa).

ĈU VI ĤODAS EN ESPERANTO ...

Bernard Golden

Legu la sekvajn frazojn.

1. La hina monarĥo veladis tra la lago en sia jaĥto.
2. Tiu hemiisto okupiĝas pri la uzo de ĥromo en la nuntempa tehnologio.
3. Ĥarakteriza trajto de la nuntempa arĥitekturo estas la ferbetona konstruata tehniko.

Tiuj frazoj aspektas iom strange pro la troa ofteco de la litero ĥo. Kvankam ĉiu vorto literita per ĝi estis uzata fare de esperantistoj, kelkaj eĉ de d-ro Zamenhof mem, dum la evoluado de nia lingvo, la ĥoado iom post iom reduktiĝis kaj estis anstataŭigita per la koado aŭ per alia ŝanĝo en la formo de la ĥo-vorto. Tamen, ankoraŭ estas kelkaj esperantistoj, kiuj obstine kaj obsedite rifuzas konstati tiun tendencon, kaj preferas superŝuti siajn tekstojn per ĉapelitaj ĥo-literoj. La rezultanta ĥoado odoras je arkaikeco. Jen kelkaj ekzemploj.

Kvankam la gentnomo "ĥino" estis uzata de Zamenhof, antaŭlonge "ĉino" estis substituata al ĝi, kaj la koncerna popolo mem uzas tiun formon hodiaŭ. Malgraŭ tio, **Scienca Revuo** ĝis antaŭ nelonge insistis pri la formo "ĥino". Eĉ kam Zamenhof elektis ko-formon de vorto, ekzemple "kromo", la metalo, kelkaj lingvaj superpuristoj opinias, ke estas pli ĝuste skribi "ĥromo", kaj tiu formo aperas en **Poŝatlaso de la Mondo** eldonita en 1971! Eĉ pli bizara vorto

estas "ĥarakterizi", kiun oni povas legi en artikolo verkita de Josef Kavka, la ĉefredaktoro de **Scienca Revuo**. En 1888 parenca vorto, "ĥaraktero", aperis en rakonto, kiun Zamenhof tradukis. Sed jam en 1889 li registris ĝin kiel "karaktero" en sia plena rusa-Esperanta vortaro. Pro tio estas neniel pravigebla la nuna uzo de "ĥarakterizi".

Kiu serĉas ekspertan opinion pri tiu ĉi demando konsultu la 10-an oficialan bultenon de la Akademio de Esperanto (**Aktoj II**), eldonitan en 1975. En tiu aŭtoritata verko estas sankciita — eĉ oficialigita — la paralela uzado de ĥokaj ko-vortoj. La moderna prefero al koado estas spegulita ankaŭ en **Plena Ilustrita Vortaro** (1970), kiu plurloke resendas legantojn serĉantajn ĥo-vortojn al formoj literitaj per ko: tehniko = tekniko, hemio = kemio, arĥitekturo = arkitekturo, ĥaribdo = Karibda.

Kiu ankoraŭ ne estas konvinkita pri la arkaikeco de ĥo-vortoj, legu jenajn rimarkojn cititajn el verko de la aŭtoro de Esperanto, Zamenhof skribis, ke "ĥ" estas litero "tre malofte renkontata kaj baldaŭ espereble tute malaperonta ... Pritraktante reformojn en Esperanto, li diris, ke "la sono "ĥ" estos tute elĉetata", ĉar ĝi estas "por tre multaj personoj tro malfacile elparolebla ...". Zamenhof plue konsilis, ke "en ĉiuj nove enkondukotaj vortoj oni devas

eviti la sonon "h" kaj uzi anstataŭ ĝi la sonon "k".

La ĉiam malpli ofta uzo de ĥo estas eble la sola daŭre evoluanta ŝanĝo efikanta sur la ortografion de Esperanto. La esperantologo Ernest Drezen rimarkis tion antaŭ duonjarcento, kiam "monarĥo" kaj "psihologio" jam estis anstataŭigitaj per "monarĥo" kaj "psikologio". Antaŭ pli ol 40 jaroj, la bibliografo Petro Stojan prognozis la formalaperon de ĥo en la periodo 1950-1960. Estas evidente, ke la profetajo de Stojan estis iom antaŭtempa. Ĥo ankoraŭ troviĝas en la Esperanta alfabeto, kvankam ĝi estas la plej malofte uzata litero.

Analizantoj de la Esperanta fonetiko emfazas, ke la kadukiĝo de ĥo rezultas de ĝia malfacila prononco. Couturat kaj Leau en 1910 argumentis, ke ĥo estas malfacile prononcebla por ĉiuj romanidaj popoloj (krom la hispanoj) kaj pro tio ĝi estas kondamnita malaperi. Edmond Privat apogis la opinion de la du eminentaj Idistoj.

"La litero ĥ pli kaj pli malaperis: "teĥnika fariĝis **teknika**, ĥemio — **kemio**, ĥina — **ĉina** ktp. La kaŭzo de tiuj evolutoj estis plej ofte la emo al pli facila elparolo. La komenca lingvo estis ĉefe skriba. Poste la parola uzado regis, kiel en vivanta lingvo, kaj ĝi nature influis laŭ konataj leĝoj." (Historio de la Lingvo Esperanto, 1927, p. 188)

Kion vi opinias? Ĉu oni ankoraŭ hoados en Esperanto en 1987 okaze de la centjara datreveno de ĝia estiĝo?

LA MALKURAGULO

Dum mia migrado ĉirkaŭ la mondo mi atingis iutage la japanan porcelan-urbon Arita, kaj vizitis la solan esperantiston, D-ro K, kies adreson mi jam delonge posedis.

"Ĉu mi havas la honoron saluti sinjoron K.", mi demandis, atinginte la malfacile troveblan domon. "Jes", respondis la domestro. "Ho, mi tre ĝojas renkonti ankaŭ ĉi tie esperantiston" Mi donis la manon al li. "Jes", li respondis kaj premis forte la manon. "Ĉu vi estas la sola esperantisto aŭ ĉu ekzistas Esperanto-grupo en Arita?", mi demandis. "Jes", li respondis. "Mi supozis, ke ne ekzistas hotelo en via urbeto Ĉu vi povas noktigi min en via domo?" "Jes" estis la respondo. "Ĉu vi komprenas min bone aŭ ne?" "Jes", li respondis. "Ĉu vi povas havigi iom da manĉaĵo por mi?" "Jes", estis la respondo, kaj ĉiam nur "jes" kaj "jes". Mi povis demandi kion mi volis, li

ĉiam respondis per "jes". Fine la doktoro alvokis angleparolantan instruiston. Ankaŭ li respondis al ĉiuj demandoj nur per "jes".

Finfine mi mem preparis mian vesperrangon, aranĝis liton kaj tranĉis en la domo de la doktoro. Dum la nokto mi aŭdis pezajn paŝojn super mi kaj longdaŭran murmuradon. Malgraŭ tio mi ekdormis kaj sonĝis tiel bone kiel eble.

La sekvantan tagon la doktoro salutis min, tenante skribitan alparoladon en la mano. Legante li komencis: "Kara kaj estimata samideano! Hieraŭ vespere mi estis tre malĝentila, kaj mi treege petas vian pardonon, ĉar mi neniam ekzercis paroli Esperanton. Mi estas —, mi estas, bonvolu legi mem!" Kaj rapide li transdonis al mi la paperon, sur kiun li skribis dumnokte, kaj mi miris pri la bonstilaj kaj rimarkindaj esprimoj. Per tio mi nun vidis, ke mia kurioza gastiganto povas sin esprimi tre bone per Esperanto. Li eĉ verkis konatan Esperanto-libron, tamen li ne kuraĝis paroli. Poste mi interparolis kun li kiel infano kaj depost kelkaj horoj li parolis tiel bone kaj flue, ke mi preskaŭ ne povis sekvi lin. —Mondvojaĝinto Edmund Zscheile.

En novembro 1980, la konata dana Esperanto-verkisto Poul Thorsen vizitis Aŭstralion kaj plurloke kontaktis esperantistojn. Poste, el Danlando, li sendis al ni la jenan poemon:

RANDE DE LA MONDO

el Geopoezio de Poul Thorsen

Mi vidis ilin —

Sub ŝpar-ombraj eŭkaliptoj

ili emerĝis,

la unuaj grupetoj de buklo-haraj

aborigenoj.

Blackfellows (1)

Nigraj, sed ne negroj,

aŭstralaj, sed ĉu aŭstralianoj?

Tolerataj, sed ne ŝatataj.

Apatiaj

aŭ toksitaj,

sed ne pli ol montri koleron,

vome fronti simpatian

* * * * *

Mi trovis ilin —

rande de la mondo,

la aŭtentaj posedantoj

de **Terra Australis** (2)

sen posedaĵo

krom minimuma

publika poŝmono

rapide diboĉbla, diboĉita.

* * * * *

Mi flaris ilin —
 el rezervejoj,
 el dezertoj kaj savanoj,
 el densaj urbegoj,
 ĉifonaj, nudpiedaj
 sur dika "kultur-tavolo"
 de bier-ladujoj kaj plasto.
 Perditaĵ filoj
 de prapopolo
 Perditaĵ radikoj,
 perdata kulturo,
 perdota lingvo.

Mimi (3) perfidis ilin.
Dreamtime (4) delonge ĉesis.

* * * * *
 Mi kompatis ilin —
 Sed mirakle la resto plimultiĝas
 Spite al venereoj,
 spite al arseniko
 en faruno de pioniroj,
 spite al lev-gruoj kaj drilegoj
 vundante ilian teron.
 Spite al A-bomba provo
 en ilia dezerto.
 Jes ja, oni avertis,
 ĵurnale, radie,
 sed kiu ĉasisto
 legas, aŭskultas?
 "Nur" kelkcent pereis.

* * * * *
 Mi respektis ilin —
 ili rikoltas grenon kaj fruktojn,
 ŝoforas, kuiras, paŝtas,
 lernas, instruas,
 integriĝis, miksiĝas,
 ekzorgas pri propraj aferoj.
 Nuntempo defias,
 pli kaj pli multaj defias la nuntempon.

* * * * *
 Mi admiris ilin —
 kiam arte pentris arboŝelojn.
 Sed pleje en iliaj sanktejoj,
 galerioj sub izolitaj rokoj,
 kavoj cinabraj kun dekoro
 rita "rentgena", magia
 de miljara tradicio.
 Tie svage, svage, tamen, tamen
 vivadas **Mimi** —
 apokalipso en okro, kalko, fulgo,
 suko kaj sango.
 Tie la perditoj
 akiras novan identecon
 el sia prakulturo.

(Alice Springs en novembro 1980)

- * * * * *
 (1) Nigruloj
 (2) Tero Suda — Aŭstralio.
 (3) Spirito loĝanta en sanktaj kavoj.
 (4) Sonĝ-epoko, t.e. pratempo, kiam
 homoj, bestoj, plantoj estis
 harmonia Unuo.

AŬSTRALIA= =KRONIKO

● **PERTH:** La unuan kunvenon por 1981, je 11/2 partoprenis 28 ĉeestantoj, inkluzive 2 vizitantojn el Anglujo (F-ino Spink kaj S-ino Sandford).

D-ro Einihovici legis novaĵojn el "Heroldo" kaj S-ino R. McGrath pri Nov-Zelando el "Esperanto". S-ino I. Einihovici rakontis pri la Somerlernejo en Toowoomba. Sekvis ludoj kaj fine la prezidanto dividis la ĉeestantojn en malgrandajn grupojn por diskuti diversajn temojn.

Dimanĉe, 22/2, okazis pikniko en la hejmo de S-ino Pianta, apud bela lago "Jackadder". Dudek membroj partoprenis kaj ĝuis multe da babilado kaj lotieron por helpi la financon de la Ligo. Vera Payne gajnis horloĝon akvo- kaj rust-imunan, kondiĉe ke ŝi ne eniros akvon!

● **ADELAIDE:** La grupo kunvenis je 16/3 en la Universitato. Ni povis bonvenigi esperantist-inon el Anglujo, s-ino Koniczny. Post diskuto de kelkaj gravaj aferoj, ni dediĉis la vesperon al agrabla konversacio. — Bob Felby.

● **MELBOURNE:** Je 2/3 Henry Rosengren priskribis sian 3-an eskaprovon kiel militkaptito. Kun helpo de "Eskapkomitato" li sukcesis per tunelo forlasi la kaptitejon kaj atingi stacidomon ĉe Ratibor. Per mallongaj etapoj, li celis Stettinon ĉe la Balta Maro, sed oni arestis lin post eble triono de la vojo. Sekvis "Gestapo"-enketo, kaj li troviĝis denove en malliberejo.

S-ro H. Beechey, 23/3, parolis pri la diversaj sistemoj de "bio-ritmoj" kaj la procedo kontroli aŭ ŝanĝi ilin eĉ helpe de komputera aparato. Ĉe la amuzvespero de 30/3, Ken Linton montris d'apozitivojn pri la Granda Kanjono, Nevado, Arizono kaj la Stato Virginio, inklude la hejmon de sia filino kaj la bienon de George Washington.

Je 6/4 ni denove aŭskultis al Henry Rosengren, kiu rakontis pri translokiĝo, kiel volontulo, al nova kaptitejo en Silezio, por povi labori ekstere kaj tiel pli facile efektiviĝi ankoraŭ unu eskaprovon. Li ankaŭ priskribis laboron en fabriko por produkti sukron el betoj.

● **SYDNEY:** Tom Elliott, 23/2, legis pri "Kiel elŝovi la nukon sen perdi tion". Li rakontis ke, kiel elektrona meĥanikisto, li ofte devis funk-

ĉiuj aparaton pri kiu li sciis nenion. Generale, li diskutis la aparaton kun pli sperta kolego, sen malkaŝi ke li serĉas teknikajn detalojn. Li konfesis ke, foje, li malsukcesis. Tamen, eĉ kiam li agis divene, li plejparte sukcesis.

Jim Harwood, 2/3, prelegis per lum-bildoj pri Japanio. Li montris kiel Japanio progresis dum 10 jaroj, en kiuj li trifojie vizitis la landon. Margare Chaldecott, 9/3, gvidis ludojn, kiuj plejparte konsistis el verko de rakontaj laŭ la unua frazo. Ŝi elektis frazojn el "Paŝoj al Plena Posedo". Pluraj ludantoj rakontis tre bonajn historiojn; aliaj ne tiel sukcesis.

Ce la urbdomo de Chatswood ni organizis ekspozicion kiel parton de la ekspozicio por la "Junulara Semajno" de la "Willoughby"-Município. Ĝi kreis multe da intereso; sed ĝis nun ni ne povas taksii la sukceson.

La klaso ĉe la gimnazio en Hurstville, gvidata de Betty Hart, daŭre allogas multajn infanojn. La "Macquarie University School of Modern Languages" petis nin raportoj pri niaj klasoj, kaj la "Springwood" — Filio de la "Kampara Virina Asocio" petis nin viziti ĝin por diskuti organizon de klaso tie.

—REVANTO.

● **MANLY:** La tri klasoj kaj la Konversacia Rondo bone progresas ĉe la Vespera Lernejo kun sufiĉe granda nombro da ĉeestantoj.

Dum la semajnfino 21/2 la loka FM Radio dissendis programon, en kiu membroj de la klubo prezentis sonbendojn de dulingvaj skeĉoj. La antaŭan semajnon aperis artikolo en la loka ĵurnalo pri tiu programo kaj ties celo. — EUNICE GRAHAM.

EL LA FEDERACIO

● **N.S.K.:** Ni petis al instruistoj detalojn pri la diversaj kursoj. Jen resumo: Klasoj okazas en kluboj, en grupoj de "olduloj" kaj en 2 ŝtataj lernejoj (Dorrigo High, Hurstville Primary). Kelkaj grupoj ne respondis.

La komencantoj uzis la libron "Practical Course", "Esperanto Teacher" kaj "Step by Step". La progresantoj uzis "Step by Step", "Esperanto Teacher", "Amuzaj Dialogoj", la legolibron "Virineto en Bluo". La sola altgrada grupo (en Manly) ne uzas libron, sed konversadas laŭ aktualaj temoj.

Ne ĉiu ŝtudento restis dum la tuta jaro, sed la procento, kiu daŭrigis la kursojn estas kuraĝigea. Notinda estas la rimarkoj de J. Campbell (Dorrigo High School): "Aprobata studo por

Jaroj 11 kaj 12 Aprobo por 1981 kaj 1982 donita. Dum lerneja tempo, kiel parto de aprobitaj studoj, trifojie semajne". — M. CHALDECOTT.

● **VIKTORIO:** La Ĝenerala Kunveno de la Federacio okazis je 6/2/81 en la Melburna Esperanto-Domo. Nur 14 membroj ĉeestis. La kasistino (F-ino E. Trainor) povis raporti pluson de \$86.45 por 1980. La ĝisnuna prezidanto, S-ro Don Pescod, pro transloĝiĝo al la kamparo, ne kandidatis kaj la kunveno elektis la jenan estraron: Prez: David Rockell; Vic-Prez: R. Reed; Sekretario: Barbara Podmore; Kasisto: Eva Trainor; Bulten-Redaktoro: Herbert Koppel.

La unua aranĝo por 1981 estis "Ĉe-hejma Posttagmezo" en la domo de Barbara Podmore. 18 membroj de ĉiuj 4 Melburnaj kluboj ĉeestis.

DANKON !

Karaj Gesamideanoj,

Mi volas esprimi miajn korajn dankojn al ĉiuj geesperantistoj kaj kluboj, kiuj helpis al mi ĉeesti la 3-an Someran Lernejon de Esperanto ĉe Downlands College, Toowoomba

La Literaturan Kurson mi trovis interesa kaj ĝinda kaj ĝi stimulis mian intereson pri Esperanto-poezio.

Mi ankaŭ ĝuis la okazon renkonti multajn esperantistojn, kiujn mi unue renkontis ĉe la Sidneja Kongreso kaj konatigi kun aliaj.

Mi denove dankas ĉiujn kaj penas meriti vian fidon je mi.

Sincere via,

Jacqueline Walker (Marmion, W.A.)

NOVAĴOJ EL USONO

La kongreso de la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko okazos de la 17-a ĝis la 21-a de julio, 1981, en Nov-Jorko. Eksterlandaj esperantistoj estas invitataj partopreni la kongreson survoje al Brazilio. Pluaj informoj estas riceveblaj de ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono.

La Esperanto-Klubo de "Chicago" havas membron, kiu estas taksi-ŝoforo, Bill Breisch (tel: 637 4758). Liaj unuaj Esperanto-pasaĝeroj estis Yoshimi Umeda kaj Nobuyuki Syozi, 2 komercistoj el Tokyo.

S-ano Tikara Watanabe de Nagasaki, Japanio, prelegis kun d'apozitivoj en la E-Societo de San Francisko. Li rakontis pri la historio de Nagasaki ekde la vizito de la unuaj portugaliaj ŝipoj, pri la unuaj kristanoj, la impordato de okcidenta kulturo fare de nederland-

anoj kaj li montris kelkajn diapozitivajn pri la atombomba atako en 1945.

La 2-a Intermontara Esperanto-Konferenco okazis ĉe "Brigham Young" — Universitato en Provo, Utah. D-ro Humphrey Tonkin parolis pri "Esperanto Centjara: La Vojo Irenda". Dimanĉe konferencanoj ĉeestis koncerton de la Mormona Ĥoro en Salt Lake City. El la konferenco venis 2 proponoj: Propono por oficiala somera E-kurso ĉe la "Brigham Young"-Universitato kaj propono al la Mormona eklezio en Salt Lake City, ke misiistoj uzu Esperanton speciale en komunistaj landoj.

La konata svisa esperantisto, Mag. Claude Piron, de la Universitato de Genevo, gvidos ĉi-jare la Esperanto-kursojn ĉe la Stata Universitato de San Francisko, de la 29-a de junio ĝis la 17-a de julio, 1981.

Estas interese kompari la membrotitizojn de la E-Ligo por Norda Ameriko kun tiuj de la Aŭstralia E-Asocio:

Individua membro \$20 (ĉe ni \$16)
 Familia membreco \$30 (ĉe ni \$20)
 Studentoj \$10 (ĉe ni \$8)
 Pensiuloj \$12 (ĉe ni \$8)

ESPERANTO EN LA GAZETARO

La fakorgano de la Svisa ĵurnalista Federacio "Journalisten-Zietung" ("Le Journal des Journalistes") publikigis en sia oktobra eldono ampleksan artikolon kun la titolo "Gazetaro, por kiu ne ekzistas lingvaj limoj". La artikolon verkis la konata svisa ĵurnalisto/esperantisto D-ro Arthur Baur. La aŭtoro priskribas la ekeston de la esperanta gazetaro, la disvastiĝon antaŭ la unua mondmilito kaj la nunan staton kun la distingo inter landaj organoj kaj internaciaj gazetoj aŭ revuoj. (SER)

"Tre interesaj mi trovis en "Austrian Esperantist" la artikolojn de precipe Auld, Zscheile, Golden!" (D-ro Karl Beckmann, estro de Esperanto-Redackio de Aŭstria Radio)

Aŭstralia Sekcio de Skolta Esperanto-Ligo

Nova aŭstralia sekcio de S.E.L. jam komenciĝis, modeste, kun 6 membroj (Kvinslando 2, N.S.K. 2, Vik, 2).

Ĉar preskaŭ ĉiuj estas novuloj al E-o, ili ricevas eksterlandajn novaĵleterojn en anglalingva traduko. Tamen ĉiuj progresas (kelkaj korespondkurse) kaj almenaŭ unu Skoltingestrino estas preskaŭ preta instrui Esperanton al sia trupo (30 knabinoj). Ŝi jam postulas,

ke ĉiu nova skoltino faru la Skoltinan Promeson ankaŭ en Esperanto.

La Aŭstralia kotizo estas \$5, plus \$1 por bela eta Skolta Esperanto-Insigno (nur por anoj). Petu informon de: John Moore (provizora aŭstralia repr. de S.E.L.), 7 Pelican St., Emu Park, QLD, 4702.

Averto

En strato de irlanda urbeto oni povas vidi tabulon kun la sekvanta averto:

"Atentu! Lernejo! Ne surveturu la infanojn! Atendu ĝis kiam venos la instruisto!"

A.E.A. PREZIDANTO EN MELBURNO

Je 25-a kaj 26-a de marto, 1981, S-ro Ralph Harry vizitis Melburnon, kie li estis gasto de Ges-roj G. Tuman.

Je 26/3 li estis intervjuita pri Esperanto ĉe la ABC Radio-Stacio 3LO, en la programo "Frontline". Dum la posttagmezo li prezidis AEA-estrarkunvidon en la Esperanto-Domo kaj vespere li alparolis bone vizititan kunvenon de la "Asocio por la Unuiĝintaj Nacioj," kiun li informis pri la ĝisnunaj atingoj de la Esperanto-movado.

SKOLTINOJ

En la nacia skoltina revuo "Guiding in Australia" ekde marto 1981 aperadas lecionetoj pri Esperanto, po unu ĉiumonate. Kontribuis ilin John Moore de la Korespond-Kursa Servo de A.E.A. (Reklameto pri la Servo ankaŭ aperas).

Jim kaj Jennifer Dimo

kies diversflankan muzikadon ni plurfoje ĝuis ĉe niaj pli gravaj kunvenoj, nuntempe propagandas Esperanton en Eŭropo. Kune kun du novaj esperantistoj el Adelaide, ili flugis al Londono, kie ili gastis kelkajn tagojn ĉe la Esperanto-familio Buttinger. Per "minibuso" ili komencis sian vojaĝon. En Windsor, apud Londono, Jim prelegis je 15-a de marto, en Plymouth je 22-a de marto kaj en la tre fama feria loko Paignton je 24-a de marto. Ili forlasis Anglujojn kaj veturis al Hispanujo. Je 2-a de aprilo Jim prelegis en la Esperanto-klubo de Santander kaj je le 8-a de aprilo okazis 2 prelegoj en Barcelono: la unua en la Esperanto-klubo de Unesko kaj la dua por la Esperanto-klubo de Anarkistoj. Tiu urbo havas tre vigan Esperanto-movadon kaj kvar pliaj prelegoj estas planitaj.

23-a AŬSTRALIA ESPERANTO-KONGRESO

2-9 Jan., 1982 — Adelaide, S.A.

La kongreso okazos en la "Lincoln College", tre bele situita kolegio en Norda Adelejo, ne tro malproksima de la urbcentro. Ĉiuj kongresanoj povos loĝi en komfortaj ĉambroj en la Kolegio kaj la kosto por la ĉambro kaj ĉiuj manĝoj estos proks. \$20 tage.

Kongres-Kotizo: Antaŭ 30-6-1981: \$15.00; Pensiuloj, junuloj: \$10.00
Ekde 1-7-1981: \$20.00; Pensiuloj, junuloj: \$15.00.

Sendu vian kongres-kotizon al la kasistino **S-ino B. Randles, 35 Roslind Street, Kensington Gardens, S.A. 5068.** Se vi deziras loĝi en la Kolegio, aldonu \$10 kiel deponon por loĝejo. Se vi deziros ricevi kvitancon aldonu afrankitan koverton.

5-a Listo de Aliĝintoj

- 36. Jack Hawks, Perth
- 37. Annie Spencer, Brisbane
- 38. Joan Green, Coal Point, N.S.W.
- 39. Ann Hearn, Melbourne
- 40. Tom Elliott, Sydney
- 41. Mavis Elliott, Sydney
- 42. Wreford Chandler, Sydney
- 43. Olive Larter, Perth
- 44. Prof. R. G. Robertson, Sydney
- 45. Margaret Robertson, Sydney

Lauĉetata distribuo: N.S.K. 13; Viktorio 10; Okcidenta Aŭstralio 8; Suda Aŭstralio 8; Kvinlando 5; A.C.T. 1.

Eksterlandaj Esperantistoj NE pagos kongres-kotizon, sed vi devas rezervi vian loĝejon per pago de \$10.

**LA "A.E."
SUBTEN — FONDUZO**

Antaŭe raportita	\$1116.10
S-ro E. Hearne, Melbourne,	
2-a donaco	5.50
S-ino L. Hearne, Melbourne	5.50
Esperanto Advancement	
Co-op., Melbourne,.	
2-a donaco	10.00
S-ino Fay Koppel, Mel-	
bourne, 2-a donaco	3.00
S-ro W. Jaeger, Saratoga,	
NSW, 2-a donaco	100.00
S-ino L. C. Matasin, Syd-	
ney, 2-a donaco	4.00
S-ino J. Lehane, Toowoomba	
2-a donaco	4.00
S-ro H. G. Onn, Adelaide,	
2-a donaco	2.00
	<hr/>
	\$1250.10

**FONDUSO POR
ESPERANTO-STIPENDIO**

Antaŭe raportita	\$1264
S-ro Don Rogers, Melbourne	20
	<hr/>
	\$1284

La Deklaracio de Manila

La Monda Turisma Konferenco, kunvokita de la Organizo Monda por Turismo rekomendis, ke estu farataj klopodoj por pligrandigi la konscion pri turismo, por tiamaniere faciligi kaj helpi la komunikadon inter la turistoj, la loĝantoj en la vizitataj lokoj kaj la turisma oficistaro; ĝi substrekis la gravecon de la scipovo de lingvoj, precipe de tiuj kun universala destino, kiel Esperanto.

Jen grava deklaracio favore al la Internacia Lingvo, kiun la landaj asocioj de U.E.A. devas energie subteni, por ke U.E.A. povas plani pliajn paŝojn por la venonta Turisma Konferenco, kiu verŝajne okazos en 1982 en Meksikio.

"PAŜOJ AL PLENA POSEDO"

La perfekta lernolibro de William Auld ĵus reaparis en sia kvara eldono. Ĝi estas eble la plej vendata Esperanto-libro. La tri antaŭaj eldonoj, en suma kvanto de 19.200 ekzempleroj, elvendigis en la lastaj 12 jaroj. En 230 paĝoj la libro instruas en 30 lecionoj, kun entute 180 lingvaj ekzercoj. Ĉiu leciono enhavas, literaturajn de la plej bonaj E-stilistoj, de Zamenhof ĝis Kalocsay kaj Szilagy. Mendu ĉe la A.E.A. Libro-Servo.



NOVAJ LIBROJ

Libro de Romanoj — Vilmos Benczik, 230 b	\$8.20
Enkonduko en la Originalan Literaturon de E. —W. Auld, 101 b	\$6.45
Faraono (bildstriaro de la fama libro) 44 b	\$2.80
El Ĉina Poezio — trad. S. J. ZEE, 135 b	\$4.90
Aŭtuno en la Printempo — Ba Jin, 97 b	\$4.90
Tiel diris la Majstro, 218 b	\$5.50
Einstein, la enigmo de la matematiko, 130 b	\$4.50
Prediko sur la Monto — 148 b	\$4.00
A.E.A. Libroservo, P.O. Box 230	
Matrville, NSW., 2036	



WHO'S WHO IN AUSTRALIAN ESPERANTO

10 — IDYSS EINIHOVICI

Forceful and forthright. Zestful and zealous.

If, at any Esperanto Congress — in Australia or abroad — you see someone looking for power point for a tape recorder; if you saw her earlier button-holding the press or engaging a stranger in animated propaganda; if you see her sitting near the front in every session, you can be sure it is Idyss.

Idyss was born in Warsaw, not very far from the house in which Zamenhof lived. At school she learned French, German and Latin (which were compulsory) and Esperanto as an optional extra.

The latter was her first love. On Sundays and public holidays, the students went on picnics and marched through the streets with the green standard proudly waving, singing Esperanto songs en route.

After leaving school, she joined an Esperanto group. There were many such groups—all actively and enthusiastically writing articles and poems, translating and discussing.

Alas, World War I abruptly halted Esperanto. The death of Zamenhof in 1917 seemed to be its death blow. The funeral procession of the master — 2 black draped horses, daughter Lydia, chains of students walking hand in hand followed by labourers, intellectuals and poets, took several hours to pass. But Idyss is glad that, though she saw the master buried, she sees the movement living on!

When she was 19, Idyss went to Germany and France. She knew the languages but somehow they sounded different and confusing in their homelands. In 1930 she visited Israel. Again, language was a barrier even though Idyss spoke 6 of them. Four years later she visited her brother in Milan, where she met a certain doctor who was fluent in Italian and Russian. However, Idyss spoke neither. Again, a language barrier!

Yet, in spite of — perhaps because of — the difficulties, their romance proceeded apace, and 3 weeks later they were married. There were a few happy years in Italy and a daughter (to be multilingual, of course) was born. Now politics and racism reared their ugly heads. Mussolini and his Backshirts blacklisted the Einihovici

so they had to go.

To go where? Her husband's brother invited them to Tel Aviv. Another language problem. For other reasons, too, Israel didn't quite suit them. Again, where to go?

Fortunately, an instructor of her husband invited them to Australia. His name? Dr. Caldera. Rebirth. A promising future.

Alas, World War II supervened. The family moved to Corrigan, over 200 kms. from Perth. The people there were kind and helpful (the local Headmaster taught them English), but after Milan, Corrigan seemed like a desert, and of course linguistically there was nothing to interest Idyss. So, after the War, they returned to Perth where she had the inexpressible joy of hearing Esperanto again. The study of English recommenced, too, for life without language had posed unsolvable problems. Club participation recommenced. International correspondence proved a great joy, and now Idyss has a worldwide circle of friends.

She has fully proved, time and time again, that Esperanto is an "icebreaker" and friendmaker — in Paris where, speaking French she was a stranger in a strange land but speaking Esperanto she was "at home"; in Tokio; in Cape Town; in Brasilia in London where she met the Schilperoords the authors of "Jen Nia Mondo"; in Moscow where by chance she met Rytjkov the actor; in Budapest where she met the poet Kalocsay and in dozens of places throughout the world where she has met hundreds of interesting people.

Nowadays, Idyss's special interest is in children whom she gathers around her like a hen gathers her chickens. Schools and Youth Clubs are her delight. Several competent Esperantists owe their success to her early persistence.

If, at times, you feel inclined to wish that Idyss would dampen her flaming enthusiasm, remember that hot love is at times almost impossible to control. And Idyss is in love — vehemently and passionately in love, — not just with Esperanto, but with Esperantism, not just the language, but the ethos.

—ARTHUR COCKING.

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscriptions to A.E.A. \$16
(Individual, Club & Federation)
Additional Family Member \$4
Pensioners & Full-time Students
pay a minimum of \$8.



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.

Prezidanto: R. L. HARRY, AC, CBE, 8 Tennyson Crescent, Forrest, A.C.T., 2603

Sekretario: S-ro F. J. FALLU, 10 Sumersett Avenue, Oakleigh South, Vic., 3167

A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. ELLIOTT, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036.

Kasisto: S-ino I. FALLU, 10 Sumersett Avenue, Oakleigh South, Vic., 3167

Korespondaj Kursoj: S-ro J. Moore 7 Pelican Street, Emu Park, Queensland, 4702

N-ro 188 (268)
MELBOURNE
Junio, 1981

MIA BLBLIOTEKO

Laŭ "Konsultlibro pri Esperantaj Bibliotekoj kaj Muzeoj" de M. Gjivoje (1980), mia esperanta biblioteko estas unu el la tridek plej grandaj en la mondo. Aktuale mi havas 2,546 librojn kaj broŝurojn, kaj mi ankoraŭ ne scias kiom da jarkolektoj de revuoj kaj gazetoj — ĉar tiujn lastajn mi ne finkatalogis. Katalogon, ĉiujare ĝisdatigatan, de la libroj kaj broŝuroj mi faris en tri ekzempleroj: unu ĉe mi, unu ĉe UEA, kaj unu ĉe mia amiko Haupenthal en Sarlando (kiu havas eĉ pli imponan kaj valoran bibliotekon).

En 1946 mi havis nur du librojn: lernolibro kaj vortareto. Sed kiam mi aktivigis en la movado mia biblioteko rapide kreskis, pere de aĉetoj, donacoj, heredaĵoj, recenzoj, kaj — lastatempe — interŝanĝoj. Ĉar mi estas laŭnature kolektemulo, mi ĉion konservadis, ĉu aŭ ne ĝi interesis min; pri tio mi estas hodiaŭ tre dankema!

Kiam mi komencis akiri librojn, amiko Rossetti donacis al mi siajn duoblaĵojn, kaj duoblaĵojn vendis al mi je tre modera prezo s-ro Butler, el la BEA-biblioteko, k.a. Granda bonkorulo estis David Kennedy (siatempo vicprezidanto de UEA), kiu, okaze de sia edziĝo al esperantistino (kiu havis propran libraron), donacis al mi sian bibliotekon, kiun mi forportis el lia hejmo en du valizegoj, kiujn mi apenaŭ sukcesis treni. De s-ino Stewart kaj s-ro Baxter mi heredis kolektojn. Multaj aliaj bonaj samideanoj helpis min, ofte

kontraŭ tute simbolaj pagetoj. La plej lasta, kaj nete plej valora pro la inkunabloj, el tiaj donacoj estis la biblioteko de la Edinburga Societo, kiun oni transdonis al mi, kiam la Societo perdis sian sidejon. Mi esperas, ke ĉiam pravigis kaj pravigos la fido de la donacintoj pri mia taŭga uzado de tiuj trezoroj.

Preskaŭ seninterrompe ekde 1949 mi redaktas revuojn esperantajn, kaj ricevis librojn por recenzo. Ankaŭ aliaj redaktoroj petis de mi recenzojn, kaj kompreneble recenzinto ĉiam rajtas reteni la koncernan volumon. Tamen mi ankaŭ daŭre aĉetadas librojn, nuntempe ofte brokantajn.

Inter miaj libroj estas ankaŭ kelkaj raraj. De la Unua Libro mem mi havas nur la trian eldonon (1889) — sed kie en la mondo troviĝas hodiaŭ la unua eldono? La unuajn librojn por poloj kaj francoj (1887) mi havas. Kaj de la libro n-ro 5: "Dr. Esperanto's International Tongue . . . edited for Englishmen by J.St." (Warsaw, 1888), kiun Zamenhof ne disvendis pro la malboneco de la angla teksto, mi havas ekzempleron; laŭ miaj ĝisnunaj scioj, la sola alia ekzemplero en la mondo (?) troviĝas en la Brita Muzeo. Estas interese, ke s-ro Ludovikito (iam kompletigota plena verkaro de L. L. Zamenhof, kajero 1 bis "la inkunabloj de esperanto") deduktas, ke tiun anglan tekston verkis Zamenof mem.

Mi posedas unu el la solaj kvin ekzempleroj de "Izolo" de Kalocsay;

pere de mia ekzemplero UEA fotorepris la duan eldonon. Mi havas manuskripton de la epopeo "Urano-gedio" de Pastro Ricci — probable unu el tri. Mian ekzempleron donis al mi Pastro Carolfi: ĉu li scias jam tiam, ke li ne longe postvivos? Alian rarajon mi akiris de amiko Hauptenthal: "Katalogo de la Esperanto-gazetaro" de Jozefo Takacs (1934). Mia kolekto de la originalaj poemaroj en Esperanto estas preskaŭ, sed ankoraŭ ne tute, kompleta.

Ĉu estas mirinde, se mi, trempinte min dum 35 jaroj en tiun ĉi abundan, mirindan materialon, tro konscias pri la

vivanta kulturo kaj historio de nia lingvo?

Cetere, mi ĉiam serĉadas la multajn mankantajn erojn en mia kolekto. Ankaŭ la redaktoro de la "AE", s-ano Koppel, lastatempe bonkoris riĉigi mian kolekton de tradukajoj el la angla per donaco de "La Hundo Kruso." Dankon al li. Laŭ mi estas gravege, ke ni konservu, ĉiu laŭ sia kapablo, tiun materialon, kiu iom post iom, jaron post jaro, fariĝadas ĉiam pli malfacile kolektebla. Zorge kolektita biblioteko, ĉu ne, estas garantiaĵo pri nia estonteco, same kiel ĝi estas arĥivo de nia pasinteco. — Willam Auld.

Arthur Baur en "Svisa Radio Internacia"

LA SVISA GAZETARO

Svislando posedas laŭdire la plej multajn gazetojn proporcie al la nombro de enloĝantoj. 267 gazetoj servas al pli ol 6 milionoj da enloĝantoj. Tiu rekordo tamen havas ankaŭ negativan flankon, ĉar tre multaj el tiuj gazetoj estas maldikaj, havas malaltan eldon-nombromon kaj aperas eĉ ne ĉiutage.

La nombro de ĵurnaloj aperantaj ĉiutage (sen dimanĉo) estas 125, la totala eldonnombro de ĉiuj gazetoj kune estas 3 milionoj. La plej densan gazetaron havas la itallingva parto de Svislando, kie por kvarona miliono da enloĝantoj aperas 6 ĵurnaloj. En romanĉa lingvo aliflanke aperas por 50.000 personoj nur du gazetoj dufoje en la semajno. La granda nombro de gazetoj estas sekvo de diversaj faktoroj, ĉiue la plurlingveco, due la federalisma sistemo, kiu kaŭzas, ke la politika vivo evoluas precipe sur kantona nivelo, kaj trie la forta intereso de la publiko pri la lokaj aferoj, kiujn nur lokaj gazetoj povas sufiĉe detale pritrakti.

La plej multaj gazetoj ne disvastiĝas trans la kantonajn limojn; konsiderindaj esceptoj ekzistas nur en Zuriko kaj Genevo. Kontraŭe al aliaj landoj, kie la ĉefurbaj gazetoj ludas gvidan rolon kaj disvastiĝas sur nacia nivelo, nenio komparebla ekzistas en Svislando. Nur unu gazeto estas legata kaj studata en la tuta lando kaj eĉ en eksterlando. Tio estas la ducentjara "Neue Zuercher Zeitung", gazeto tre respektata en la tuta mondo pro siaj altnivelaj artikoloj pri politiko, kulturo kaj ekonomio. El la 123 425 ekzempleroj presataj ĉiutage 18 611 iras al eksterlando. Tutvisvan disvastiĝon havas ankaŭ la sola gazeto

de la tiel nomata bulvarda tipo: "Blick", kiu precipe raportas pri sensacioj kaj klaĉo.

La gazetoj ĝenerale estas tre seriozaj, eĉ ekstreme seriozaj. Ili ankaŭ rezignas pri grandaj literoj por la titoloj kaj uzas kolorojn ŝpareme aŭ tute ne. La svisoj kutimas aboni siajn gazetojn kaj ne aĉeti ilin sur la stratoj. La redaktoroj dediĉas tre multe da spaco al la internacia politiko, kiu kutime aperas jam sur la unua paĝo, sed ili ankaŭ traktas detale la ŝtatajn aferojn sur komunuma, kantona kaj federacia niveloj. Tio estas neceso pro la multaj voĉdonadoj kaj elektoj tipaj por Svislando. La libereco de la gazetaro estas konstitucie garantiita, kaj pro tio ne nur estas teoria afero sed praktike efektiva.

En la lasta jarcento preskaŭ ĉiu gazeto estis en ia maniero ligita al politika partio, dum hodiaŭ la plej multaj nomas sin neŭtralaj. Tio signifas, ke ili kutimas publikigi antaŭ voĉdonadoj kaj elektoj la starpunktojn de ĉiuj partioj aŭ grupoj. La publiko hodiaŭ preferas sendependajn gazetojn. Tion pruvas la fakto, ke malgraŭ la grandeco kaj grava influo de la socialdemokrata partio la gazetoj nomantaj sin socialdemokrataj fartas tre malbone kaj nur sukcesis vivteni sin per intima transkantaona kunlaborado. Ankaŭ la gazetoj subtenantaj la katolikan partion estas devigitaj formi tiajn ĉenojn.

Ĝenerale la kondiĉoj de ekzistado de la gazetoj fariĝis multe pli malfacilaj en la lastaj dudek jaroj, kaj pro tio multaj malaperis tute aŭ ĉavis sin per fuĝoj. La nombro de gazetoj en

1939 estis 404, el tiuj restis en 1976 ankoraŭ 267, kaj el tiuj 52 havas nur propran titolon, dum la enhavo estas identa kun tiu de alia gazeto. La enspezoj de la gazetoj dependas plejparte de la anoncoj, ĉar la abontarifoj estas tro malaltaj. La anoncoj liveras ĝis tri

kvaronojn de la enspezoj, la proporcio de tekstoj kaj anoncoj estas en ekonomie sanaj gazetoj proksimume 50:50 procentoj. En la nuna tempo preskaŭ ĉiuj gazetoj estas transirantaj al la elektronika kompostado kaj senplomba presado. Tio necesigas altan investadon de kapitalo.

LA 33-a IFEF — KONGRESO (De nia speciala korespondanto Elfriede Ernst, Bruselo)

La 33-a Kongreso de la Internacia Fervoja Esperanto-Federacio (IFEF) okazis en la 2000-jara germana urbo Regensburg de la 15-a ĝis la 21-a de majo 1981. Kiel kongresejo la centre situanta "Kolping-domo" ofertis tre taŭgajn ejojn. ("Kolping" estas kultura organizo de kristanaj laboristoj.)

Partoprenis 500 esperantistoj el 18 landoj. La devizo de la kongreso estis "Reloj ligas la landojn, Esperanto la popolojn". Sub la titolo "La Verda Relo", la LKK de la kongreso organizis literaturan konkurson por originalaj kaj tradukitaj verkoj por la fervojo. La konkurso celis disvastigi la fervojan mondon en la Esperanto-kulturo.

Unufoje dum IFEF-kongreso funkciis radio-stacio de fervojistaj radioamatoroj en la kongresejo. Jam dum la unua vespero oni sukcesis kontakti 50 aliajn staciojn; respondis ĉefe germanoj kaj francoj, sed ankaŭ venis voĉoj el Maroko kaj Pollando, kaj malfrue vespere sin aŭdigis eĉ stacioj el Japanio kaj Usono. Praktika sukceso estis, ke germanaj radioamatoroj petis informon, kie ili povas lerni Esperanton.

La Interkona Vespero donis, kiel ĉiam, okazon renkonti malnovajn geamikojn kaj konatiĝi kun novaj geamikoj. Oni sentis sin tuj en granda familio kaj bonhumoro regis. Dum la inaŭguro enmarŝis uniformportantaj fervojistoj el 13 landoj. Festparoladis S-ro P. Engen, Vic-Prezidanto de IFEF. Aliaj eminentaj personoj de la germana fervoja administracio ĉeestis la inaŭguron kaj direktis bonvensalutojn en Esperanto al la kongresanoj. Rimarkindaj estis la salutvortoj de la ĉefurbestro de Regensburg, kiu i.a. diris: "Mi deziras, ke la kongreso estu sukcesplena, plifortigu la intencojn de la Esperanto-movado kaj donu al ĝi daŭran prosperon." S-ro G. Maertens, prezidanto de U.E.A., venis por nur 48 horoj al Regensburg por direkti salutvortojn al LKK, al la honoraj gastoj kaj al la ĉeestantaro.

Delegitaro de 65 personoj (inklude vian korespondanton) estis akceptita de Ĉef-

urbestro Friedrich Viehbacher en la tre bela malnova urbdomo. Oni tostis por la estonteco de la internacia lingvo Esperanto. La Ĉefurbestro skizis la historion de la Regensburga urbdomo. Kiel kutime, donacoj estis interŝanĝitaj. La Ĉefurbestro ricevis belan kandelilon el stano el la manoj de la prezidanto de la Germana E-Fervoja Asocio kaj la ĉefurbestro transdonis al li belan ilustritan libron pri Regensburg.

Dum la kongressemajno S-ino Childs-Mee instruis Esperanton laŭ sia rekta metodo. Kompetentaj gvidantoj kondukis kongresanojn tra la tre interesa kaj malnova urbo. Oni vizitis, i.a. nur kelkajn kilometrojn for de la urbo, la grekstilan templon nomitan "Walhalla", kiun la bavara reĝo Ludoviko la unua konstruigis inter la jaroj 1830 kaj 1842. Pli ol 100 marmoraj bustoj kaj memortabuloj de famaj germanaj viroj kaj virinoj troviĝas tie.

En la belega katedralo ni havis la plezuron aŭskulti la mondifaman horon "Domschatzen" (Katedralpaseroj). En alia preĝejo ni aŭskultis muzikon kaj kantojn en Esperanto de la mezepoko ĝis la nuntempo. En la preĝejo St. Emmeram ĉ. 100 gekongresanoj ĉeestis ekumenan diservon, kiun komune celebris Pastoro Burkhardt (KELI) kaj Pastro Eichkorn (IKUE). Tre sukcesplena vespero estis "Regensburga Bukedo". Folkloraj dancoj kaj kantoj ravis la ĉeestantaron.

NOVAĴOJ EL JAPANUJO

(De nia japana korespondanto
Bun'ichi Iŝizaki)

En Hiroŝima estas Pac-Muzeo pri Atombombitoj. Vizitantoj al la muzeo povas lui kasedon-magnetofonon, kiu klarigas la ekspoziciaĵojn dum ili rigardas la muzeon. Tiu servo estas havebla en kelkaj lingvoj kaj esperantistoj, kiuj vizitos la muzeon, nun povas prunti kasedon en Esperanto.

"Mia nomo estas Esperanto" estas la titolo de 405-paĝa libro en japana

lingvo, kiu prezentas la vivon de Zamenhof. Recenzoj aperis pri tiu libro en la japana gazetaro.

Stefan Maul, ĉefredaktoro de 'Monato', vizitis Japanion de la 16-a ĝis la 24-a de januaro 1981 kun la celo diskonigi sian revuon inter japanaj esperantistoj. Dum 9 tagoj li vizitis 7 urbojn kaj li prelegis pri aktuale interesaj temoj. Lokaj Esperanto-societoj lerte eluzis la viziton de tiu profesia ĵurnalisto kaj la plej konata ĵurnalo "Asahi" detale raportis pri la praktika valoro de Esperanto.

Ges-roj Brian kaj Claude Moon, ambaŭ komitatanoj de UEA, vizitis Japanion en marto. Antaŭ 60 ĉeestantoj s-ino Claude Nourmont-Moon prelegis pri "Pollande, kiun mi ĵus travojaĝis". S-ro Brian Moon rakontis pri "La lingva situacio en la Eŭropa Komunumo". Ĵurnalisto de "Asahi" intervjuis ges-rojn Moon kaj longa artikolo aperis je 16-a de marto en tiu elstara ĵurnalo.

S-ro Moon devis reveturi al Luksemburgo, sed s-ino Moon restis pluajn 3 semajnojn, dum kiuj ŝi vizitis 10 urbojn. Sia vigla maniero de prelego multe helpis la japanan movadon.

Jim kaj Jennifer Dimo

daŭrigas sian propagand-vojaĝon per Esperanto. En Barcelono ili rajtis senkoste loĝi en "Esperanto-hejmo" (duĉambra loĝejo) dum 2 semajnoj. 40 km for de Barcelono estas monto kaj monaĥejo Montserrat kaj en bela apuda vilaĝo estas alia duĉambra Esperanto-Domo, senkoste uzebla de eksterlandaj esperantistoj.

Je la 26-a de aprilo Jim prelegis en la E-Klubo de Sabadell (norda provinco). Tiu klubo havas 300 membrojn kaj propran presitan revuon. En tiu urbo estas Zamenhof-strato kaj Zamenhof-placo, ambaŭ inaŭgurataj fare de la urbestro. Je 27/4 okazis prelego en "Orpheo", plej granda kantistara asocio en Barcelono. Jim prelegis en Esperanto kaj hispana samideano tradukis la prelegon en la katalunan lingvon. Estis bona propagando por Esperanto. 70 personoj ĉeestis.

Transirante la francan landlimon, Jim prelegis je 30/4 en la sudfranca urbo Toulouse. S-ro G. Cathala invitis tiom multe la ne-esperantistoj al sia hejmo, ke la lumbild-parolado okazis en Esperanto kaj en la franca lingvo. Post la prelego, ĉeestantoj dum preskaŭ 3 horoj petis informojn pri Aŭstralio.

AŬSTRALIA= =KRONIKO

● **BRISBANE:** La 11/12an de aprilo, 25 anoj partoprenis studsemajnfinojn ĉe Mt. Tambourine. Certe estis studado dum multaj horoj, sed estis ankaŭ kelkaj horoj da librerempo por ĝui la freŝan aeron, belan pejzaĝon, kaj promeni laŭdezure tra tropikaj arbaroj. Sabatvespere okazis komunikantado kaj dancado ĝis noktmezo.

Bonŝance, ni ricevis oportunun montri al televidrigardantoj iom pri la Internacia Lingvo. Kanalo 7 invitis Ray Ross partopreni 2 programojn: "Wombat", kaj "Bailey and the Birds", kaj ŝajnas ke la Esperanto-programoj sukcesis. La 10-an de aprilo Ray Ross parolis al la 12a klaso ĉe la 'Adventa' Mezlernejo; estas interese, ke la lernejestro mem petis parolon pri Esperanto, kaj certe, poste, la gelnantoj vigle demandis pri la lingvo. — RAY ROSS

● **TOOWOOMBA:** Kvin membroj ĉeestis la monatan kunidon de 27a de aprilo. Diskuto traktis aranĝojn por la ŝtata konferenco je 16/17-a de majo en nia urbo. Kvin aŭ ses anoj kutime kunvenas kelkfoje monate por legi teatraĵojn, studi la lingvon aŭ ĝui konversacion.

S-ino Lehane vizitis kelkfoje la ŝtatlernejon 'Gabbinar', por paroli al la lerneĵanoj, kiuj studas Esperanton. Si klarigis iom pri la historio kaj kurantaj aferoj de la movado, ludis "vortmozai-kon" kun la infanoj, kaj gvidis legadon kaj tradukon de porinfanaj rakontoj. La grupgvidantino, S-ino Allom, invitis pluajn vizitojn ĉi-trimestre. La infanoj estas 7-12 jaraĝaj.

S-ro Williams daŭre gvidas la studadon de Esperanto ĉe 'Gabbinar' kaj ĉe 'Holy Name' lernejoj ĉiusemajne.

Estis ĉi-jare kelkaj petoj de plenaŭloj por informo pri Esperanto, sed ĝisdate neniu kurso por komencantoj efektiviĝis. — JEAN LEHANE.

● **SYDNEY:** Wre Chandler, 23/3, prelegis pri "La fiŝmondo ĉirkaŭ Sidnejo". Li diris ke, por trovi materialon, li intervjuis Neptunon, kiu montris al li la neordinaraĵojn de la maro. Ekzemple la Sablo-ŝarko, tre primitiva besto, naskas idojn per placentoj, samkiel la evoluantaj mamuloj. Polpo, primitiva molusko, havas bonajn okulojn samkiel birdoj aŭ mamuloj. Je la

fino de la intervjuo, li vizitis nudistan strandon, kie, laŭ Neptuno, estas malpli ol cent naĝantoj, kaj pli ol mil observantoj kun binokloj kaj lornoj.

Je 30/3 Margaret Chaldecott gvidis interesajn ludojn, kaj semajnon poste, David Gould "Kviz-kunsidon". Je 13/4 Margaret gvidis rond-diskuton pri "Superstiĉoj" Ŝi listis multajn superstiĉojn kaj invitis diskuton. La plimulto el ni diris, ke ni ne havas superstiĉojn. Wre Chandler diris, ke la familio de lia patro konsistis el 2 gepatroj, 8 filoj kaj 3 filinoj. Do ili regule sidigis dektriope ĉe la tablo. El tiu familio ĉiu atingis plenkreskecon, kaj kvin atingis la naŭdekan jaron, do "Kiu diras ke 13 estas malbonaŭgura?" — REVANTO

● **MANLY:** Dum marto la meznombro de ĉeestantoj estis 35. Les Scott, Kay Morrison, Robbie Robertson kaj Marjorie Duncan gvidis la 4 grupojn kaj ĉiuj kunvenis dum la lasta kvarona horo por kantado kaj mallonga skeĉo.

Je 10/3 ni bonvenigis nederlandan vizitanton, Bennie Prange, kiun gastigis Bettie Hart kaj Jonathan Cooper en siaj hejmoj. Ĉe publika kunveno, 20/3, nia vicprezidanto, Frank Preacher, montris informajn lumbildojn kun tre interesa prelego pri sia vizito al Afriko kiel grupmembro de la Instituto de Internaciaj Aferoj.

29/3 kiel kutime membroj helpis en la jara kolektado de la Ruĝa Kruco kaj kolektis la sumon de \$406.

Floroj kaj bondeziroj estis senditaj al dumviva membro S-ino Kathe Schwerin, kiu post serioza malsano nun resaniĝas en Greenwich Malsanulejo.

Ĉe speciala kunveno, 24/4, en la hejmo de Eunice Graham, 22 membroj bonvenigis novan geedzan paron, Ges-rojn Suzuki, de Nagoya, Japanio. S-ro Suzuki montris belajn lumbildojn de sia hejmlando kaj sekvis babilado kaj refreŝigaĵoj.

Pluraj klubanoj ricevis leterojn de nia maristo, Ann Gash, kiu vojaĝis sola al Kalifornio. Survoje hejmen ŝi planas viziti kelkajn Pacifikajn insulojn.

— EUNICE GRAHAM.

● **CANBERRA:** Je 25-a de aprilo nia klubo bonvenigis novan membron: Peter Nguyen van Hai (el Vietnamio). Li estis "boatulo" kaj vojaĝis laŭvoje de Malaizio. Li estas lingvisto, kiu scipovas la vjetnaman, ĉinan, francan, germanan, anglan kaj Esperanton. S-ro Harry prezentis filmon kaj S-ro Nguyen parolis pri la evoluo de la lingva problemo en Vjetnamio. — R.H.

● **MELBOURNE:** Je 13/4 S-ro H. Koppel prelegis pri "Novajoj el la Esperanto-gazetaro" Inter alie li legis kortuŝan rakonton el franca E-gazeto, en kiu la verkisto priskribis sian enkarcerigon en la malbonfama koncertejo 'Dachau' dum la milito. Nova transporto de polaj malliberuloj alvenis kaj grupo da aŭstriaĵ kaj germanaj malliberuloj esperantistaj demandis per afiŝo ĉu inter la poloj estas esperantistoj. Je la indikita horo alvenis kapitano de al timegita S.S.-taĉmento kaj alparolis la verkiston de la artikolo en **bonega Zamenhofa Esperanto**. Li diris, ke li vidis la afiŝon, ke li estis iam membro de la Nuernberga E-Societo kaj li avertis, ke esperantistoj estu estonte pli singardaj por eviti treege severajn punojn. La konkludo: Eĉ en malhumana tempo la "Interna Ideo" de Esperanto venkis!

Ĉe la amuzvespero de 27/4 S-ro Errol Chick montris diapozitivojn pri vizito al Wilpena Pound en Suda Aŭstralio.

Bonvena vizitanto ĉe la kunveno de la 4-a de majo estis angla esperantistino S-ino Fulford el Bristol. Ŝi montris interesajn diapozitivojn pri enviindaj spertoj inter esperantistoj diversloke en Eŭropo, inkluzive kongresojn en Helsinko kaj Varna. Dua parolanto samvespere estis S-ino Fay Koppel, kiu detale parolis pri "Adelaide, urbo de la venonta kongreso".

● **ADELAIDE:** Ni kunvenis en la Universitato je 23/3. Ni diskutis la gramatikon, precipe la uzon de la prepozicio "kontraŭ". La 6-an de aprilo ni diskutis la uzon de la prepozicioj "kun" kaj "per". Sekvis prelego le S-ro Bert Onn pri sia frua esperantista vivo kaj ankaŭ pri sia tre ampleksa kolekto de poŝtmarkoj. Je 27/4 okazis tre vigla kunveno, dum kiu ni ĉefe diskutis pri la venonta kongreso en nia urbo.

— R. FELBY

● **PERTH:** Membroj de la Esperanto-Ligo kolektis ĝis nun la plej grandan parton de la "Fonduso por Esperanto-Stipendio". \$772 el la ĝis nun kolektita sumo de \$1600 estis kolektita en Okcidenta Aŭstralio.

EL LA FEDERACIOJ

KVINSLANDO: La unua konferenco por 1981 okazis en Toowoomba de la 16-a ĝis la 17-a de majo. La Generala Kunveno okazis sabatona posttagmeze ĉe la Kiosko en "Queen's Park". Prezidis la prezidantino, S-ino Doris Sinclair. Reprezentantoj de la diversaj

kluboĵ raportis pri la agado de siaĵ kluboĵ. La federacia kasisto raportis ke la bank-saldo estas \$498. La kunveno decidis donaci \$100 al PAPIE por ties organo "Transoceaĵa".

Post la federacia vespermanĝo okazis distra vespero.

Dimanĉe konferencanoĵ ekskursis al la urbo Drayton, kie ili vizitis historie interesajn lokojn kaj konkludis la tagon per pikniko en "Lions Park".

La venonta konferenco okazos 10-11an de oktobro en Wooloongabba. Samloke okazos la inaŝguro de la Kvinlanda Esperanto-Muzeo.

VIKTORIO: Je 23-a de majo la Federacio aranĝis "Smorgasbord"-vesperon en la Melburna Kvakera Domo. 29 membroĵ el la 4 lokaj grupoĵ ĉeestis. Post la vespermanĝo okazis prezentado de diapozitivioĵ. Pluraj membroĵ prezentis siajn plej interesajn lumbildoĵn. La vespero finiĝis per popol-dancoĵ.

PROJEKTO KOMUNIKADO

Estas nun haveblaj sonbendoĵ kun novaj programoj, informaj kaj edukaj. La intenco estas kapti la intereson de ne-esperantistoj per la radio. Temas pri kvin-minutaj programoj, kiuj estos aŭdataj inter la aliaj programoj.

Se vi loĝas proksime al taŭga radiostacio, vizitu ĝin kaj proponu ke ili uzu niajn programojn. Ni nun havas pli ol 100 programojn, sed ni bezonas novajn ideojn. Se vi povas helpi bv. skribu al: "Media Correspondent", Manly Esperanto Club, Box 415, Manly, 2095.

Ne forgesu, ke estas ankoraŭ haveblaj la du-lingvaj skeĉoj sur kasedoj, po \$2.

23-a AŬSTRALIA ESPERANTO-KONGRESO

2-9 Jan., 1982 — Adelaide, S.A.

La kongreso okazos en la "Lincoln College", tre bele situita kolegio en Norda Adeleĵo, ne tro malproksima de la urbcentro. Ĉiuj kongresanoĵ povos loĝi en komfortaj ĉambroj en la Kolegio kaj la kosto por la ĉambro kaj ĉiuj manĝoj estos proks. \$20 tage.

Kongres-Kotizo: Antaŭ 30-6-1981:

\$15.00; Pensiuloĵ, junuloĵ: \$10.00

Ekde 1-7-1981: \$20.00; Pensiuloĵ

junuloĵ: \$15.00

Sendu vian kongres-kotizon al la kasistino **S-ino B. Randles, 35 Roslind Street, Kensington Gardens, S.A. 5068.** Se vi deziras loĝi en la Kolegio, aldonu \$10 kiel deponon por loĝeĵo. Se vi deziras ricevi kvitancon aldonu afrankitan koverton.

6-a Listo de Aliĝintoĵ

46. S-ino M. Sanders, Melbourne

47. F-ino M. Sanders, Melbourne

48. Volo Gueltling, Sydney

49. Samuel Ellyard, Canberra

50. Marjorie Ellyard, Canberra

51. Eva Trainor, Melbourne

52. Eunice Graham, Manly

53. Gladys Burmeister, Melbourne

54. Kit Brisbane, Melbourne

55. Ray Ross, Brisbane

56. Peggy Ross, Brisbane

57. Henry Peddie, Sydney

58. Elsa Peddie, Sydney

59. Margaret Chaldecott, Sydney

60. Russ Baxter, Malua Bay, NSW

61. May Baxter, Malua Bay, NSW

62. Betty Cleminson, Manly.

Laŝtata distribuo: N.S.K. 21; Viktorio 15; Okcidenta Aŝtralia 8; Sudaj Aŝtralia 8; Kvinlando 7; A.C.T. 3.

Eksterlandaj Esperantistoj NE pagos kongres-kotizon, sed devas rezervi loĝeĵon per pago de \$10.

"THE TIME HAS COME !"

Send your Congress Fee without delay, if you wish to avoid paying the higher rate, which comes into force on 1 July, 1981.

A.E.A. - Estrar-Kunsido

(Melbourne 26/3/1981)

Ĉeestis: S-roj R. Harry, J. Fallu, H.

Koppel, K. Linton. Pro malsano ne povis ĉeesti S-ino I. Fallu.

Financoĵ: La kasisto prezentis (skriban) provizoran raporton por 1980 kaj la ekzistantan kreditsaldon. Ĉiuj fondusoĵ kaj la ĝenerala konto havas kreditsaldon.

Fondusoĵ: La Estraro notis, ke la Fonduso "Esperanto-Stipendio" atingis \$1264, sed, ke pliaĵ \$1736 estas bezonataĵ por la minimumo postulita de la Launceston Klubo.

La Estraro sugestis al la organizajoĵ, kiuj ricevis subvencion de la Fonduso Simpkins, ke ili faru mallongan raporton dum la 23-a kongreso.

S-ro Linton raportis, ke por la intervalo inter la morto de S-ro Matasin, kaj la Kongreso, S-ro Harry agos kiel kuratoro por la Fonduso Zamenhof. La Estraro akceptis proponon de S-ro Harry, ke ĝi rekomendu prunton de la restanta saldo de la Fonduso por Nacia Esperanto-Biblioteko en Kanbero.

23-a Aŝtralia E-Kongreso: La Estraro ricevis "malgrandan raporton" de S-ro Felby kaj notis la bonan progreson pri la aranĝoj. S-ro Harry skribos al la

Vic-Guberniestro por peti konfirmon, ke li inaŭguro la Kongreson. Li ankaŭ provizos la kantlibrojn. Sajnas, ke estas sufiĉe da prelegantoj, sed mankas promesoj de kluboj prezenti teatraĵojn. Nepre necesa estas aranĝoj por komencantoj, kaj oni bezonas, se eble, eksterlandajn vizitantojn. La Estraro esperas, ke almenaŭ 100 ĉeestos.

Nacia Biblioteko de la Internacia Lingvo La Estraro aprobis proponon de s-roj Harry kaj Koppel starigi Tut-aŭstralian Esperanto-Bibliotekon en Kanbergo. Sekve de enketo de s-ro Koppel, oni decidis peti subvencio de 1000 ned. guldenoj de la Institucio Hodler. **Raportoj** estis senditaj de la komisiitoj por la Libro-Servo, Korespondkurso Servo, kaj Informado, ĉiuj pozitivaj. S-ro Harry, kiel Komisiito pri Eksteraj Rilatoj raportis pri la Komisiono UNESKO, Turista Komisiono (flugfolio) kaj la Aŭstralia Asocio por Unuiĝintaj Nacioj.

**LA "A.E."
SUBTEN — FONDUSO**

Antaŭe raportita	\$1250.10
S-ino Ann Christopher, Melbourne, 2-a donaco	2.00
S-ro Herbert Koppel, Melbourne, 2-a donaco	5.00
S-ro H. M. Cohen, Melbourne, 2-a donaco	2.00
S-ino Vera Payne, Perth 2-a donaco	4.00
S-ino Betty Cleminson, Manly	2.00
	<hr/>
	\$1265.10

**FONDUSO POR
ESPERANTO-STIPENDIO**

Antaŭe raportita	\$1284
S-ino Elsie Maddern, Morwell ..	50
Anon., Vik.	5
S-ro H. M. Cohen, Melbourne ..	5
S-ino P. Anson, Canberra	5
S-ro H. Rosengren, Melbourne ..	5
S-ro H. F. Peddie, Sydney	10
S-ino E. Hoffmann, Perth	20
Dr. Kevin Smith, Manly	11
S-ino H. Banham, Contarf Beach, Q'ld	50
M/s Georgette Courtenay, Melbourne	20
S-ino M. Rozsa, Orange, NSW ..	10
S-ro Ilja Grahovac, Sydney	20
S-ro H. Stuckstedte, Carnarvon, W.A.	5
S-ro I. Slavoff, Melbourne	5
S-ro H. Beechey, Melbourne	5
Ges-roj J. Fallu, Melbourne	10
S-ino D. Threlfall, Perth	20
"Anonima" Essendon, Melbourne	60

\$1600



Esperanto Envelopes available with printed slogan "Use Esperanto — The International Language" 25 for 90c; 50 for \$1.70; 100 for \$3.30; 500 for \$14.50.

A.E.A. Book Service, P.O. Box 230 Matraville,, N.S.W. 2036



WHO'S WHO IN AUSTRALIAN ESPERANTO

11 — VERA PAYNE
A Woman of the West.

Vera didn't leave the "vine-wreathed cottage" or the "mansion on the hill". She left a prospector's "humpy" on the "backside of the desert".

She was born in a tiny village in the north west of Yugoslavia. The living was not easy, so her father migrated to Western Australia some ten years earlier, intending to bring his young wife and baby son to the new country and so ensure a contented secure life. The Depression dispelled that dream and after a decade of hard "slog" in the north of W.A. driving camels, in the south burning charcoal and finally merely eking a living on the eastern

goldfields and then being cheated of 2 years' savings, he returned, broke and homesick to his wife and son and lost no time in begetting a daughter—Vera.

Yugoslavia then was worse than ever for small landowners. Their region was under the heel of fascist Italy. Her father, always out-spoken and politically conscious, decided that to be broke and hungry in Australa was preferable to being broke, hungry and in bondage. Further, war was looming. So, off to the Great Southland again and as soon as he could scrape up enough money he sent for his wife, his son and his 3-year-old daughter.

They went to live (sic) in the Boulder Block, riddled below with the tunnels of the Golden Mile and patchworked above with shanties belonging to the poor Irish, the poor Italians and the poor Yugoslavs. What a life! Unbelievably searing heat day and night in the summer; no refrigerator; flies which blew everything in sight; blinding dust-storms; homesickness; worry about relatives in the war and the ever-present danger of the breadwinner being killed underground. Vera saw many funerals and was acquainted with the grief of distraught widows.

Yet, there were happy times! Vera was much loved, perhaps spoiled, and taken for excursions to the local rubbish tip. Bizarre interest too! A boozy but kind old Irishman lived next door. When drunk, which was often, he became very religious and, with arm-waving frenzy, would preach to whomever would listen. Vera listened. (In fact, were she inclined, Vera could now preach a good sermon. But she's not inclined. Her father had high standards of morality but lost faith in the established Church which, he thought favoured the Establishment. Vera has never gained the faith her father lost.)

Aborigines often came to beg—albeit with quiet dignity—for tea, sugar, bread and "baccy". A sad lesson in the evils of colonialism!

Young Vera, thanks to her family's insistence and her old Irish friend, spoke both Yugoslav and English when she started school. A fear of being thought inferior (because she was a "Slav") made her anxious to be a high achiever. Her bubbly personality and lively mind enabled her to do so. In fact, she's inclined to think that at times she was a bit "bossy" and "clever". This over-compensation worked very well right through schools — in fact right up to the University, where, like so many of us, she found it hard just to keep up with her peers.

Perhaps it was a desire to beat her Anglo-Celtic "peers" at their own game which prompted her to take a special interest in English literature—or perhaps it was just a love of reading. Vera won a bursary and a scholarship, and enrolled in the University of Perth where she gained her Bachelor of Education degree and the Teacher's Higher Certificate, and began teaching in Bullsbrook. There she met Barrie

Payne, whom she married 3 years later. She would have preferred journalism, (to teaching—NOT to Barrie) but soon felt glad that she had entered teaching. She wanted to be an actress too, but soon discovered that every good teacher is an actor anyhow.

After Barrie and she married, they lived among the tall trees of the south west, where he was engaged in road haulage. Two years later they moved back to Perth, where her husband initiated car carrying.

In 1969 Vera's father, a miner and a smoker, became terminally ill. At this time he often spoke of Esperanto, extolling it as a sensible idea. When he died, Vera decided to learn Esperanto, partly as a tribute to her father. Also, Bill Howard, who had spoken about Esperanto on television, lived opposite and was eager to help.

1971 saw the family in Sydney, where she joined the Manly Club. In 1972 they attended the Melbourne Congress and the following year, being then on a 3½-month tour, Vera went to Belgrade (Universal) Congress. She also visited her birthplace, saw the graves of her forebears and sat in the Church where she and her ancestors unto the third, fourth and fifth generations were christened.

Nowadays Vera is teaching, as she has done off and on all her adult life. She is teaching adult education classes. She is teaching Esperanto to 96 youngsters in an Anglican College. From time to time she teaches on the radio ("Jen Nia Mondo," which included lessons and comments and Esperanto news, was received very favourably.) She is co-editor of "LA NIGRA CIGNO". Also, she is an active member of the West Australian Esperanto movement and Amnesty International.

Finally, and very importantly, Vera is a busy wife and a mother to adolescent daughters who (having attended school as "stowaways" before birth) have inherited a love of learning and are keen University students.

Vera has not (as yet!) attained office in the Australia-wide movement. She is not a "tall poppy". (This page is not for "tall poppies"—only) Vera is one whose colour and brilliance brightens one small corner of the Esperanto garden.

— ARTHUR COCKING.

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscriptions to A.E.A. \$16
(Individual, Club & Federation)
Additional Family Member \$4
Pensioners & Full-time Students
pay a minimum of \$8.



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.

Prezidanto: R. L. HARRY, AC, CBE, 8 Tennyson Crescent, Forrest, A.C.T., 2603

Sekretario: S-ro F. J. FALLU, 10 Sumersett Avenue, Oakleigh South, Vic., 3167

A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. ELLIOTT, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036.

Kasisto: S-ino I. FALLU, 10 Sumersett Avenue, Oakleigh South, Vic., 3167.

Korespondaj Kursoj: S-ro J. Moore 7 Pelican Street, Emu Park, Queensland, 4702

N-ro 189 (269)

MELBOURNE

Julio-Aŭgusto, 1981

AŬSTRALIA NACIA ESPERANTO-BIBLIOTEKO (Australian National Esperanto Library)

La Estraro, en marto 1981, komisiis la Prezidanton starigi, kun la helpo de la Kanbera Esperanto-Klubo, Nacian Esperanto-Bibliotekon en Kanbero.

La unua celo estas, ke la Biblioteko kolektu kaj prizorgu(1) kompletan de libroj, gazetoj, filmoj, diskoj kaj sonbendoj eldonitaj en Aŭstralio; (2) la ĉefajn tiajn eldonaĵojn el aliaj landoj; (3) la 'neaktivajn' arkivon de Aŭstralia Esperanto-Asocio (la uzata arkivo kompreneble devas resti ĉe la Sekretario).

La dua celo estas trovi daŭran ejon, kiu povos enteni la Bibliotekon kaj servi ankaŭ kiel centro de AEA, kunveno kaj instruejo de la Kanbera Klubo, kaj konstanta ekspozicio de Esperanto en la Nacia Ĉefurbo.

Kiel unua ero de la biblioteko la Esperantistoj de Morwell sendis al Kanbero la malgrandan sed valoran 'muzeon' kolektitan de Ivan Maddern. Tio inkluzivis librojn kaj gazetojn de W. J. Drummond, F. R. Banham, C. C. Cowling kaj aliaj pioniroj. Kelkaj estis donacoj de samideanoj en Viktorio. Inter la rarajoj en la kontribuo de Morwell estis kelkaj klasikaj libroj el la frua periodo de nia literaturo kaj multaj fruaj gazetoj i.a. kompleto (7 volumoj, 1955-62) de la "Nica Literatura Revuo", "Esperanto" post la Unua Mondmilito, "Suda Kruco" (1920-26) kaj "Oomoto", kaj "British Esperantist" (1963-67).

La Kanbera Esperanto-Klubo intertraktis kun la federala registaro por obteni taŭgan salomon por la A.N.E.B. Ni ne tuj sukcesis, sed ni esperas ricevi ejon almenaŭ post la transiro de la Parlamento al sia nova grandioza konstruaĵo en 1988. Provizoran hejmon ni trovis en la Aŭstralia Instituto de Internaciaj Aferoj, en la antaŭa Hotelo Kanbero, en la centro de la urbo. Tie ni instalas 5 bretarojn por la libroj kaj 35 belaspektajn bretkatolojn por la gazetoj nebinditaj.

Ni aldonis al la viktoria kerno la bibliotekon de Kanbera Esperanto-Klubo kaj Noel Gamble. Tiu inkluzivis 7 binditajn jarkolektojn de "OOMOTO" "Orienta Revuo", "Nuntempa Bulgario" kaj "El Popola Ĉinio".

Dua aldono estis la persona biblioteko de la Prezidanto. Ĝi inkluzivis ĉ 100 librojn (multaj estis speciale binditaj) kaj kolektojn de "Literatura Mondo" (post 1951), "Heroldo" (post 1955), "La Rondo" kaj "Australian Esperantist" (post 1947), "La Monda Lingvo-Problemo" (nun "Lingvaj Problemoj kaj Lingvo-Planado") ekde la komenco, "Sciencita Revuo" (post 1953) kaj "Internacia Revuo". Estas kelkaj numeroj ankaŭ de ĉirkaŭ 20 aliaj gazetoj.

Entute ĉirkaŭ 50 volumoj de gazetoj estis jam binditaj. En la pasintaj 3 mon-

atoj ni bindigis 35 volumojn kaj aliaj 15 pretas por la bindisto.

Ni preskaŭ finis por la tuta biblioteko katalogon bazitan sur la sistemo de la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno. Bonŝance ni jam posedis la sisteman katalogon de tiu muzeo eldonitan en 1957. Ni mendas el Usono la alfabetan katalogon eldonitan en 2 volumoj en 1969. Se iu en Aŭstralio posedas tiun katalogon ni tre ŝatus ĝin prunti, ĉar ni tajpos la sliparon nur post kontrolo de nia klasigado per la listo de IEM.

La Biblioteko ankaŭ entenas kelkajn diskojn, sonbendojn kaj kasetojn, kun muziko, paroladoj kaj lecionoj en taŭgaj enteniloj.

Ni tre dankas al tiuj, kiuj donacis siajn librojn kaj gazetojn en la pasinteco aŭ en la lastaj semajnoj.

Ni dankas ankaŭ la Esperanto-Federacion de Viktorio, kiu donacis \$100, la Melburnan Esperanto-Kooperativon (\$50) kaj S-ron Koppel, kiu ankaŭ finance helpis. Tamen ĝis nun preskaŭ la tutan koston portis KEK. Por persvadi la registaron serioze konsideri nian peton de salono, kaj por aĉeti taŭgajn meblojn por pli granda kolekto ni bezonas la helpon de niaj amikoj ĉie en Aŭstralio kaj en la mondo. Ni menciuj, ke por kompensi AIIA pro ties gastigado de la Biblioteko ni devos pagi modestan luprezon, eble \$200 ĉiujare. KEK ankaŭ fariĝis grupmembro de la Kanbera Filio de AIIA. Tio kostos \$45 ĉiujare.

Sed ni faris bonan komencon, kaj povas akcepti pluajn librojn kaj gazetojn. Super ĉio ni ŝatus trovi kompletan de "Suda Kruco" kaj "La Rondo" inter 1927 kaj 1947, kompletan de "British Esperantist" post 1967, kaj ekzempleron de la Enciklopedio de Esperanto. Kompreneble ni ŝatus ankaŭ ricevi donacojn de novaj libroj! Ni ne celas grandan bibliotekon, sed certe la Aŭstralia Nacia Esperanto-Biblioteko estos utila por AEA kaj malfermos la okulojn de neesperantistoj en la Nacia Cefurbo!

Ĝis akcepto de formala statuto dum la venonta kongreso, la Prezidanto deĵoras kiel komisiito por la Biblioteko. La kasisto de KEK (Sam Ellyard) administras apartan banko-konton kies titolo estas "Australian National Esperanto Library". Bonvolu uzi tiun nomon por viaj ĉekoj! Donacojn de mono aŭ materialo bonvenigos via Komisiito, **Ralph Harry, 8 Tennyson Crescent, Forrest, ACT, Aŭstralio 2603.**

TRAJNO SEN RADOJ

Naskiĝo kaj maturiĝo de la magnetglita tekniko en la Federacia Respubliko Germanio

La fervojoj celas pli kaj pli rapidiĝi, jam dekomence. Nun oni priesploras la rapidecolimojn de la sistemo "rado sur relo". Samtempe sciencistoj kaj inĝenieroj sin turnas ankaŭ al aliaj teknikoj, ĉar radoj ne estas la sola movrimedo por veturilo. Grandaj flugŝipoj ekzemple glitas sur aerkusenoj transmaren; pri aerkusenaj trajnoj eksperimentis la fervojoj britaj, francaj, italaj kaj usona industrientrepreno, sed sen epokfara sukceso.

La ebleco de magneta ŝvebigo estis pridiskutita en Germanio jam en 1935. Konataj estas tri diversaj sistemoj: (1) la permanentmagneta ŝvebigo, kiu montriĝis taŭga nur por malgrandaj veturiloj de internurba trafiko; (2) la elektrodinamika ŝvebigo, kiu baziĝas sur la forpuŝaj magnetfortoj estigantaj inter la enveturilaj magnetoj movataj (kun minimume 60 km/h) super metalaj reloj; (3) la elektromagneta ŝvebigo, ĉe kiu la enveturilaj magnetoj alire levigas la veturilon preskaŭ ĝis ektuŝo al la veturvojo — restas nur 10-milimetra breĉo far elektronika reguligo de la magnetfortoj.

Kiel trakcia rimedo netuŝanta la veturvojon teorie eblas aerhelico, turbinreaktoro aŭ raketo, sed plej konvena kaj senproblema montriĝis la "linia elektromotora". Ĝia statoro kun la elektromagneta volvaio povas esti lokita en la veturilo, metalreloj en la veturvojo tiam servas kiel reaga parto; tiukaze oni parolas pri "kurtstatora" linia motoro. Sed eblas ankaŭ, ke la statoro estas instalita laŭlonge de la tuta veturvojo, kaj la veturilo mem servas kiel reaga parto—jen la "longstatora" linia motoro. En Germanio oni priesploris ĉiujn variantojn inter la du ŝvebigaj kaj la du trakciaj sistemoj.

De 1969 ĝis 1979 dek diversaj esplorveturiloj estas konstruitaj en Germanio, komence de kvar entrepren-grupoj sendepende laborintaj, de 1977 en komuna esplorado: Transrapid 01 ĝis 05, EET 01 kaj 02, Komet kaj HMB 2. Ankaŭ en Japanio, Usono, Sovet-Unio, Francio kaj Kanado oni sin okupas pri liniaj motoroj kaj magnetglitaj veturiloj.

Dum la Internacia Trafik-Ekspozicio en Hamburgo 1979 funkciis unuafoje magnettrajno por la ĝenerala publiko: Transrapid 05, inaŭgurita de la Federacia Prezidanto Scheel. Sistemo: elektromagneta ŝvebigo kun longstatora linia

motoro. Sur 900 m longa veturvojo ĝi glitis je 90 km/h, ĉiam plene okupita. Nun oni preparas en la Ems-rivera regiono testvojon 31.5 km longan, sur 5 m altaj fostoj, kie veturos en 1982 Transrapid 06 kun rapideco de 400 km/h. La energi-transmisio dum la veturo okazos sentuŝe per linia generato. Post nelonge la magnetglita tek-

niko estos matura. Ĉu ĝi povos fermi la breĉon inter konvenciaj trajnoj kaj aviadiloj?

Resumo de prelego de Gernot Ritterspach (Komerca Direkcio de la Germanaj Fervojoj), ĉe la 33-a IFEF-Kongreso en Regensburg.

NOVJORKA URBESTRO PROKLAMAS INTERNACIAN AMIKECAN ESPERANTO-SEMAJNON

Montrante senprecedencan subtenon al la idealo de Esperanto, Edward Koch, Urbestro de Novjorko, solene deklaris la Semajnon 12-18 julio Internacia Amikeca Esperanto-Semajno.

La okazo de tiu proklamo estis la 29-a Kongreso de la Esperanto-Ligo de Nord-Ameriko, kiu gastis ĉi-jare en la metropolo.

La proklamo de la Urbestro rezultis el interveno de anoj de la Laborgrupo de UEA ĉe Uniĝintaj Nacioj, kaj ĝi estas ankoraŭ unu ekzemplo de la konsiderinda efikeco de la oficejo de UEA en la eksteraj rilatoj de la Esperanto-movado.

(Legu la originalan tekston sur paĝo 40)

TELEGRAMO AL NIA REDAKCIO

Brasilia, 30-7-1981: En bela vetero, antaŭ 1800 Kongresanoj el 52 landoj, la Brazilia Vic-Prezidanto malfermis en la Parlamentejo la 66-an Universalan Kongreson de Esperanto. La Aŭstralia Ambasadoro salutis ĉiujn esperantistojn. Ĝuinda sperto.
—Les Scott.

La plej granda Esperanto-societo

Kie estas la plej forta Esperanto-grupo en la mondo? Ĉu en Londono, Tokio aŭ Rotterdamo?

Sen ia dubo la plej forta E-societo en la mondo estas la Esperanto-societo "Maksim Gorkij" en Sofio (Bulgario). Ĝi havas 634 membrojn! Kaj estas virino, kiu estras tiun societon, S-ino Belka Beleva. Laŭ ŝia jara raporto estis organizitaj kursoj por komencantoj kaj progresintoj en diversaj entreprenoj, fabrikejoj kaj lernejoj dum 1980, kiujn 151 kursanoj sukcese finis.

La societo ĝemeliĝis kun la Esperanto-klubo en Leningrado, kun kiu ĝi interŝanĝas bildmaterialojn kaj vigle korespondadas kun la klubanoj. La societa estraro intencas oficiale inviti la Leningradan klubon gastigi en Bulgario dum la solenaĵoj okaze de la 1300-jariĝo de la bulgara ŝtato. La ĝenerala kunveno akceptis rezolucion, kiu enhavas 15 ĉefajn taskojn inter ili pliriĉigon de la instrua laboro kaj plimultigon de la membroj (!).

Jen vere forta kaj aktiva societo, kiu havas pli da membroj ol la tuta Aŭstralia Esperanto-Asocio.

NEKROLOGO HEBER VALVERDE PETLEY

Mortis la 6an de junio, en Toowoomba, Heber Valverde Petley, fortulo de la Esperanta movado en Kvinlando dum la lastaj du jardekoj. Li naskiĝis en Melburno en 1905 kaj post deĵoro dum la dua mondmilito, li decidis loĝi en Kvinlando, kie li renkontis sian edzinon, antaŭan flegistinon, kiu dum multaj jaroj laboris inter la indiĝenaj popoloj en Okcidenta Kvinlando.

Heber, kiel junulo, laboris en Fiĝio, kaj sendube kelkaj jaroj tie, inter la Fiĝianoj, profunde influis lin, precipe la sinteno de la enloĝantoj al normalaj tagaferoj, kune kun la amo de gefiloj al gepatroj kaj inverse. Multfoje Heber parolis pri la Fiĝia sperto; li eĉ konservis la konon de la lingvo kaj li ĉiam proponis viziton al tiu amata lando. Post pli ol kvindek jaroj li povis plenumi la deziron, kaj vizitis al Fiĝio; bedaŭrinde li ege malsanis kaj la vizito preskaŭ fiaskis.

Dum la dua mondmilito Heber deĵoris en Tobruko; li estis flegisto en milithospitalo, kie li renkontis vunditojn el multaj nacioj. Precipe impresis lin vunditoj kaj malsanuloj el Hindujo, pro malsamaj kredoj kaj kulturoj. Ĉi tiuj spertoj sendube konvinkis lin pri la neceso de interligeco de ĉiuj nacioj kaj provizis fekundan teron, kiam Esperanto aperis kiel vera rimedo, poste.

Heber Esperantiĝis ĉirkaŭ 1960; fakte lian nomon oni legas en la listo de Brizbananoj tiujare. Li estis Vicprezidanto en 1961. Poste li translokiĝis al

Rockhamptono, kie li estis ano, instruisto kaj estrarano 1961 ĝis 1967. Li estis UEA delegito dum multaj jaroj; de 1968 ĝis 1971 li estis la Publiciga Oficisto de AEA; en 1968 li gajnis la Norman Superan Diplomon. Dum 1968-69 li loĝis denove en Brizbano, kie li starigis novan grupon en antaŭurbo, Sherwood. En 1969 li decidis loĝi en Toowoomba, pro nebona sano kaj multe helpis la starigon de la Toowoomba Societo; li estis ankaŭ Prezidanto kaj instruisto tie dum kelkaj jaroj, ĝis malsano malebligis pluan partoprenon en klubferoj.

Kiam Heber mortis, Esperanto suferis grandan baton kaj ĉiuj, kiuj konis lin, perdis sinceran amikon. Heber Valverde Petley estis kompatema viro kaj vera gentlemano. —Ray Ross.

NOVAĴOJ EL NOV-ZELANDO

La 47-a Kongreso de la Nov-Zelanda E-Asocio okazos de la 6-a ĝis la 10-a de januaro, 1982, en "Te Kaihanga Hostel", 34 A Hansen's Lane, Christchurch.

Aŭstraliaj esperantistoj, kiuj vizitos Nov-Zelandon, estos bonvenaj gastoj ĉe la kongreso kaj ne bezonos pagi kongreskotizon. Pluajn informojn donos S-ro Frank Swift, P.O. Box 13213, Christchurch, N.Z.



● **PERTH:** Ŝajnas ke la movado revigliĝas ĉe ni. Eble la kaŭzo estas la novstila NIGRA CIGNO, kies regula aperado, verve prezentata enhavo kaj multaj ilustraĵoj daŭre rikoltas por la redaktoroj Vera Payne kaj Janek Wolak multajn gratulojn. Eble estas la infekta entuziasmo de Janek. Sendube helpas la vigla kaj bonhumora kunvenogvidado de Prezidanto Jack Hawks.

Kunvenoĵi lastatempe estis pli-malpli samformataj. Konstantaj eroj estis "novaĵoj — el E. gazetoj kaj aliaj fontoj; dividado en malgrandajn grupojn por diskuti temojn elektitajn de la prezidanto, kiu iras de grupo al grupo kaj jen incitas, jen "premiis" per bombono aŭ simila; kaj paŭzoj kiam oni rajtas babilu kaj rigardi aĉetebajn librojn, kiujn alportas libroperanto Chris Dean. Foje ankaŭ estas ludoj, kantado, interpretado. Eĉ dum mon-

trado de diapozitivoj oni ne povas dormeti pro timo ke venos subita demando pri iu montrata lumbildo.

"Pikniko" en la domo de Dorothy kaj Arthur Threlfall proksime de la bela rivero Canning en Rossmoyne (21-6-81) tre sukcesis malgraŭ tio ke la tago estis la ĝis nun plej malvarma de la jaro. Entute 26 ĉeestis, sed ne ĉiuj samtempe. Krom manĝi, trinki kaj babilu oni promenis laŭ la riverbordo, muzikis, kantis, rigardis kaj priskribis diapozitivojn.

Oni ankaŭ laboras. Vera Payne, Janek Wolak, Shirley Gradussov Jess Gray kaj Vera Harris instruas, dum daŭras la "Lunda Grupo" de Edith Palmer. Bedaŭrinde ne estas klasoj ĉe Nedlands College ĉi-jare, pro manko de aliĝoj.

Entuziasmo por la venonta AEA-Kongreso en Adelaide kreskas de kunveno al kunveno. Tre povas esti ke la partopreno el la "Okcidenta" estos la ĝis nun plej granda. Estis eĉ diskuto (ne tre serioza) pri la eblecoj ludi aŭtobuson por transporti nian delegitaron.

Nia kutima raportanto, Doktoro Tim Einihovici, kun la edzino Idyss, faras dumonatan viziton al Israelo kaj Eŭropo ĝis meze de aŭgusto. —R. McG.

● **ADELAIDE:** Okazis kunveno la 1-an de majo en la hejmo de S-ino Boogaard. S-ro Ilja Grahovac venis el Sidnejo kaj vizitis nian kunvenon. Ni ricepe diskutis pri kongresaj problemoj.

Je 8-a de majo vizitis nin S-ro Renate Alvaro el Perth. Li feris en Adelaide kaj kiel entuziasma esperantisto li kontaktis nin. Li estas esperantisto kun bonaj ideoj kaj lia entuziasmo stimulis niajn membrojn.

Je 26-a de majo ni denove kunvenis en la Universitato kaj ni diskutis la venontan kongreson. —R. Felby.

● **LAUNCESTON:** S-ro Sijozj Sakamoto, kiu estas supera oficisto de la "Diahatsu" aŭtomobilfabriko en Japanio vizitis nian urbon je la 3-a kaj 4-a de julio. Nia membro Edith Kerr estis gasto de la familio Sakamoto kiam ŝi studis dum unu jaro (en 1972) en la urbo Ikeda. S-ro Sakamoto estas bonega esperantisto, sed li ne kapablas bone paroli la anglan lingvon. Launceston kaj Ikeda estas "ĉemelaj" urboj kaj dum formala akcepto en la urbdomo la interpretado okazis en Esperanto, kio kaŭzis grandan intereson ĉe la ĉeestantoj.

Je 4-a de julio S-ro Sakamoto luncis kun la membroj de la Launceston

Esperantogrupo en la hejmo de Pat kaj Mac LeFevre. Post la luĉo la membroj adiaŭis la gaston ĉe la flughaveno kiam li reflugis al Japanio. —Mac LeFevre.

● **MELBOURNE:** Pro tre malbona vetero nur malmultaj membroj vizitis la lundajn kunvenojn de la Melburna E-Societo dum majo kaj junio. Je 18/5 S-ro Harry Beechey parolis pri "Rapida kuraco de kapdoloroj sen drogoj" — (per poleksa premado ĉe diversaj nervpunktoj). Henry Rosengren, 1/6, daŭrigis sian rakonton pri eskapoprovoj el germanaj internigejoj, kiam li provis atingi la ĉeĥan landlimon. "Novajoj el Esperantujo" estis la temo de prelego de S-ro H. Koppel (15/6).

Je 29-a de junio okazis la jarmeza konkursvespero. S-ino Barbara Podmore estris diskutvesperon pri la temo "Ĉu ni bezonas pli da ŝoseoj aŭ pli bonan publikan transporton". Ĉestis membroj de 3 kluboj, entute 15. David Rockell gajnis la premion por la plej bona parolado en Esperanto; Harry Beechey kaj S. Kanaĉki gajnis la 2-an premion. La vespero finiĝis per "kalori-plena" vespermanĝeto.

F-ino Ann Hearn el la OAKLEIGH GRUPO ĵus finis ses-semajnan kurson por infanoj de lernejo en antaŭurbo Camberwell, kiu eksperimentas per eksterprogramaj kursoj por talentaj infanoj. Similan kurson gvidis S-ro Ken Linton por junuloj de lernejo en Dandenong.

● **John J. Munro**, kiu estis brigadestro de la Savarmeo, mortis subite je 9-a de junio, 1981, kiam li feris en Mallacoota, Vik., 70-jara.

De 1972 ĝis 1978 li estis kasisto de la Melburna E-Societo. Ekde 1979 li estis membro de la Malvern E-Grupo. S-ino A. Paling kaj S-ro D. Rockell reprezentis la E-movadon ĉe la funebra ceremonio, kiu okazis je 12-a junio, en "Holy Trinity Church", Port Melbourne. Lia cindrigo okazis ĉe "Western Suburbs Crematorium".

● **MANLY:** Je la 23-a de majo en la hejmo de Edna Giles, Manlianoj bonvenigis Dorothy Fulford, la U.E.A.-delegiton por Bristol (Anglujo). 16 membroj ĉestis kaj Dorothy montris lumbildojn pri kongresoj, Esperanto-feriaj kursoj kaj vidindaĵoj en kaj ĉirkaŭ ŝia hejmurbo. La kunveno finiĝis per komuna kantado kaj vespera manĝeto.

Sekvis letero en la loka ĵurnalo, en kiu nia vizitanto dankis al la esperantistoj kiuj gastigis ŝin kaj ankaŭ laŭdis la delegitan reton, kiu ebligis ŝin trovi geamikojn ĉirkaŭ la mondo.

Je la 2-a de junio komenciĝis la 2-a

trimestro en la vespera lernejo kun la kutimaj kvar grupoj. Spite de la vintra vetero nombroj ankoraŭ restas sufiĉe kontentigaj. —EUNICE GRAHAM

● **SYDNEY:** Je 4/5 Margaret Chaldecott prezentis "Gemoj de Gemeloj" premiitan drameton de la "Literatura Konkurso". Kastoro kaj Pollukso prezentis dramon, sed perdis la manuskripton. La rezultanta dramo estis amuzega.

Je 11/5 Shirley Fanos prelegis pri "Persekutoj de la Internacia Lingvo". Ŝi montris kiel kritikuloj kontraŭstaris Esperanton de la komenco; kiel okazis la "Ido-krizo"; kiel eĉ nun multaj edukistoj kontraŭstaras nian lingvon, ĉar ĝi estas "artefarita".

F-ino Dorothy Fulford, 18/5, prelegis pri la Movado en Anglujo kaj montris lumbildojn pri Universalaj Kongresoj ĉe kiuj ŝi ĉestis. Je 25/5 M. Chaldecott recenzis la libron "D-ro Bovoro". Semajnon poste okazis Lumbild-Vespero, dum kiu ĉestantoj montris alportitajn lumbildojn.

Wre Chandler, 15/6, prezentis drameton "Noah kaj la Marsupialoj". Betty Hart, 22/6, prelegis pri "Kiel elektu hundon". Ŝi montris bildojn pri multaj specoj de hundoj, kaj parolis pri la bonaj kaj malbonaj karakteroj de ĉiu speco. Laŭ ŝi, la skota ŝafhundo estas la plej inteligenta el ĉiuj dorlotoblaj hundoj.

Wre. Chandler, 29/6, recenzis la libron "Metropoliteno". Laŭ li, ĉi tiu libro far la rusa verkisto Varankin, suferas pro ĝia rusa origino. Ĝi estas malklara pro la rusa, anstataŭ la Esperanta sintakso. Ĝi ne estas unu romano, sed kolekto de nerilataj anekdotoj, la plej multaj tute ne pri la Moskva subtera fervojoj. Oni ne povas rekomendi ĝin al komencantoj. —REVANTO

● **BRISBANE:** Nuntempe eksterlandas Annie Spencer, Baden kaj Mildred Hodson kaj Lisa Box, speciale por viziti al la UEA-Kongreso en Brazilo. Samtempe Neil McCurran vizitas Germanujon kaj poste korespondamikojn en Centra Eŭropo. Bedaŭrinde mortis la direktanto de nia kantgrupo, Harold Buckler. Harold ne estis esperantisto, sed multe amis muzikon; dum multaj jaroj li gvidis nian kantgrupon. Ni surkasetigis 14 erojn por Brazilo. La kaseto enhavas mikspoton de melodioj, ĉefe tradukitaj de Gaye Phillips kaj aliaj, popolantoj, indiĉenaj lulkantoj ktp. Brizbano gastigos la 2-an konferencon de la Kvinlanda E-Federacio je 10-11-a de oktobro. Samtempe okazos la oficiala malfermo de la Kvinlanda Esperanto-Muzeo. —RAY ROSS.

RECENZOJ

"SKIZOJ", de Peter Altenberg (pseŭdonimo), trad. de Grete Breunlich, eldonita de "Aŭstria Esperanto-Instituto", broŝ., 32-paĝa, prezo 36 aŭstria ŝilingoj (proks. \$2.50)

Traliginte ĉi tiun libreton mi unue sentis malsimpatian, kredeble ĉar la vivmaniero de la verkisto kaj poeto Altenberg ege malsimilis la mian; oni "lasis lin vivi sen premo, kvazaŭ kiel vagabondo, por kreskigi lian amimon." En la medio, kie mi naskiĝis, la etoso estis tute alia: oni ĉiam instruis, ke laboro, eĉ ĝis doloro, kreskigas laŭinde la animon. Sed ni ja posedas ion komunan, ni ambaŭ rajtas esti nomitaj "Englander".

Post monatoj mi tralegas la libreton denove, kaj trovas dolĉaĵojn inter eroj kiuj antaŭe ne plaĉis. Denove mi devas malaprobĉi la anekdoton de la "geniulo sen kapablo", kiu detruis la violonon, majstroverkon de Peter Guarnerius, kiam la frato kritikis la "grataĉadon" de la juna Altenberg, kaj mi devas konsenti, ke la gepatroj estis tro mildecaj.

Sed ĉi-foje mi trovas ĉarmajn, kortuŝajn anekdotojn, ekzemple pri la unua amatino, dekdujaraĝa Rosie, kies "nudaj, rondecce angulfurmaj ŝultroj, malligitaj bukloj" kaj "dolĉa sovaĝkata vizaĝo" aspektis tiel allogaj.

Spritaĵoj ne mankas; oni demandis al la gimnaziano pri "la influo de la eltrovo de Ameriko al la kulturo de Eŭropo." Li respondis unuvorte: "Terpomoj!" Kiel plenkreskulo li lernis aprezi ankaŭ la kubajn cigarojn. Tamen la terpomoj restis liaopinie tre gravaj, kaj fariĝis la unusola nutraĵo." Li demandis "Pro kio, io vere bezonas bongusti?" Laŭ li, oni devas manĝi tion, kio estas plej facile digestebla, kaj "tiu, kiu manĝas, ĉar io bongustas al li, ja ankoraŭ ne estas vere plenkreskinta homo." Do, tiuj famaj kuiristoj el Vieno laboris vane!

Bedaŭrinde nur unu poemo troviĝas en la verketo, titolita "Strange". "Strange, pri ĉio estas permesate poeti . . . ne nur pri seksaj aĵoj." Tiun frazon mi ne komprenas. Ĉu "nur ne" estas la intenco? Sed la esprimmaniero de la tradukistino estas alie senmakula, tute klara; oni devas fidi al ŝia traduko.

La libreto estas aĉetinda, malmultekosta frandaĵo, espereble ĝi sukcesos, kaj ebligos, ke Grete Breunlich povos prezenti al ni pli grandan elekton el la verkoj de Altenberg. — ROBI

MORTIS FRANK MERRICK

Mortis la konata brita esperantisto Frank Merrick "juna 95-jarulo". Li naskiĝis en 1886. Li estis tre fama koncertpianisto, kiu debutis kun recitalo kiam li havis nur 8 jarojn. Kun sia edzino li subtenis la virinliberigan movadon, kaj dum la Unua Mondmilito li pasigis 22 monatojn en karceroj kiel militrifuzanto. Li estis profesoro en Manĉestro kaj kiam li emeritiĝis en 1956 oni proponis al li profesorecon en la Muzik Kolegio Trinity, kie li restis ĝis 1975, kiam li estis 89-jara.

En karceroj dum la Unua Mondmilito Frank ekkonis Esperanton, kaj li restis ĝis la fino fidela esperantisto. Li komponis muzikon por poemoj de Zamenhof, Kalocsay kaj Boulton. Tiujn kantojn eldonis sur disko en 1965 la "Societo Frank Merrick" (FMS 17). Li ofte ludis en esperantistaj kunvenoj. (BE)

Indeksoj de "A.E." senkoste haveblaj:

Se vi havas kompletajn kolektojn de "La Rondo" kaj de "The Australian Esperantist" kaj deziras havi indeksojn, la sekvantaj estas haveblaj:

"La Rondo", 1947-50 kaj 1951-57

"The Australian Esperantist", 1963-69

"The Australian Esperantist", Januaro, 1970-Majo 1973.

"The Australian Esperantist", Junio 1973-December 1975

Sendu afrankitan respond-koverton al: "Australian National Esperanto-Library", Hotel Canberra Conference Centre, Commonwealth Avenue, Yarralumla, Canberra, A.C.T., 2600 aŭ al la komploto, S-ro Ralph Harry, 8 Tennyson Crescent, Forrest, A.C.T., 2603.

23rd AUSTRALIAN ESPERANTO CONGRESS

Jan. 2-9, 1982 — Adelaide, S.A.

This congress will be held at the "Lincoln College" in North Adelaide, not too far from the city centre. All congress members will be accommodated in comfortable rooms in the College and the cost for the room and all meals will be approximately \$20 per day.

Congress Fee: \$20 00. Pensioners and Full-time Students \$15 00.

Mail your Congress Fee to the Treasurer: Mrs. B. Randles, 35 Roslind Street, Kensington Gardens, S.A., 5068. If you wish to stay at the College, please add \$10 for room deposit and a

stamped, addressed envelope for your receipt.

7th List of Congress Members:

63. F-ino A. Curtis, Nth. Tamborine, Queensland.
 64. Clarence Strochnetter, Launceston, Tasmania.
 65. Barbara Strochnetter, Launceston
 66. Sylvia Burkitt, Castle Hill, NSW.
 67. Patti Anson, Hawker, A.C.T.
 68. Bill Leah, Curlewis, NSW
 69. Sheila Leah, Curlewis, NSW.
 70. E. C. Thomas, Toowoomba, Q'ld.
 71. Shirley Fanos, Sydney
 72. Arthur Cocking, Manly.
 73. Brenda Birkett, Page, A.C.T.
 74. N. Curran, Brisbane
 75. Ruth McGrath, Perth.
 76. Ms. V. Egan, Perth.
 77. Ken Eatt, Perth.
 78. May Eatt, Perth.
 79. Alan Towsey, Tahmoor, NSW.
 80. Edna Giles, Manly.
 81. W. M. Leach, Manly.
 82. Joy Coulter, Emu Park, Q'ld.
 83. Alec Morrison, Ipswich, Q'ld.
 84. Ruth Morrison, Ipswich
 85. Kay Morrison, Manly
 86. Sadie Foster, Wynnum, Q'ld.
 87. Rene Smets, Perth
 88. William Wybenga, Morwell, Vic.
 89. Mabel Wybenga, Morwell, Vic.
 90. Sharon Wybenga, Morwell, Vic.

State Distribution: N.S.W. 30; Victoria 18; Queensland 14; Western Australia 13; South Australia 8; A.C.T. 5; Tasmania 2.

LA "A.E."

SUBTEN — FONDUSO

Antaŭe raportita	\$1265.19
S-ino K. Augunas, Melbourne	2.00
S-ro J. N. Prewett, Echuca (2-a donaco)	1.50
S-ino G. Kirkwood, Coff's Harbour	2.00
S-ino F. M. Emms, Melbourne	2.00
S-ino H. Spryer, Halls Gap, Vik.	3.50
	<hr/>
	\$1276.10

FONDUSO POR ESPERANTO-STIPENDIO

Antaŭe raportita	\$1600
S-ino D. Lamberton, Prosperpine, Q'ld	3
Ges-roj M. Leereveld, Melb.	15
F-ino A. Curtis, Nth Tamborine Queensland	5
Ges-roj L. Kish, Perth	5
S-ro M. Beehaz, Perth	20
S-ro D. McQueen, Warragul, Vik.	10
Esperanto-Federacio de Viktorio ..	55
F-ino Shirley Gradussov, Perth	10
"Anonima", Melbourne	100
S-ro Mac LeFevre, Launceston, Tas ..	50
S-ro V. Kosef, Cobar, NSW	10

\$1883

INADEQUACIES IN THE TEACHING OF ESPERANTO

Bernard Golden

Complaints about inadequacies in the teaching of Esperanto are commonplace and various explanations have been proposed to account for the high number of drop-outs shortly after the beginning of almost every elementary course. One of the main reasons for disillusionment on the part of new learners is the exaggerated claims made regarding the ease of learning Esperanto. No one has ever learned the language in a few hours, days or even weeks, despite the boasts of overzealous propagandists. As soon as it becomes apparent that a certain amount of mental exertion is required, some beginners quickly lose heart and desert the course. It is therefore essential to avoid giving the impression that Esperanto can be learned without effort. "Easiness" is a relative motion and de-

pends on many factors which vary among individuals.

Most probably the principal cause of the failure of many courses organized by local groups is the low level of the teaching. Often the task is undertaken by a person impelled by missionary fervour who insists on teaching Esperanto despite his shortcomings and lack of competence. Club authorities frequently assign to such a person the teaching of the elementary course and reserve a better qualified teacher for the advanced level of instruction. But the elementary course is the most important of all, so that the teaching assignments should be reversed. The beginners should receive the best instruction possible, because if they fail to learn the language, there will not be a second chance to repeat the same

error. Drop-outs never return to waste their time again and the Esperanto movement loses them forever. However, there is one exception—the eternal beginners — who manifest a universal phenomenon in the Esperanto movement.

It is bad pedagogy to teach a course in which new learners are grouped together with repeaters of the elementary course. In the first place, those who have failed to learn Esperanto after several starts will hardly be able to profit from additional instruction at the same methodological level. They will again become discouraged when some of the new learners master the language more quickly. A second disadvantage is that they set a bad example and raise doubts in the minds of others about the learnability of Esperanto. Besides the drastic act of barring them from the course, the only practical solution is to establish a special study circle for the eternal beginners which would function as a course for slow learners.

Every professional language teacher is aware of the necessity of preparing lesson plans and arranging the course material in such a way that from the

very first lesson the student acquires useful knowledge and rapidly progresses in all the following lessons. This is true for all methods of teaching a language. The division of the material to be learned must be made on the basis of the nature of the course members — age, previous education, motivation, etc. — and not mechanically according to the chapters in the textbook used.

Another way of misteaching Esperanto is to use the national language excessively for long explanations about grammatical matters and comments on translation exercises. The teacher who himself has only recently completed the elementary course, is hardly in a position to present to his students a model of perfectly pronounced and fluently spoken Esperanto. Therefore, it is again necessary to insist that only the best speaker of Esperanto in the club receive the task of teaching the elementary course. It is not possible to organize a course under the direction of a pedagogically and linguistically competent teacher, it is perhaps advisable to give up the teaching of Esperanto in the local group until there is a possibility of doing the job well.

PROCLAMATION

by order of
Edward I. Koch
Mayor of the
City of New York

NEW YORK HAS BEEN THE POINT OF ENTRY FOR MILLIONS FROM EVERY LAND INTO A BRIGHTER AND BETTER LIFE IN THE NEW WORLD.

THE CITY ENJOYS WORLD-WIDE FAME FOR ITS ECONOMIC AND CULTURAL RICHNESS AND CONTINUES TO HOST A CONTINUAL STREAM OF VISITORS.

NEW YORK HAS FOR MANY YEARS SERVED AS THE CHIEF OFFICE OF THE UNITED NATIONS AND ITS 153 AFFILIATED NATIONS ALL INTERESTED IN A GLOBAL VIEW OF HUMANITY.

MUTUAL APPRECIATION AND FELLOWSHIP WOULD BE ENHANCED IF THERE WERE ONE ACCEPTED NEUTRAL SECONDARY TONGUE

TO FACILITATE COMMUNICATION AMONG THE SPEAKERS OF THE EXISTING 3000 NATIVE TONGUES. ESPERANTO HAS DEMONSTRATED THE EASE WITH WHICH IT CAN BE LEARNED AND ITS PRACTICAL USES IN IMPROVED COMMUNICATION.

NOW, THEREFORE, I, EDWARD I. KOCH, MAYOR OF THE CITY OF NEW YORK, DO HEREBY PROCLAIM THE WEEK OF JULY 12-18, 1981, AS

“INTERNATIONAL FRIENDSHIP ESPERANTO WEEK”

IN NEW YORK CITY, TO COINCIDE WITH THE ANNUAL CONFERENCE OF THE ESPERANTO LEAGUE FOR NORTH AMERICA IN THIS CITY. IN WITNESS WHEREOF I HAVE HEREUNTO SET MY HAND AND CAUSED THE SEAL OF THE CITY OF NEW YORK TO BE AFFIXED

(signed) Edward I. Koch

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscriptions to A.E.A. \$16
(Individual, Club & Federation)
Additional Family Member \$4
Pensioners & Full-time Students
pay a minimum of \$8.



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.
Prezidanto: R. L. HARRY, AC, CBE, 8 Tennyson Crescent, Forrest, A.C.T., 2603
Sekretario: S-ro F. J. FALLU, 10 Sumersett Avenue, Oakleigh South, Vic., 3167
A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. ELLIOTT, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036.
Kasisto: S-ino I. FALLU, 10 Sumersett Avenue, Oakleigh South, Vic., 3167
Korespondaj Kursoj: S-ro J. Moore 7 Pelican Street, Emu Park, Queensland, 4702

N-ro 190 (270)

MELBOURNE

Septembro, 1981

MILIONOJ POR PACO

La Petskribo de Asocioj por Unuiĝintaj Nacioj pri Malarmado

La Tutmonda Federacio de Asocioj por Unuiĝintaj Nacioj (WFUNA) kaj ties filio UNAA subtenas nian kampanjon por la enkonduko de Esperanto en la lernejojn. En januaro "Kuruna", la organo de UNAA, eldonis artikolon de la Prezidanto de AEA "Esperanto—second language for mankind". En Melbourne je la fino de marto la viktoria filio de UNAA kaj la VEF organizis komunan kunvenon en kiu S-ro Harry paroladis kaj sekvis vigla diskutado pri la neceso de komuna lingvo en multkultura mondo.

Nun UNAA havas sian propran kampanjon. Ĝi patronas petskribon por malarmado, lanĉitan en Londono far Lordo Philip (filip) Noel Baker, gajninto de la Pacpremio Nobel.

La petskribo estos prezentita al la Speciala Sesio de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj pri Malarmado en 1982 en Nov-Jorko, kaj ankaŭ al ĉiuj registaroj.

La esprimoj de la peticio ampleksas la celojn kune akceptitajn de 149 registaroj (inter ili la aŭstralia) en la unua speciala sesio de UN pri Malarmado en 1978. Jen la teksto:

TUTMONDA KAMPANJO POR MALARMADO PESKRIBO

Al ĉiuj Registaroj kaj al la Speciala Sesio de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj pri Malarmado, 1982:-

Ni, la Popoloj de la Mondo postulas:-

1. La abolicion de Nukleaj Armiloj kaj de ĉiuj Armiloj de Amasdetruo.
2. La abolicion, laŭ konsentitaj stadioj, de Konvenciaj Armiloj, kio konduku al
3. Ĝenerala kaj Kompleta Malarmado.
4. Transigon de Pormilita Elspezado al la Tutmonda Forigo de Malriĉeco.

Multaj membroj de AEA estas ankaŭ membroj de UNAA, kaj sendube subtenas la kampanjon por malarmado. Aliaj AEA-anoj eble dezirus aliĝi al UNAA, aŭ subteni ties kampanjon por paco. Se vi pretas helpi, aŭ deziras aniĝi, bonvolu kontakti la plej proksiman filion de UNAA. Jen la adresoj:

UNITED NATIONS ASSOCIATION OF AUSTRALIA

VIC.:

5th Floor
28th Elizabeth Street,
Melbourne, Vic., 3000
Phone (03) 654 3627
POSTAL ADDRESS:
P.O. Box 175, East
Melbourne, Vic., 3002

QLD.:

240 Queen Street,
Brisbane, Qld., 4000
Phone (07) 229 2410
POSTAL ADDRESS:
G.P.O. Box 9911
Brisbane, Qld., 4000

TAS.:

4 Battery Square,
Battery Point,
Hobart, Tas., 7000
Phone (002)34 4867
(002) 34 5785

S.A.:

254 North Terrace,
Adelaide, S.A., 5000
Phone (08) 223 1960

A.C.T.:

1a, First Floor,
Baily Arcade,
Canberra City, 2601
Phone (062) 47 4499
POSTAL ADDRESS:
P.O. Box 395 Canberra
City, A.C.T., 2601

N.S.W.:

Room 206,
147A King Street,
Sydney, NSW 2001
Phone (02) 233 5710
233 5719

W.A.:

306 Murray Street,
Perth, W.A., 6000
Phone (09) 321 7030

N.T.:

P.O. Box 5457,
Darwin, N.T., 5790
Phone (089) 81 8808

LA 66-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

(De nia speciala korespondanto Elfriede Ernst, Bruselo)

Estas la unua fojo ke la Universala Kongreso de Esperanto okazis en la suda hemisfero. 1747 gesamideanoj el 50 landoj partoprenis la 66-an, okazintan de la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto, 1981 en la futurisma ĉefurbo Brasilia. Inter tiuj 1747 ĉeestantoj estis 900 brazilanoj.

La urbo disponigis al la kongreso sian tre luksan, nove konstruitan kongrescentron en la kerno de la urbo. La densa programo ampleksis laborkunsideojn, kulturajn kaj amuzajn programerojn, festajn aranĝojn kaj postkongresajn ekskursojn. Speciale menciindaj estas la solenaĵoj, nome la Inaŭguro, la Malfermo kaj la Fermo de la kongreso. La kongresa temo estis: "Kulturoj kaj Lingvoj: Pontoj kaj Baroj".

La solena inaŭguro okazis en la Nacia Parlamentejo — novkonstruita kongrescentro. Alta protektanto de la kongreso estis la Prezidento de Brazilo: S-ro Joao Baptista de Oliveira Figueiredo. Antaŭ la inaŭguro, por la unua fojo, okazis paraŝuta spektaklo ekster la Parlamentejo: verda stelo falis el la ĉielo. S-ro Gregoire Maertens, Prezidento de UEA, malfermis la kongreson. Alparolis Dr. Aureliano Chaves, Vicprezidento de Brazilo; i.a. li diris "Esperanto estu ne nur universala lingvo de inteligento, sed universala lingvo de sento. Se tiel ĝi estas, mi kredas, ke la laborado de Zamenhof ne povas resti nedisvastigita, ĉar la homaro vere be-

zonas tian lingvon, des pli nuntemp. Sekvis la salutoj de 14 ŝtataj reprezentantoj kaj la parolado de S-William Auld pri la kongresa temo Dum la inaŭguro kunveno okazis ankaŭ la lanĉo de la poŝtmarko kaj porokaza poŝta stampo de la kongreso.

Multaj artikoloj aperis antaŭ kaj dum la kongreso en la brazila gazetaĵo ĉiutage la radio elsendis informojn pri la kongreso; la brazila televido intervjuis la vicprezidento de Brazilo kaj reprezentanton de la kongreso, Alt-Protaktanton S-ron Aureliano Chaves.

La Malfermo de la 66-a kongreso okazis posttagmeze, en kies kadro reprezentantoj de landaj asocioj prezentigis; sekvis raporto pri la organika evoluo de UEA: oficejo en New York kie tasko estas informado al la eksterlandaj delegacioj; aĉeto de nova domo en Antverpen, kie parto de la UEA-laboro estas farota; scienca eldona oficejo en Budapeŝto. Dr. Tonkin legis la salutmesaĝojn, i.a. la mesaĝon de Ĝenerala Direktoro de Unesko, Amaduo Mahtar M'Bow.

Jen plena teksto de la mesaĝo: "Mesaĝojas denove direkti mesaĝon al la kongreso de Universala Esperanto Asocio, por kio mi invite foje alparolanta antaŭ 4 jaroj en Rejkjaviko. Mi kaptas la okazon konfirmi la intereson, kiu UNESKO havas por la agado de UEA kaj mi nepre konfirmas ĝian grandan kontribuon al la disvolviĝo de internaci-

komunikado, interkompreniĝo inter la popoloj kaj pere de ili al plifortikigo de la paco en la mondo, kiuj estas la ĉefaj celoj de nia organizaĵo UNESKO.

Ci-jare UEA elektis temon "Kulturoj kaj lingvoj: Pontoj kaj Baroj". Tiu temo kunligigas kun ĉefa intereso de Unesko. Nia organizaĵo senĉese batalas kontraŭ ignoro de alies kulturoj, obstakloj al bona kunvivado inter la nacioj, kio naskas miskomprenojn kaj konfliktojn. Tia agado de nia organizaĵo celas promociigi pliprofundigitan kulturen informadon kaj lingvoinstruadon, ne nur de la lingvoj de najbaraj landoj, sed de la lingvo de pli granda disvastiĝo, por malfermi en la lingvaj bariloj trapasejojn permesantaj la disvolvigon de la komunikado kaj dialogo inter homoj kaj ampleksigon de la kulturoj en reciproka respekto de opaj trajtoj.

Ci-cele mi deziras ke la kunlaboro inter UEA kaj UNESKO daŭru en la plej bonaj kondiĉoj kaj ke la laboroj de tiu kongreso estu instruiciaj kaj sukcesplenaj".

Post tiu mesaĝo sekvis salutvortoj de neesperantistaj asocioj. Kiel lastan eron de la malfermo S-ro Maertens, prezidanto de UEA, faris festparoladon, kiun sekvis la himno "La Espero". Estis vere digna malfermo.

La saman tagon vespere okazis en la Katedralo la Sankta Meso. La konika katedralo estas 33 m alta kaj havas 66 m diametron; ĝi aspektas kiel aranejo kun ĝiaj oblikvaj fakoj el betono. Estas

ultra moderna aŭdaca konstruaĵo.

Tre aprezita programero de ĉiuj kongresoj estas la Interkona Vespero. La Gubernierito de la Federacia Distrikto, kie situas Brasilia, invitis ĉiujn kongresanojn al oficiala akcepto. La brazila vespero havis multe da sukceso; ĝi estis bunta, verva spektaklo. La ĝeneralaj kunsidoj, kiel aliaj kunvenoj, okazis ĉiam antaŭ plenplena salono. La merkredaj tuttagaj ekskursoj estis bonvena malstreĉo. Unu ekskurso gvidis al la akvofalo Itiquira, 115 km for de Brasilia en regiono de vere sovaĝa beleco. La 168 metrojn alta akvofalo, nomata ankaŭ "Fianĉina vualo", multe allogas naturamikojn, La dua ekskurso gvidis al Cristalina, 135 km for de Brasilia, centro por la ekspluatado kaj komercado de juvelŝtonoj.

Ero de la programo estis la renkontiĝoj kun estraranoj de UEA, kiuj ĉiam duope sin prezentis kaj respondis al la demandoj de la ĉeestantaro. Nepe menciindaj estas la Belarta Konkurso kaj 12 elstaraj sciencaj prelegoj. La fermo de la kongreso estas ĉiam iasence trista. Kiam la kongresanoj alkitimiĝis al la tre bela kongresurbo, al la kongresejo, al la lokaj kutimoj kaj manĝoj kaj kiam ili interkonatiĝis inter si la kongresa semajno finiĝis. Kiel lasta ero de ĉiuj kongresaj feroj estas la transdono de la flago al la reprezentanto de la venonta kongresurbo, ĉi-foje Antwerpen en Belgio.

SAT SESDEKJARA

Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), kiu fondiĝis en 1921, en ĉi tiu jaro sesdekjariĝis kaj aranĝis sian 54-an kongreson en Bazelo (Svislando) de la 1-a ĝis la 8-a de aŭgusto 1981. Bedaŭrinde la ekonomia krizo en Eŭropo kaj Ameriko permesis nur al ĉirkaŭ 300 membroj (el 16 landoj) partopreni la kongreson, kiu pro sia riĉa enhavo estus meritinta pli multnombrian partoprenantaron. De la interkona ĝis la adiaŭa vespero la etoso de la kongreso montris, ke eĉ en malfacilaj tempoj la sennacieca amikeco daŭras kaj kunigis nin por peresperanta laboro kaj same por la ĝuado de la amuzaj kaj klerigaj aranĝoj de la kongreso, se ne paroli pri la sunbrila vetero, kiu ĝojigis heligis ekskursojn, du duontagajn al Juraso aŭ Nigra Arbaro aŭ Vogezoj kaj rondveturadon tra Bazelo kaj unu tuttagan kun ŝipveturado sur la tri lagoj inter Bienne (Biel), Neuchatel (Neuenburg) kaj Morat (Murten).

Dum la aliaj tagoj okazis prelegoj, kies prelegantoj kaj temoj estis:

1-e: Gernot Ritterspach "Trajnoj sen radoj". Li lumbilde klarigis la ventontan fervojan evoluon al senrada glitado de trajnoj pere de magnetaj fortoj. (Vd. 'A.E.', Julio 81, p. 34)

2-e: Claude Gacond "E-pioniroj en Svislando". Li montris la reciprokajn rilatojn inter la ĝeneva filozofo Erneste Naville, la fondintoj de UEA Hector Hodler kaj Eduard Stettler, Rene de Saussure, la E-pioniro Edmond Privat kaj Eŭgeno Lanti, la fondinto de SAT.

3-e: Claude Gacond "La socia kaj politika vivo en Svislando". Li klarigis la svisajn nociojn de egaleco de ŝtatoj, neŭtraleco okaze de konfliktoj, religia libereco, proporcia reprezentado de la politikaj tendencoj kaj finfine de la svisa "laborpaco".

4-e: Werner Werder (Ĝen. Sekretario de la Naturamika Internacio)

“La Naturamika Internacio kaj Esperanto”. La prelego iomete belege harmoniis kun la elstaraj artaj ĝuoj, kiujn la partoprenantoj dum longa tempo ne forgesos. Olivier Tzaut, la ĉiam bonvena E-kantisto, per sia bela voĉo prezentis kanzonojn de siaj diskoj “Tra la mondo” kaj “Karnavaleto”. Dum folkloria vespero Svislando sin prezentis per jodlista klubo, akordionistoj, alpokornistoj kaj la flagsvingisto Max Frei Arlesheim, kiu svingis la flagon kun blanka kruco sur ruĝa fono en la ritmo de svisaj melodioj.

Ĉi tiu klariga parto de la kongreso belege harmoniis kun la elstaraj artaj ĝuoj, kiujn la partoprenantoj dum longa tempo ne forgesos. Olivier Tzaut, la ĉiam bonvena E-kantisto, per sia bela voĉo prezentis kanzonojn de siaj diskoj “Tra la mondo” kaj “Karnavaleto”. Dum folkloria vespero Svislando sin prezentis per jodlista klubo, akordionistoj, alpokornistoj kaj la flagsvingisto Max Frei Arlesheim, kiu svingis la flagon kun blanka kruco sur ruĝa fono en la ritmo de svisaj melodioj.

Kiel ĉiam dum SAT-kongresoj, plej gravas la laborkunsidoj, kiujn preparis laborgrupoj, LEA-komitato kaj fakaj sekcioj. Oni nepre devas menciĝi, ke la svisa publiko informiĝis pri la kongreso, la Internacia Lingvo kaj la celoj de SAT per ampleksa artikolo en la “Basler Zeitung” (Bazela Ĵurnalo) kaj la publika intereso montriĝis per la partopreno de reprezentantoj de la kantona administracio, de sindikata kartelo kaj de politikaj partioj.

La Postkongreso kaj Internacia Ferisemajno, okazinta en Lucerno, montris la plej belajn pejzaĝojn svislandajn al multaj kongresanoj, kiuj ĉiuj ne bedaŭris sian partoprenon kaj impresoriĉe hejmenveturis.

—Ortwin Brodt, Weilburg, Germanio (La 55-a Kongreso de SAT okazos en Iisalmi, Finnlando de la 31/7 ĝis 6/8, 1982).

Dr. Arthur Baur en “Svisa Radio Internacia”

TERRE DES HOMMES

Depost 20 jaroj laboras el Lausanne grupo de homoj en la tuta mondo por savi infanojn. La organizo nomiĝas “Terre des hommes”, kaj tio estas malfacile tradukebla. Laŭvorte “Terre des hommes” signifas “tero de la homoj”, sed laŭsence oni devus eble traduki “tero, kiu estu digna, por ke homoj vivu sur ĝi”, aŭ eble “homoj kiuj estus dignaj por vivi sur la tero”. Oni ankaŭ ne sukcesis traduki “Terre des hommes” germanen, kaj do lasas ĝin netuŝita en ĝia franclingva formo.

“Terre des hommes” estis fondita en 1960 de viro, kiu estas eksterordinara kaj vivis eksterordinaran vivon: Edmond Kaiser. Li dum jaroj kontraŭstaris, ke liaj kunlaborantoj nomu lian nomon kaj kiam la franca verkisto Bernard Clavel en 1970 publikigis libron pri “Terre des hommes” utiligante ankaŭ la korespondadojn kun Kaiser, li nomis Sin nur “frato en la ombro”. La libro aperis sub la titolo “Le massacre des innocents”, t.e. “la masakro de la senkulpo”, sed la germana traduko, kiu aperis en la lasta jaro, nomiĝis “Kinder im Elend”, t.e. “Infanoj en mizero”. La amikoj de Edmond Kaiser fine persvadis lin, ke lia anonimeco ne estas plu tolerbla de la publiko, kiu volas scii kiu li estas, al kiu ili donacas monon por efektivigi lian laboron je la bono de la infanoj. Tial li fine eĉ verkis libron — tre dikan kun 580 paĝoj — en kiu li rakontas pri sia vivo. La titolo estas: “La marche aux enfants”, t.e. “la vojo al la infanoj.

Edmond Kaiser naskiĝis en 1914 en Parizo kiel filo de juda komercisto kaj li mem fariĝis komercisto kaj verkisto, sed nun, cetero, vivas el la rimedoj, kiujn grupo de personaj amikoj kolektas inter si, por ke li povu plene dediĉi sin al “Terre des hommes”, eĉ ne bezonante utiligi ties monon por si mem. Lia principo ĉiam estis, fari kiel eble plej malgrandajn administrajn spezojn por ke ĉiu mono kolektita estu plene uzita por la laboro.

Dum la milito li laboris en la franca movado de la rezisto al la germanoj, estis al morto kondamnita de la germanoj, sed ili neniam sukcesis kapti lin kaj ŝajnas, ke li ludis tre gravan rolon en la rezistado, sed en sia modesteco li prisilentas tion. Post la armistico li dank’ al sia kono de la germana lingvo kaj dank’ al sia rango kiel kapitano akirita en la rezisto, li laboris en la franca armeo de okupado en Germanujo, sed en 1947 li mem fariĝis viktimo de kalumnio kaj devis pasigi kelkajn monatojn en malliberejo, ĝis la senŝenco de la akuzo estas pruvita. Poste li translokiĝis al Lausanne, kie jam vivis lia patrino, kaj fariĝis svisoj. En 1941 lia dujara filo Jean-Daniel falis en lavujo kaj dironis. La evento profunde skuis la patron kaj de tie naskiĝis lia sentemo por la infanoj.

En 1948 li fondis grupon “Gens de compagnie”, kies celo estis subteni ĉiujn mizerulojn; en 1957 li kunlaboris kun

Abbe Pierre, kaj en 1960 li komencis labori por la senkulpaĵaj malgrandaj viktimoj de la militoj kaj de la malsato. Baldaŭ li trovis helpantojn, kaj el lia kiel eble plej maloficiala grupo fariĝis organizo kaj movado.

Bernard Clavel, la nomita aŭtoro de la libro pri "Terre des hommes", formulis tion jene "Iu homo povas suferi, ĉar li aŭ lia registaro faris eraron, sed la infano neniam faris eraron kaj ĉiam pagas per siaj suferoj por la eraroj de aliaj. Ni certe devas batali kontraŭ la milito, malsato kaj malsano kaj ni scias, ke tiu batalo estos terure longa. Neniam rezignante pri tiu batalo ni devas rompi la absurdan regulon, ke ĉiam kaj ĉie infanoj fariĝas la viktimoj de la stulteco de la plenkreskuloj".

Tio do estas "Terre des hommes". Ĝi estas formita de libervolaj kaj bonvolaj batalantoj, kiuj orientiĝas al komuna unika celo, nome la helpo al la infanoj, por kiuj la helpantoj estas samtempe la ambasadoroj kaj la efektivigo de ilia vivo, de ilia pluvivo kaj de ilia konsolo. Tiun principon Edmond

Kaiser neniam forlasis, kaj por li ĉiu infano estas unika estaĵo.

Edmond Kaiser trovis multajn helpantojn, en 15 kantonoj de Svislando, li trovis laborgrupojn, kiuj helpas al li, inter alie per la kolektado de la necesaj rimedoj. En la lasta jaro ili kolektis dekmilionojn da frankoj. Krom la libervoluloj, laboras en Lausanne 25 personoj plentempe, kiuj havas modestan salajron, ĉar ili tamen devas vivi. Kaj kiel oni helpas? Per medicina helpo, multaj svisaj kirurgoj operacias senpage infanojn, kiujn TdH venigas el la landoj, kie regas mizero. TdH nutras malsatantojn kaj tre grave estas la periodo de infanoj, kiuj trovas en Svislando novajn gepatrojn pretaj adopti ilin. Ne estas malfacile trovi tiajn gepatrojn, sed ofte estas malfacile venki la burokratajn barilojn en la landoj, el kiuj la infanoj estu savitaj. Homa stulteco kaj mallarĝanimeco ĉie estas trovebla. En 50 landoj TdH jam laboris kaj ĝi savis jam dekmilojn da infanoj, ĉiu unuopa infano reprezentas historion de sufero kaj mizero.

NOVAĴOJ EL JAPANUJO

(De nia japana korespondanto
Bun'ichi Iŝizaki)

KLEG jubileis: La plej forta kaj plej aktiva Esperanto-organizo en Japanujo estas KLEG, la Kansaja Ligo de E-Grupo. Ĝi fondiĝis antaŭ 30 jaroj kaj ĵus festis tiun datrevenon per tre sukce a kongreso en la urbo Sakai, apud Osaka. Venis pli ol 200 esperantistoj de Hokkaido en la nordo ĝis Kjuŝuu en la sudo. Ĉefan prelegon faris la konata E-verkisto MIYAMOTO Masao, kiu parolis pri la temo "La pezo de la 30-jara movado de KLEG".

Okazis gaja kulturfesto en kiu aliĝintaj societoj prezentis "Romeo kaj Julieto"-n de Sekspiro, lumbild-prelegojn kaj pupteatraĵojn. Sur vasta muro de la kongresejo oni ekspoziciis 350 kovrilpaĝojn de la liga organo "La Movado". Lokaj gazetoj raportis pri tiu jubilea kongreso.

USONANOJ vizitis Tokion: Revenvoje de Ĉinio al Usono, dek unu usonaj esperantistoj vizitis Tokion kaj Kionton. Honore al ili, la Japana E-Instituto aranĝis sian 6-an publikan prelegkunvenon en ĉesto de 60 aŭskultantoj. S-ro A. Viktor (Nov-Jorko) parolis pri la temo "Usonanoj travojaĝis Ĉinion uzante nur Esperanton". S-ro J. Manson klarigis la laborojn faritajn de la Novjorka Oficejo de UEA kaj petis financon helpon por daŭrigi tiun gravan laboron.

Charles POWER en Tokio: La Konstanta Kongresa Sekretario de UEA vizitis Tokion en junio kaj la Japana E-Instituto aranĝis sian 7-an publikan prelegkunvenon. S-ro Power parolis pri "Kosmaj Komunumoj por homoj". La prelego estis ilustrita per 61 bildoj kaj s-ro HIRAYAMA Tomihiro, astronomo de la Tokia Astronomia Observatorio interpretis por ĉeestantaj ne-esperantistoj.

AŬSTRALIA= =KRONIKO

● **PERTH:** Je 8-a julio Ruth McGrath prezentis artikolojn el "Esperanto" kaj "Brita Esperantisto". Tri grupoj diskutiĝis "Ĉu necesas havi bestĝardenojn?", "Ĉu ni devas uzi spicojn kun manĝaĵoj?", "Ĉu arboj posedas cerbojn?".

Je 22-a de julio nia gasto estis Dorothy Fulford el Anglujo. Ŝi prelegis pri sia hejmurbo Bristol kaj pri aliaj Esperanto-grupoj, kiujn ŝi vizitis.

● **ADELAIDE:** Je 4/8 okazis kunveno en la Universitato. Kiel preskaŭ ĉiam ni diskutis nur pri kongresajn aferojn. El Sidnejo venis sugesto de Prof. R. Robertson ke almenaŭ 7 gekongresanoj ŝatus resti en Adelaide post la kongreso. Ĉar ni kredas ke eble aliaj kongresanoj deziras fari same, ni serĉis,

kaj trovis malmultekostan kolegion (St. Ann College), kie postkongresanoj povos loĝi por \$5 ĉiutage. La kolegio funkcias kiel junulargastejo; kongresanoj loĝos en unutilaj ĉambroj kaj uzos komunan kuirejon por mem prepari manĝojn. Se vi deziras partopreni postkongreson, kontaktu nin.

—Bob Felby.

● **MELBOURNE:** Bonvena vizitanto ĉe nia kunveno de 6-a julio estis S-ano Jaan Lokna el Farsta (Svedujo). Estondevena sveda civitano li venis al Melbourne por kvarsemajna vizito al sia filino. Harry Beechey parolis pri "Unua Helpe" kaj li rakontis pri la ŝanĝoj en la metodoj de "Unua Helpe" de kiam li unuafoje faris similan kurson.

Ges-roj Durham, el Romford (Anglujo) vizitis nin je 13-a de julio. Nancie Durham parolis kun lumbildoj pri vizito al ĉinio — La Granda Muro, Peking, Shanghai kaj aliaj urboj, kiel ankaŭ renkontiĝoj kun esperantistoj de Radio Pekino kaj "El Popolo Ĉinio".

Alia vizitanto al la Melburna E-Societo estas S-ro Jan Makowski el Varsovio, Pollando. Li venis al Melbourne per sesmonata turista vizo por viziti sian kuzinon, kiu estas medicina doktoro en Melbura hospitalo. Je 20-a de julio li prelegis pri "Edukado al Naturprotektado", multflanka, nova kaj tre grava studtemo, pri kiu li okupiĝis en sia hejmlando.

Ĉe la amuzvespero de 27-a de julio, S-ro H. Koppel montris diapozitivajn pri vojaĝo tra Centra Aŭstralio kaj priskribis grimpadon al la supro de rokego "Ayers".

● **MANLY:** Je la 30-a de junio bonvenaj vizitantoj al la Vespera Lernejo estis Ges-roj Gibson de Launceston kun sia gasto el Japanio, S-ro Sakamoto, kiu parolis pri sia hejmurbo Ikeda. Dimanĉon 19-an de julio, en Esperanto-Domo, Manly-anoj ĉeestis por ĝui lumbildojn pri Ĉinio kaj ĉinaj esperantistoj montritajn de Ges-roj Durham de Ilford, Anglujo.

Ĉe la hejmo de Ruth Carruthers, la postan vesperon, okazis festmanĝo, kantado, kaj prezentado de skeĉoj por bonvenigi ilin al Manly.

La 21-an de julio okazis speciala renkontiĝo en la vespera lernejo, kie niaj vizitantoj denove distris nin per belaj lumbildoj kaj interesa parolado pri Meza Sovet-Azio. Gastigis ilin en siaj hejmoj dum ilia restado en Manly, Marjorie Duncan kaj Arthur Cocking. Poste, aperis en la loka ĵurnalo letero skribita de S-ino Durham en kiu ŝi dankis al la anoj de nia klubo kaj laudis la utilecon de Esperanto kaj la belecon

kaj amikecon de Manly.

La kvar grupoj en la vespera lernejo bone progresas kun meznombro 25 ĉeestantoj. Ĉiuj tie adiaŭis Les kaj Bess Scott, kiuj flugis al Brazilo por partopreni en la Universala Kongreso en Brasilia, kie Les oficiale reprezentas A.E.A. Letero de Hawaii estis ricevita de nia maristo, Ann Gash. Ŝi intencas reveni hejmen je la fino de oktobro.

—EUNICE GRAHAM.

● **SYDNEY:** Steve Cooper raportis, 13/7, pri sia vizito al Sovetunio. Li estis delegito al Sindikata Konferenco en Moskvo, kaj vizitis aliajn urbojn. Li renkontis esperantistojn en Moskvo kaj Leningrado.

Nancie Durham, 20/7, prelegis per lumbildoj pri Ĉinio kaj Rusujo. Semajnon poste, James Harwood prelegis kun lumbildoj pri Insulo Norfolk. Li estis tie dum la "Festo de la Bounty", kaj fotografis la descendantojn de la "Pitcairn-Insulanoj" en la kostumoj de tiu tempo.

Margaret Chaldecott (3/8) pretendis, ke ŝia amo al hundoj komenciĝis antaŭ 70 jaroj, kiam ŝia patrino uzis sian kompatindan ŝafhundinon kiel garantion kontraŭ prunteprenata mono. Ŝi priskribis 8 hundojn, kiuj apartenis al ŝia familio dum la jaroj. Pro malsano de Jim Harwood, kiu intencis prelegi pri "Sorto aŭ Koincido", ni runde diskutis la temon. (10/8). La plimulto el ni rakontis pri koincidadoj en niaj vivoj, ekzemple, la stabo de unu lernejo, kiu inkludis Fred Black, Kevin White kaj Bob Gray, kaj la stabo de Trafikintrol-oficejo tri el kiuj havis la saman naskiĝtagon.

La Sidneja E-Societo donacis \$50 al la Nov-Jorka UEA-oficejo por helpi antaŭenigi la laboron ĉe UN.

—REVANTO.

● **BRISBANE:** Je 11 - 13-a de septembro okazos studsemajnfino ĉe Tamborine. Tie ni ne nur studos sed ankaŭ preparos erojn por la federacia konferenco en oktobro. Dum la malfermo de la Esperanto-Muzeo la kantgrupo partoprenos kaj estas taŭga okazo prepari erojn.

La 19-an de julio Ray Ross alparolis Asocion de Tre Inteligentaj Infanoj. Ankaŭ ĉeestis instruistinoj kaj patrinoj. Poste, la estrino diris, ke ŝi intencas proponi, ke oni instruu Esperanton dum estontaj klasoj, ĉiusemajne. Sainas ke en du lernejoj en Brizbano, la Edukada Fako starigos klasojn speciale por tiaj geknaboj.

Por ĉeesti la kongreson en Adelaide, 16 anoj veturos aŭte, per oksidlokaĵ

autoj, kaj vizitos laŭplacé vidindaĵojn inter Brizbano kaj Adelaide. Ni tre ĝuis la viziton de Ges-roj Durham el Anglujo. S-ino Rige Hale gastigis ilin, Edna Jullie, Ray Ross kaj Trevor Steele montris al ili la kamparon kaj ĉirkaŭ 20 ĉeestis la hejmon de John Paroz, kie Ges-roj Durham montris lumbildojn pri Ĉinio. —RAY ROSS.

LA "A.E."

SUBTEN — FONDUSO

Antaŭe raportita	\$1276.10
S-ro E. McKenzie, Melbourne	2.00
"Roko", Rockhampton (2-a Donaco)	20.00
S-ro H. Koppel, Melbourne (3-a Donaco)	2.00
	<hr/>
	\$1300.10

FONDUSO POR ESPERANTO-STIPENDIO

Antaŭe raportita	\$1883
S-ro Len Drummond, Melbourne	5
Ges-roj J. F. & K. M. Wright, Sydney	10
S-ro N. Butkunas, Melbourne ..	20
S-ro J. Herbert, Perth	10
"Roko", Rockhampton	50
S-ro Ralph Harry, Canberra (3-a Donaco)	100
S-ino M. Ellyard, Canberra	20
S-ino M. Frogley, Melbourne	5
Toowoomba Esperanto Society	20
	<hr/>
	\$2123

23rd AUSTRALIAN ESPERANTO CONGRESS

Jan. 2-9, 1982 — Adelaide, S.A.

This congress will be held at the "Lincoln College" in North Adelaide, not too far from the city centre. All congress members will be accommodated in comfortable rooms in the College and the cost for the room and all meals will be approximately \$20 per day.

Congress Fee: \$20.00. Pensioners and Full-time Students \$15.00.

Mail your Congress Fees to the Treasurer Mrs. B. Randles, 35 Roslind Street, Kensington Gardens, S.A. 5068. If you wish to stay at the College, please add \$10 for room deposit and a stamped, addressed envelope for your receipt.

8th List of Congress Members:

91. James Harwood, Sydney.
92. Dorothy Threlfall, Perth.
93. Malcolm Ross, Manly,
94. Adelaide Ross, Manly.
95. Teresa Netherall, Marmong Pt., NSW.
96. Harold Gilbert, Cairns, Q'ld.
97. H. M. Cohen, Melbourne,
98. Gerald Tumman, Healesville, Vic.
99. Ruth Tumman, Healesville.
100. Mac LeFevre, Launceston.
101. Nan McGuckin, Brisbane
102. S-ro H. C. Bailey, Brisbane.
103. Cliff Tronerud, Tweed Heads, NSW
104. Marcel Leereveld, Melbourne
105. Alida Leereveld, Melbourne
106. Vlado Kosef, Cobar, NSW
107. Ian Nelson, Downer, A.C.T.
108. Trevor Steele, Brisbane
109. Dr. Ross Robbins, Mildura, Vic.
110. S-ino E. Jullie, Brisbane.

State Distribution: N.S.W. 36; Victoria 24; Queensland 19, Western Australia 14; South Australia 8; A.C.T. 6, Tasmania 3.

U.E.A. urĝe bezonas financan helpon

La oficejon, kiun UEA lastatempe starigis en Nov-Jorko, minacas fermiĝo pro neatenditaj kaŭzoj, kiuj faris ĝin pli altkosta. UEA do starigis specialan fonduson por ebligi la daŭrigon de tiu grava laŭparolilo ĉe U.N. dum ĉi tiu kriza periodo antaŭ nia centa datreveno en 1987.

Tiu, kiu donacos la ekvivalenton de US \$100 fariĝos Patrono de la Nov-Jorka Oficejo; tiu, kiu donacos la ekvivalenton de US \$25 fariĝos Subtenanto de la Nov-Jorka Oficejo, kaj tiu, kiu donacos US \$10 fariĝos Amiko de la Nov-Jorka Oficejo.

UEA urĝe petas donacojn por ebligi la daŭrigon de tiu treege grava oficejo. Sendu vian donacon al Ken Linton, 4/2 Lyons Street, Glenhuntly, Vic., 3163.

Jam kontribuis: S-ro W. T. Steele (kiel Patrono); S-roj S, J. Campbell, S. Kanaĉki, K. G. Linton (kiel Subtenantoj); S-ro E. C. Thomas (kiel Amiko)

Juna fraŭlino: "Ho, S-ro profesoro!

Kion povus rakonti tiu ĉi maljuna kverko, se ĝi povus paroli?"

Profesoro: "Ĝi dirus: pardonu min, mia fraŭlino, mi ne estas kverko, sed tilo."

WHO'S WHO IN AUSTRALIAN ESPERANTO

12 — TIM EINIHOVICI

The Patient Doctor.

(Ear, nose and throat specialist)

Tim was born in a "small" village (10,000) in the Ukraine. A primitive place — no roads, no streets; only one primary school attended by very few, for education was neither compulsory nor considered important.

Fortunately, Tim was tutored privately until age 12, then was sent to a "middle school" quite a distance from his home. In 1916 he matriculated. He knew about Esperanto, but no one dared show interest. The Tsar's regime, totalitarian and reactionary, frowned on such things, so the way of safety was the way of feigned lack of interest in intellectual matters. (However Tim eventually managed to smuggle out an Esperanto journal which was presented to W. Auld's library.)

The wind of revolution, in 1917, blew Tim some good for the racial and political barriers to his entering the University were blown away. He, with his peers, took an active part in the revolution, hoping to usher in a free new world.

A forlorn hope! The country was plunged into a 2 years' civil war during which Tim survived incredible dangers. After that precarious youth, he managed miraculously to escape into Rumania—empty-handed and penniless but happy to be alive.

At that time, any form of culture, let alone Esperanto, in that country was virtually non-existent. After 2 years, Tim migrated to Italy where he met Prof. Caldera who took him under his wing and became his inseparable tutor and friend. There, having at last found a sense of security, he achieved the distinction of becoming a member of the famous Pavia University and medical assistant to Prof. Caldera.

A stimulating and happy life! Unfortunately, the Prof., an active anti-fascist, had to leave Italy and migrate to Australia. No, fortunately in the long run! In 1939, with a world crisis looming, Tim joined his friend in Perth.

But not for long! For security, and because medical men were needed, he went to a country practice 150 miles away. What a life for a doctor! No

facilities, a grave shortage of water and, worst of all, this doctor could not speak English. Yet freedom and a happy family life were great compensations.

On his infrequent visits to Perth Tim attended the Esperanto League so efficiently guided by Caldera. Soon he became a keen student and, convinced that the best way to learn is to teach he formed a group of young students at the local school. One of the students asked, "Why are you learning Esperanto when you know so many other languages?" The reply was, "Esperanto lets one reach all people, everywhere by means of just one language".

After the war, back to Perth, Tim became an active, enthusiastic member of the Esperanto League and, in due course, became its president. In quick order, he passed his examinations, Australian and British, at all levels.

He finds immeasurable satisfaction in his association with the Esperanto movement, local and international. He corresponds with Esperantists in many countries, subscribes to and contributes to most of the international Esperanto publications, and enjoys his comprehensive library.

Yet the climax of his pleasures is found in attendance at, and participation in, international conferences and congresses, where on several occasions he has conveyed Australian greetings. His "inward eye" is a kaleidoscope of vivid memories — scenes of Iceland, "Bona Espero" in Brazil, Scotland, Canada, Switzerland, Bulgaria, Finland, Yugoslavia, Italy and many others. (By the way, his fluency in Italian was recognised by his election as president of the W. A. Dante Alighieri Society.)

For these rewarding pleasures, he acknowledges a great debt to his life-long friend and mentor, Dr. C. J. Caldera.

The longer Tim lives (and he has already lived long) the more he is convinced that Esperanto is one of the most effective answers to many world problems. — ARTHUR COCKING.

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscriptions to A.E.A. \$16
(Individual, Club & Federation)
Additional Family Member \$4
Pensioners & Full-time Students
pay a minimum of \$8.



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.

Prezidanto: R. L. HARRY, AC, CBE, 8 Tennyson Crescent, Forrest, A.C.T., 2603

Sekretario: S-ro F. J. FALLU, 10 Sumersett Avenue, Oakleigh South, Vic., 3167

A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. ELLIOTT, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036.

Kasisto: S-ino I. FALLU, 10 Sumersett Avenue, Oakleigh South, Vic., 3167

Korespondaj Kursoj: S-ro J. Moore 7 Pelican Street, Emu Park, Queensland, 4702

N-ro 191 (271)

MELBOURNE

Oktobro, 1981

NENECESAJ VORTOJ EN ESPERANTO

DE

ALAN TOWSEY

Mi estas tute certa, ke ĉiu (krom eble la filozofoj kaj politikistoj!) samopiniis kun mi, ke oni devus ĉiam peni esprimi sin en sia propra lingvo kiel eble plej klare.

Mi estas egale certa, ke ĉiu samopiniis kun mi, ke tio estas eĉ pli necesa en internacia lingvo, kia Esperanto.

Plue, laŭ la intenco de D-ro Zamenhof, la esenco de Esperanto estas simpleco. Pro tiu celo li tiel kreis la lingvon, ke ĝi bezonas minimuman memoron en la lernado, kaj por la gramatiko kaj por la vortprovizo.

Tamen, ŝtelpaŝis en la lingvon multaj vortoj, kiuj tute ne estas necesaj. Ties signifon oni povas jam tre facile kaj klare esprimi per jam ekzistantaj vortoj, kaj la uzado de tiuj vortoj plimalfaciligas la lingvon por ĉiuj — ia ajn plua memorpeno estas malfaciligilo, kaj des pli por ne-Eŭropanoj.

En mallonga artikolo, kia ĉi tiu, ne estas eble citi ĉiujn tiajn vortojn, kiujn mi renkontis dum mia legado; mi elektos do nur kelkajn ekzemplojn por prezenti mian tezon.

Zamenhof enkondukis la prefikson **mal-** por montri "ideon logike kontraŭan al tiu, kiun montras la radiko" (PIV), tiel forigante la neceson lerni

multajn vortojn, kiujn oni devas aparte memori en la naciaj lingvoj. Sed kion ni trovas hodiaŭ **trista** (malĝoja), **aperti** (malfermi), **responi** (respondi por, esti respondeca), **kurta** (mallonga), **pigra** (mallaborema), ktp. Eĉ Zamenhof mem estis kulpa — ekzemple, **pigra** estas Zamenhofa vorto, laŭ PIV!

Ĉu ni nun uzu **maltrista** por **ĝoja**, **malkurta** por **longa**, **malpigra** por **laborema**?

Ankaŭ por ŝpari la memoron, Zamenhof enkondukis la utilan vorton **bleki** por indiki la kriojn kutime eligitajn de ĉiuj bestoj: ĉu ĉevalo, ĉu hundo, ĉu bovino blekas, ni tuj komprenas. Sed jam en la Fundamento ni trovas **boji**, kaj depost tiam nun **heni**, **kokeriki**, **miaŭi**, ktp.

Kalocsay argumentas, en "La Evoluo de nia Poezia Lingvo" (Lingvo, Stilo, Formo, 2a eldono, 1970), ke tiaj vortoj estas necesaj por la poezio, aŭ la "alta" literaturo, aŭ kelkfoje por mallongigi esprimon aŭ por pliprecizigi la penson, kaj riĉigas la lingvon.

Mi ne tute samopiniis. Rilate la poezion, jes, mi povas vidi, ke kelkfoje utila povas esti vorto, kia **pigra**, por rimigi kun **nigra**, **kurta**, por rimigi kun **turta**, **trista**, por rimigi kun **optimista**,

aŭ eĉ por la ritmo.

Sed ili neniam estas necesaj en la prozo! Oni ja difektus la ritmon de "Nomis la leporo moke la testudon pigra", ŝanĝante ĝin al "... la testudon mallaborema"! Sed ĉu "La urson malindigas granda malpenemo" estas malpli bela ol "La urson malindigas granda pigreco"? (Mi mem trovas la unuan trazon eĉ pli bona!)

Kaj la uzon de tiaj vortoj en ordinaraĵ artikoloj oni neniel povas pravigi. Ofte ŝajnas al mi (sed eble ĉi tio estas juĝo tro severa), ke tiaj verkantoj nur volas paradi sian vastan klerecon! En internacia lingvo, tamen, tia sinteno ne havas lokon.

Mi koncedas, ke estas kelkaj ĉelimaj vortoj, pri kiuj mi ne estas certa. Ĉu, ekzemple, **rara** estas vere necesa por esprimi la ideon, ke io havas ian valoron pro sia malofteco? Ĉu **aperta** pro sia iom speciala signifo en "aperta kunveno", aŭ "aperta urbo"? Sed **aperti**: tute ne! (eĉ kvankam ĝi estis uzata de Grabowski kaj troviĝas jam en la 1910-a eldono de la "Dictionnaire Complet Esperanto-Français" de Grosjean-Maupin!).

Kaj mi koncedas ankaŭ, ke por diverseco oni pli bone skribas: "En la farmkorto ekestis granda bruo: la bovinoj muĝis, la ĉevaloj henis, la hundoj bojis, la kato miaŭis, kaj la koko kokerikis" ol: "... la bovinoj blekis, la ĉevaloj blekis, la hundoj blekis, ktp." — Sed kial ne: "bovinoj, ĉevaloj, hundoj, kato, koko, ĉiuj blekis"?

Estas tamen alia klaso de vortoj, kiujn, laŭ mia opinio, oni neniel povas pravigi, aŭ en la poezio aŭ en la prozo. Tiaj estas, ekzemple, **subskripcii**, **editoro** (**edit(or)i**), **mnemonik(a)jo**.

Por la unua, ni jam havas la tuj kompreneblajn (kaj malpli longajn!) vortojn **antaŭpago**, **antaŭmendi**.

Pri la dua, se la angla lingvo ne bezonas apartan vorton por tiu, kiu redaktas **libron** anstataŭ **gazeto**, kial internacia lingvo bezonas ĝin? Zamenhof mem ne sentis tian bezonon — li skribis (laŭ PIV): "kiam mi siatempe **redaktis** la germana-Esperantan vortaron"; verkoj, kiuj aperis sub mia **redaktado**". Wells ne havas ĝin en la angla-Esperanta parto de sia vortaro, Butler tute ne. (Sed **editi** ne estas nova: Grosjean-Maupin (1910) donas **editi** = **éditer** (ĉu en la senco de **eldoni**, aŭ **redakti**, ne estas klare — la franca vorto pli ofte havas la unuan signifon), sed ne **editoro**.) La verbon **editori** mi trovas eĉ pli abomeninda!

Mnemonik(a)jo, kvankam Zamenhofa, estas tute nenecesa. Ĝi estas malfacile elparolebla (la angla elparolas: **nimOniks**), kaj **memortekniko**, **memorhelpilo** estas multe pli klaraj (komparu germanan **Gedachtnisstütze**, **Gedachtnishilfe**, nederlandan **geheugensteuntje**).

Aliaj tiaj vortoj, kia **hospitalo**, ja estas oportunaj, estante internaciaj (almenaŭ en la pli granda parto de la mondo), kaj vaste uzataj, eĉ oficialigitaj — sed **hospitalo** estas pli longa ol **kuracejo**, kaj malpli longa ol **malsanulejo** je nur 2 literoj!

Interesus min scii, ĉu aliaj kunhavas* mian opinion ĉiurilate, kaj ricevi iliajn plej malamatajn abomenaĵojn, por ke mi aldonu ilin al m'a rapide kreskanta listo da vortoj neuzendaj!

*Ne **dividas**: se pluraj personoj **dividas** opinion, ĉiu el ili tenas nur **parton** da ĝi!

Mesaĝo de la Prezidanto:

MONATO

Por ĉiu hejmo, ĉiu biblioteko.

Dum jaro kaj duono regule aperas la unika gazeto "Monato". La unuan fojon en la historio de nia movado estas eldonata altkvalita periodaĵo entenanta novaĵojn, ofte ilustritan per bildoj, ne pri E-societoj sed pri la eventoj de la granda mondo. En ĝi estas evidenta la estoso de nia lingvo — tutmonda vizio, objektiveco, homara intereso. Ne mankas rubrikaj por amuzo, por junuloj, eĉ por infanoj.

La eldono de "Monato" estas ebligita per kompetenta redakta stabo, reto de 300 korespondantoj en diversaj landoj, kaj 1500 pioniraj abonantoj, kiuj pagas la kurantajn elspezojn. Sed "Monato" urĝe bezonas mil aliajn abonantojn, almenaŭ 500 en la nuna jaro.

Ĉiu serioza Esperantisto devas legi tiun gazeton. Se eble ĉiu abonon. Se, tamen, iu ne povas pagi apartan abonon, tiu aranĝu kun amikoj kooperative aboni. Kaj se grupo tute ne povas aboni, ĝi persvadu publikan bibliotekon aboni, en la antaŭurbo kaj ankaŭ en la urbcentro. Kiel impostpagantoj, aŭ pagintoj, vi raitas postuli, ke via biblioteko aĉetu kelkajn librojn en via preferata lingvo, kaj ankaŭ ke ĝi abonon

unu du gravajn gazetojn. Kaj kredu min, gesinjoroj, MONATO estas grava afero. Dum ĝi floras, ni povas fieri, eĉ fanfaroni. Se ĝi velkus ĉiu Esperantisto devus honti.

ABONU MONATON
 Abonojn bonvenigas Kenneth G. Linton, 4/2 Lyons Street, Glenhuntly, Victoria, 3163 . . . \$26 por tuta jaro, aervoje. — Ralph L. Harry.

**ADOLF KOLPING — PEDAGOGO KAJ SOCIREFORMATORO
 VIRO DE HIERAŬ KUN IDEOJ POR MORGAŬ**

La 8-an de decembro 1813 naskiĝis en Kerpen apud Koln en Germanio, kiel kvara de entute kvin infanoj, Adolf Kolping. La patro estis paŝtisto. Kvankam malriĉa la familia vivo estis feliĉa kaj harmonia, plenplena de amo, enradikiĝinta en profunda religio. Tiu ĉi baza sperto estis de grava signifo por la tuta agado de Kolping. Vekiĝis en Kolping jam tre frue la deziro je klerigo. Sed la familio ne kapablis financi la lernejan edukadon. Vole-nevole li devis lerni metion. Jam 13-jaraĝa li fariĝis ŝuisto, laboris dum 3 jaroj kiel lernanto en sia hejmloko, poste 7 jarojn kiel vaganta metiisto en diversaj lokoj, laste en Koln.

Dum tiuj ĉi jaroj Kolping detale konatiĝis kun la malbonaj kondiĉoj de la metiistoj. La situacio estis ege komplika. La komenco de la profesia libereco kaj la fino de la gildo-aneco kaŭzis, ke la metiistlaborejoj ofte havis nur mizeran staton. Aldone vekigis la konkurencebatalo, kiu post neglekto de la gildo-ordo ne plu estis regulata. Videblis la komenco de la industriigo. Ĝi kaŭzis daŭran impresan ŝanĝon en la tuta mondo, sendube akompanatan de nekonjektitaj problemoj kaj konfliktoj. La francan revolucion sekvis industria revolucio. Tio estis la ruino por multaj metiistoj. Por la vagantaj metiistoj sekvis drastaj ŝanĝoj. Metiaj moroj ĉesis. Aparteninte ĝis nun al la familio, ili—kvankam nun pli liberaj kaj sendependaj — fariĝis senhelpaj, respondecaj por si mem. La estroj ofte vidis nur la pagatajn laborfortojn kaj sentis sin liberaj de privataj devigoj. Gastejoj kaj nokthaltejoj neeviteble fariĝis "vivmedio" por la metiistoj ekstere de iliaj laborejoj. Mizero, korupto kaj senmoraleco estis la neeviteblaj konsekvencoj.

Kolping ege suferis. Li ne povis elteni tiun ĉi situacion. Per propraj rimedoj kaj sub plej malbonaj kondiĉoj li kreis al si la bazon por la ofico de pastro. 24-jaraĝa li frekventis dum 3

jaroj gimnazion. Poste li studis en München kaj Bonn teologion. En 1845 li konsekris kiel sacerdoto. La nova pastro fariĝis kapelano en Elberfeld. Nun li tuj zorgis por la metiistoj. Li fondis la unuan katolikan metiistklubon, prelegis tie kaj antaŭ ĉio li donis al la junuloj de 18 ĝis 25 jaroj hejmon, la senton de protektado kaj vekis la intereson pri scio kaj lernado. Nun ili kolektiĝis en sia hejmo je gaja komuneco, severa parolado, instruado en religiaj, sociaj demandoj kaj por sin perfektigi en la propra metio.

Ek de Elberfeld disvastiĝis la nova movado. Per senlacaĵoj Kolping kreis por la hejmoj ankaŭ la financon bazon, integris pli kaj pli da metiistoj en la grandan familion kaj la vagantaj metiistoj mem kontribuis al tio. Ĉion ajn eblan Kolping faris por la metiistoj, ĉar li vidis en il ili venontajn majstrojn.

Kiam Kolping fariĝis katedralvikario kaj en 1862 rektoro de la preĝejo Minoritoj en Koln li disvastigis sian agadon al Sudgermanio kaj Aŭstrio, Mallonge antaŭ lia morto fondiĝis la unua metiistklubo en Usono. Hodiaŭ la Kolpingverko troviĝas en 17 landoj de la mondo kaj nombras pli ol 250 000 da membroj. Sed per tio la aktivaj de Kolping ne estis elĉerpitaj, male, li fariĝis redaktoro kaj eldonisto de signifa katolika semajnogazeto. Li estis konata kiel publicisto de multnombraj libroj. Per la koncernaj enspezoj li financis sian verkon.

Alie kiel dum la vivo de Kolping la agado de la unuigo hodiaŭ superas la kadron de la metiistoj. Junuloj kaj plenkreskuloj, viroj kaj virinoj, personoj de ĉiuj profesioj kaj sociaj tavoloj kunlaboras por realigi la fundamentajn celojn. Ili ĉiuj penas esti kristanoj en laboro kaj ofico, edzeco kaj familio, en eklezio, socio kaj ŝtato. Krom la hejmoj, kiujn ebligis Kolping mem konstruiĝis feriejoj por familioj, kulturdomoj kaj edukinstitutoj Propra malsan-

asekuro kaj ŝparbanko por la membroj apartenas same al la favoroj kiel vojaĝservo por junuloj. La arko de la aktivajvoj vaste etendiĝas. Sed centro de ĉio tio estas - hieraŭ - hodiaŭ - morgaŭ - Adolf Kolping. Lia sentenco: "Sociaj problemoj solviĝas unuavice pere de evoluo, pere de eduko kaj instruo de la homo" nek perdis signifon nek aktualecon. Ĝi validas ankoraŭ.

La 4-an de decembro 1868 Adolf Kolping mortis nur 65-jaraĝa. Li entombiĝis en la Minoritoj-preĝejo en Koln.

—Elfriede Kruse, Frankfurt/Main

BONE FARITE! SIMO MILOJEVIČ:

Mi ĉiam avide legas la rubrikon "Vi trovos" kaj aliajn artikolojn de la redaktoro de "Esperanto", ankaŭ liajn malvarajn laŭdojn de aliaj esperantistoj pro iliaj elstaraj faroj por nia movado.

Tamen, en la septembra numero lia 'hejma tasko' estis tiel bonega, ke mi ne povas ne eldiri mian admiron kaj laŭdon. Por samideano, kiu bedaŭrinde ne povis vojaĝi al Brazilo por la unua kongreso en nia suda duono de la terĝlobo, liaj talentaj kaj tre interesaj klarigoj, rakontoj kaj laŭdoj, jes, kaj ankaŭ kritikoj, donis al mi veran ĝuon kaj plezuron.

Ĉiuj ricevis sian merititan laŭdon krom la redaktoro mem, kaj li certe ne povus laŭdi sin mem, do mi deziras forigi tiun mankon, kaj tre klare diri mian laŭdon por nia redaktoro. Dankon Simo Milojevič.

—Ken G. Linton.

JAPANA ESPERANTO-KONGRESO

La 68-a Kongreso de Japanaj Esperantistoj okazis de la 8-a ĝis 9-a de aŭgusto, 1981, en la Memordomo de D-ro Noguti en Tokio. Partoprenis 340 japanaj kaj 8 eksterlandaj esperantistoj.

En la kadro de la Kongresa Universitato okazis 3 elstaraj prelegoj. D-ro Nakayama, Profesoro de Mikrobiologio, prelegis pri "Ĉu homo daŭre vivados?" La preleganto klarigis la eblan krizon de la homaro sub minaco de nukleaj povoj kaj diversaj polucioj de la homa medio. Profesoro Mizuno, lingvisto ĉe Meiji-Universitato, prelegis pri la teorio de Claude Piron "Esperanto - ĉu eŭropa aŭ azia lingvo?" La trian prelegon faris D-ro Dieter Kleemann (Germanio) pri "La Germana Asekursistemo por Mal-sanuloj".

Okazis du diskutkunvenoj: "Simpozio pri novaj lernomaterialoj" kaj "Simpozio pri lokaj agadoj" Okazis unuhora teatra o "Pikniko en Batalokampo" kaj

la kongreso finiĝis per Bankedo, aranĝita de la Zamenhof-Klubo de Tokio.

—Bun'iti Isizaki, Kumamoto

23rd AUSTRALIAN ESPERANTO CONGRESS

Jan. 2-9, 1982 — Adelaide, S.A.

This congress will be held at the "Lincoln College" in North Adelaide, not too far from the city centre. All congress members will be accommodated in comfortable rooms in the College and the cost for the room and all meals will be approximately \$20 per day.

Congress Fee: \$20.00. Pensioners and Full-time Students \$15.00

Mail your Congress Fees to the Treasurer Mrs. B. Randles, 35 Roslind Street, Kensington Gardens, S.A. 5068. If you wish to stay at the College, please add \$10 for room deposit and a stamped, addressed envelope for your receipt.

9th List of Congress Members:

- 111. Lynne Farr, Brisbane
- 112. S-ino M. J. Taylor, Brisbane
- 113. Shirley Gradussov, Perth
- 114. Gordon Gregson, Perth
- 115. Lilian Richter, Perth
- 116. Jacqueline Walker, Perth

State Distribution: N.S.W. 36; Victoria 24; Queensland 21; Western Australia 18; South Australia 8; A.C.T. 6; Tasmania 3.

Drama Konkurso: Jam aliĝis al la Konkurso Manly Esperanto-Klubo, Brisbane Esperanto-Societo, Canberra Esperanto-Klubo. Konsideras partoprenon Esperanto-Ligo de Okcidenta Aŭstralio. Se iu alia societo deziras partopreni, tiu benvole anoncu sian partoprenon al: Herbert Koppel, Box 2122 T., G.P.O. Melbourne, 3001.

LA "A.E."

SUBTEN — FONDUSO

Antaŭe raportita	\$1300.10
S-ro Mac Le Fevre, Launceston	10.00
S-ro I. Grahovac, Sydney	
(2-a Donaco)	5.00

\$1315.10

FONDUSO POR ESPERANTO-STIPENDIO

Antaŭe raportita	\$2123
F-ino Eva Trainor, Melbourne	20
S-ro I. Grahovac, Sydney	
(2-a Donaco)	5
S-ino M. Mazza, Perth	20

\$2168

DONACOJ AL NOV-JORKA

OFICEJO DE UEA:

Patronoj: Esperanto Federacio de N.S.K. \$1000; Brisbane E-Societo \$100; Anonima \$95; F-ino B. Williams \$90.

Subtenantoj: Aŭstralia E-Asocio \$50; Sydney E-Societo \$50; Oakleigh E-Klubo \$25.

Amikoj: Toowoomba E-Societo \$10; Kaprikorna E-Klubo \$20; S-ro R.S.P. Reed \$10; Ges-roj W. Wybenga \$10; S-ro J. Moore \$10; S-ino V. Clarke \$10; S-ino S. Burkit \$10; S-ino M. Chaldecott \$10; Tom Elliott \$10.

BONA INFORMO

La 1982-a abonvarba kampanjo de "EL POPOLA ĈINIO" jam komenciĝis. Ekde 1-a de nov. 1981 ĝis 28-a de feb. 1982 vi povos profiti 20%-an rabaton el la abontarifo.

Ne perdu la ŝancon kaj abonu kaj varbe abonigu parencojn kaj amikojn. Se vi unufoje sukcesis varbi 4 abonantojn vi ricevos "Libro-kuponon" kiel donacon. La kupono valoras US \$5.00.

Abontarifo: 1 jaro \$5.70, rabatigita prezo \$4.60; 2 jaroj \$9.60, rabatigita prezo \$7.68; 3 jaroj \$14.40, rabatigita prezo \$11.52.

Abonu ĉe K. G. Linton, 4/2 Lyons St., Glenhuntingly, Vic., 3163.

Mirinde belega bildo de D-ro Zamenhof el teksita silko, tiel lerte farita, ke ĝi aspektas kvazaŭ fotografita. 40 cm x 27 cm. Prezo \$4.50. Havebla de Ken Linton, 4/2 Lyons St., Glenhuntingly, Vic. 3163.

NOVAJ LIBROJ

Fabeloj de la Verda Pigo, L. Beucarie, N 110b	\$7.75
Ĉu li venis trakosme?, Johan Valano, N 145b	9.50
Almanako Lorens 1981, 211b	3.30
Studlibro por la Aŭstralia Norma Elementa Diplomo, K. Linton, 37b	1.80
Naŭ Jaroj en la Infero, N. Kemalov, N 111b	5.50
Vojaĝo al Faramido kaj Kapilario F. Karintho N 180b	6.30
Somermeze, P. Kuusberg, N 360b	4.45
Zamenhof Creator of Esperanto	8.20
La Libroservo estas nun oficiala peranto por "Literatura Foiro", novaĵoj sekvos.	

Ni pardonpetas al multaj klientoj, kiuj antaŭmendis "Plena Analiza Gramatiko"-n. La libroj estis senditaj frue en majo, sed pro poŝtstrikto ankoraŭ ne

alvenis. Post alveno ni tuj dissendos la 1 brojn.

A.E.A. BOOK SERVICE, P.O. BOX 230, MATRAVILLE, NSW, 2036



● **PERTH:** Proksimume 30 membroj de la Ligo kaj George kaj Nancie Durham el Anglujo, partoprenis piknikon en la hejmo de S-ro David Miller, je dimanĉo, 16-a de aŭgusto. La gastiganto distris la ĉeestantojn per sia sperta pianludado. Ges-roj Durham prezentis lumbildojn kaj interesan komenton pri vizito al tre malproksima regiono en suda Sovet-Unio.

Je la kunveno de 26-a de aŭgusto ni legis amuzan teatraĵon "Pro Dio, ne Esperantist!" S-ro Illingworth rakontis pri aventuro en Londono.

● **ADELAIDE:** Je 2/9 ni kunvenis en la Universitato kaj pritraktis kelkajn problemojn rilate Esperanto-Ekspozicion en la Stata Biblioteko.

Mardon, la 8-an de septembro, 1981, AEA-Prezidanto Ralph Harry venis al Adelajdo por pridiskuti kongresajn problemojn kun la L.K.K. Ni kune ĝuis 3-horan kunvenon kaj solvis multajn problemojn.

Denove ni kunvenis en la Universitato je 14/9. Ni diskutis la Kongresan Diservon, kiu certe okazos en la Katedralo. Ni ankaŭ diskutis la baldaŭ okazontan Esperanto-Ekspozicion, kiu okazos en la Stata Biblioteko la unuajn 2 semajnojn — Bob Felby.

● **MELBOURNE:** Je 3-a de aŭg. S-ro Henry Rosengren priskribis dumilitajn aventurojn en Ĉeĥoslovakio ĝis arestiĝo fare de la Gestapo en Olomouc. S-ro Harry Beechey, 24/8, parolis pri la temo "Transakcia Analizo". Tiu temo estis tro peza por la plimulto de la ĉeestantoj. Bonvenaj vizitantoj estis Ges-roj LeFevre el Launceston. Je 31/8 S-ro S. Kanaĉki prezentis sonbendigitan programon de Esperanto-Programo de Radio Pekino.

Je 7-a de septembro, Henry Rosengren daŭrigis sian serion pri dumilitaj aventuroj. Li rakontis pri enketo de la Gestapo en Olomouc post arestiĝo kaj rosta transporto per trajno al Brno kaj fine al Prago.

Je 14-e de septembro S-ro Jan Makovski parolis pri "La Scienco" la diversaj fakoj de la scienco kaj pri la diferenco inter scienca kaj nescienca laboro.

● **GIPPSLAND:** Esperantistoj kunvenas ĉiuvendre en privataj domoj en Gippsland, ĉefe en Morwell, por studi kaj praktiki Esperanton. Ĉeestas ankaŭ kelkaj komencantoj. Se estos sufiĉe da intereso ni konsideros fondi novan Esperanto-klubon en la estonteco.

— Don Pescod, Drouin.

'Adiaŭan Posttagmezon' por Don Rogers kaj ties familio estis organizita de F-ino Isabel Gale en ŝia hejmo en Glen Waverley, je 5-a de sept., 1981.

Don Rogers estas Nov-Zelاندano, kiu ricevis stipendion por esplor-studado ĉe Universitato.

Post programo, kiu inkludis ludojn en Esperanto kaj regalon, David Rockell, en la nomo de la Esperanto-Federacio de Viktorio transdonis ekzempleron de "Kon-Tiki" kiel adiaŭan donacon al Don Rogers.

● **CANBERRA:** La Klubo kunvenas ĉiulunde je la 7.30-a vespere en la "Instituto de Internaciaj Aferoj", Commonwealth Avenue, Yarralumla. La estraro por 1981: Prez. Ralph Harry; Sekretario: Marj Ellyard; Kasisto: Sam Ellyard; Bibliotekisto: Katherine Lewis; Red. KEK-Kuriero: Ian Pollard; Komitatanoj: Patti Anson, Brenda Birkett.

La klubo aranĝis "Brazilan Vesperon", je 12-a de okt. kaj esperas aranĝi "Meksikan Vesperon" en novembro. Zamenhofa Festo okazos je 14-a de decembro en "Hotel Canberra Conference Centre".

6 membroj partoprenis la kongreson en Adelaide kaj la klubo partoprenis en la Dramo-Konkurso per unu-akta dramo "Duobla Agento", verkita de Ralph Harry.

● **SYDNEY:** Pro la foresto de la plimulto el niaj membroj, la planita programo ne okazis. Anstataŭe okazis senpreparaj diskutoj kaj debatoj.

Tom Elliott, 7/9, gvidis diskuton pri la venontaj agoj de nia Societo. Estis bona vespero, ĉar la ĉeestantoj partoprenis la diskuton. Margaret Chaldecott, 14/9, surprizis nin per diskuto pri demandoj rilate al literaturo. Denove la ĉeestantoj entuziasme partoprenis. Je 28/9 Les Scott parolis pri la Brazilia Universala Kongreso. Ĉiuj ĉuis la interesajn lumbildojn kaj la priskribon de la Kongreso. — Revanto.

● **MANLY:** La 15-an de septembro komenciĝis la 3-a trimestro ĉe la Vespera Kolegio kun 4 grupoj de entute 30 ĉeestantoj. Post la klasoj ĉiuj kunvenas por duona horo de klubaj anoncoj kaj kantado.

Ni bonvenigis hejmen Les kaj Bess Scott, kiuj revenis de Brazilio kun tre interesa raporto pri la Universala Kongreso. Aperis en la loka ĵurnalo granda fotografajo de Les kaj Bess kaj informara artikolo pri la Kongreso. Gis nun 16 anoj intencas partopreni en la Kongreso en Adelajdo. — Eunice Graham.

MALFERMO DE LA ESPERANTO-MUZEO DE KVINSLANDO

La Oficiala Malfermo de la Muzeo okazis la 10-an de oktobro, 1981, je la 11-a en la kunvenejo, 22 Qualtrough St., Woolloongabba. La Patrono de la Esperanto-Federacio, S-ro Mike Ahern (Ministro pri Agrikulturo en la Stata Parlamento) oficiale malfermis la Muzeon, la lasta frazo en sufiĉe bona Esperanto. Trevor Steele, Brizbana Prezidanto, laŭtlegis telegramon de S-ro Ralph Harry, AEA Prezidanto kaj gratulleteron de S-ro Herbert Koppel, Redaktoro de "Australian Esperantist". Trevor Steele parolis, interalie, pri la bezono por interkomunikado kaj omaĝis al la laboro kaj antaŭvido de la Pioniroj, kiuj en la jaro 1906 starigis la originalan klubon en Brizbano. S-ro Ahern, responde, laŭdis la celon de Esperanto kaj gratulis al la anoj pri la evidenta progreso al tiu fina celo.

S-ino Doris Sinclair, EFK Prezidanto parolis pri la aliaj kluboj kaj pri la Federacio, kiuj multe helpis la movadon en Kvinlando. Alia Stata Parlamentano, S-ro Jim Fouras (Membro, Suda Brizbano) parolis ankaŭ pri la bezono por Internacia Lingvo. La Brizbana Kantgrupo prezentis tri erojn, "Antaŭen Aŭstrali", "La Eŭro" kaj "Tumbalalajka". Post inspektado de la enhavo de la Muzeo, ĉiuj partoprenis tagmanĝon.

Ĉeestis la malfermon du malnovaj anoj: S-ro Oscar Behncken (Brizbanano 1925-56), kaj Norman Collier, kiu lernis Esperanton en 1912, ĉe "Ludgate Circus" E-Klubo en Londono. Eĉ hodiaŭ Norman estas UEA-delegito, Buderim, kaj estas ano de la Federacio.

Esperanto-Federacio de Kvinlando

Okazis, la 10-11an de oktobro, 1981, tre ĝuinda kaj plensukcesa Konferenco en Brizbano. Sabate, post la Malfermo de la Muzeo, estis la normala General-Kunveno, kiam delegitoj raportis pri aferoj en klubserfoj. En 1981

la Federacio havis 88 membrojn kaj la financa stato estas kontentiga. Oni decidis laŭbezone donaci lernolibrojn kaj vortarojn al lernejoj, kie oni instruas Esperanton, precipe al du lernejoj en Toowoomba. Ankaŭ, donaco de \$50 al la Klinikio pri Blinduloj en Kameruno.

La Jarkunveno okazis kaj S-ino Sinclair, pro privataj kialoj, ne plu deziris resti Prezidanto. Jen la nova esraro: Prez: Ray Ross; Vic-Prez: Tom O'Grady kaj John Paroz; Sekretario: Decia Shonhan; Kasisto: Nan McGuckin; P.R.O.: Peggy Ross; Red. 'La Voĉo' Ray Ross; Kaskontrolisto: Eric Stadhams. La kunveno unuanime akceptis la proponon, ke S-ino Doris Sinclair estu Dumviva Membro de EFK. Post la kutima Federacia Vespermanĝo, sekvis distra vespero kaj 50 anoj kaj vizitantoj partoprenis tre agrablajn programon.

Dimanĉmatene okazis historia evento en Kvinlando: Esperantista Geedziĝa Ceremonio. Cliff Bailey kaj Margaret Taylor aranĝis kun civita celebranto pri tuta ceremonio en Esperanto kaj ĉe 70 samideanoj kaj gastoj tre ĝuis la unikan ceremonion en Arbara Parko "Bellbird Grove", kie antaŭe estis aranĝita, la dimanĉa parto de la Federacia Konferenco. — Ray Ross.

ESPERANTO-FEDERACIO DE VIKTORIO

La ĉiujara SEMINARIO de la Federacio okazis je 22-a de aŭgusto, 1981 en la Kvakera Demo de Melburno. 21 esperantistoj el la 4 Melburnaj E-Grupoj ĉeestis kaj bonvenaj gastoj estis Ges-roj M LeFevre, kiuj alflugis el Launceston.

S-ino Fay Koppel gvidis la Stud-Rondon de Progresintoj. Ĉeestantoj grupiĝis por konversadaj ekzercoj. Malgrandaj grupoj konkuris en prezentado de teatraĵoj. En la vespero la ĉef-parolanto, estis S-ro Jan Makovski, pola esperantisto, kiu rakontis pri siaj spertoj kun Esperanto.

RECENZOJ

EINSTEIN: la enigmo de la matematiko, de Huberto Rohden; el la portugala lingvo esperantigis Delio Pereira de Souza; eldonis Spirita Eldona Societo F. V. Lorenz, Caixa Postal 3133, 20 000, Rio de Janeiro, Brazilo; broŝ.; 130 p.; \$A4.50.

Jam per la "Prezentado" la leganto informiĝas, ke "Ĉi tiu verko ne estas simpla biografio, sed vera kompendio pri filozofio". Certe malmulton biografian ĝi prezentas, kaj cetere simpla ĝi vere ne estas. Por justa aprezado pre-

tere ĝin recenzi profesoro pri la filozofio, sed mankas tia.

Diplomito pri scienco, filozofio kaj teologio en diversaj universitatoj de Eŭropo, verkinto de pli ol 50 libroj tiuj-temaj, kaj fondinto de la institucio ALVORADO (Tagiĝo) responsa por kursoj en Brazilo pri "Universa Filozofio" kaj "Evangelia Filozofio", la aŭtoro, en 1946, akceptis inviton instrui Universan Filozofion kaj Komparajn Religiojn ĉe la Universitato de Princeton, Usono, "kie (li) kunvivis kun Albert Einstein kaj starigis la fundamenton por la "Universa Filozofio".

Komence de la verko la aŭtoro skribis jene: "En 1945/46, kiam mi kunvivis kun Einstein ĉe la Universitato de Princeton, la altrangaj profesoroj diradis, ke ne ekzistas seso da homoj kapablaj kompreni liajn teoriojn. Unu el ili estis tiel sincera, ke li diris, ke ne estas unu sola". Tamen, per la unua parto de ĉi tiu 3-parta verko, Prof. Rohden penadas komprenigi la nekompreneblajn — se ne tute la teoriojn, almenaŭ la personecon de Einstein kaj la proceson, laŭ kiu la matematika geniuo alvenis al siaj teorioj.

Kiam mi unuafoje rimarkis la terminon "kosmopensata", mi konsideris tion ja preseraro; sed, post multaj ripetoj kaj diversaj primaj klarigoj, ŝajnis aperi kompren-lumeto pri la proceso, kiun li strebas klarigi, sed NE kiel tiu proceso efikas/efektiviĝas.

Per la du aliaj partoj, la verkisto pritraktas respektive "Artikoloj kaj paroladetoj de Einstein pri scienco, filozofio kaj religio de 1922 ĝis 1950"n kaj "Pensoj de Einstein komparataj kun la spirito de la Universa Filozofio"n.

Ĉi tiu miksaĵo — aŭ ĉu mi diru identigo?—de la Metafiziko, la Mistiko kaj la Religio kun la Abstrakta Matematiko ne estas facila legolibro. Ĝi ne estas libro por ĉiu; sed ne sen valoro estas la penado kompreni kaj iomete informiĝi pri respektata grandulo de la moderna mondo.

Bedaŭrinde ne mankas preseraroj kiel ankaŭ gramatikaj. El la lastaj, kelkaj koncernas la refleksivon (p. 55 kaj 103), aliaj mankon de akuzativo, precipe ĉe epitetoj, participaj kaj aliaj, kiuj sekvas sian substantivon. Mankas spaco por detaloj.

De la sama aŭtoro, tradukinto kaj eldonejo:

TIEL DIRIS LA MAJSTRO, broŝ.; 218 p.; \$A5.50. Cetere, "Majstro" ne aludas al Zamenhof, sed al Jesuo Kristo.

Ambaŭ libroj haveblaj ĉe A.E.A.-Libroservo. — FAY KOPPEL.

WHO'S WHO IN AUSTRALIAN ESPERANTO

13 — Mac Le FEVRE. M.L.C.

"The man who has a quiver full."

It is not surprising that Mac has 8 children. He was one of a family of 9, and members of big families tend to have big families. (On the other hand, if your parents were childless, it is doubly certain that you will be.)

Life was not meant to be easy for the Le Fevre (senior) family! Work was hard on their dairy farm at Pyengana in N.E. Tasmania: money was scarce, and higher education a luxury.

Having attended the Technical School in Launceston for 3 years, Mac left at age 15 and was apprenticed as a fitter and turner. On completion of his apprenticeship, he served in an R.A.A.F. aircrew but the war ended before he saw active service.

After the war, he bought a truck business and operated it for 3 years, earning enough money to go back to school under the Commonwealth Rehabilitation Training Scheme. Having matriculated at Hobart High School, he proceeded to the University of Hobart. In due course he qualified as a teacher and spent some years in State Schools and High Schools teaching Maths, Science and Social Studies.

Money was still scarce. Mac had married before going back to school to matriculate, so that he was not only a married "schoolboy" but a father before the training ended. The Rehabilitation pay never really adequate—was well and truly exhausted after 3 years and, financially, the Le Fevres had had to reach up to touch bottom.

In 1959 Mac entered Parliament. In 1968 he attended the Commonwealth Conference in the Bahamas—as Tasmania's representative. His wife, Pat, accompanied him on the three months' round-the-world trip, visiting S.E. Asia, Scandinavia, Pakistan, U.S.A., Canada and U.S.S.R.

It was in Asiatic U.S.S.R. that the Le Fevres underwent the strangest, most harrowing and yet most moving experience of their lives. Mac, struck by some mysterious ailment, was too sick to know or care what was happening. He woke up to find himself in a Siberian hospital, with his distraught wife sitting by his bedside. When he was well enough to sense what was going on around him (he never reached the

stage where he could understand it) he realised that he was in an unbelievable situation. The hospital was an incredible hotch-potch of the old and new—shiny, hardly used equipment — yet techniques and methods which were more appropriate to the Middle Ages. Hygiene, by our standards, was non-existent; the whole place reeked with a smell that suggested a country public lavatory used as an operating theatre. What a mixture of crudity and dedication — of unthinkable practices such as a doctor sucking the pus from the wound, spitting and sucking again yet somehow curing the patient. Mac even heard of a physician cleaning by mouth to mouth suction, the throat of a little girl choking with diphtheria.

Unfortunately, at this stage the couple did not speak Esperanto and language was a shocking barrier but, fortunately, they soon realised that even in that remote spot — everyone there knew Esperanto of the heart — love. Love pervaded everything! The hospital workers took Mrs. Le Fevre into their homes and gave Mac plenty of T.L.C. No wonder the Le Fevres look back with ineffable gratitude!

In 1974 Mac helped initiate the Esperanto movement in Launceston. Two years later he resigned his seat in Parliament — disenchanting, dispirited and in ill health. Two years after that, with health, enthusiasm and hope restored, he contested a seat in the Legislative Council as an Independent and won against 11 other candidates. He has been a happy and busy M.L.C. ever since.

Just a few years ago, the Australian Esperanto Congress was in Launceston. In the very competent local committee there was only one person over the age of 23 — Mac himself. Since then Mac and his most cooperative (yes, of course, his only) wife, have entertained many visiting Esperantists several of whom have stayed in the Le Fevre home.

In fact, the Le Fevre home is the home of the Launceston Esperanto Club. It meets there every Monday night. — ARTHUR COCKING.

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscriptions to A.E.A. \$16
(Individual, Club & Federation)
Additional Family Member \$4
Pensioners & Full-time Students
pay a minimum of \$8.



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.
Prezidanto: R. L. HARRY, AC, CBE, 8 Tennyson Crescent, Forrest, A.C.T., 2603
Sekretario: S-ro F. J. FALLU, 10 Sumersett Avenue, Oakleigh South, Vic., 3167
A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. ELLIOTT, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036.
Kasisto: S-ino I. FALLU, 10 Sumersett Avenue, Oakleigh South, Vic., 3167
Korespondaj Kursoj: S-ro J. Moore 7 Pelican Street, Emu Park, Queensland, 4702

N-ro 192 (272)

MELBOURNE

Novembro, 1981

ĈU PRAAŬSTRALIANOJ MIGRIS AL AMERIKO ?

Bernard Golden

(Arkeologo, Muzeo de Bakony, Veszprém, Hungario)

Inter la 1920-aj kaj 1950-aj jaroj estis prezentitaj kelkaj hipotezoj rilate la fruan alvenon de aŭstraloidaj popoloj en la Nova Mondo, precipe en Sudameriko. Ĉu loĝantoj de la prahistoria Aŭstralio vere sukcesis fari tiun longan vojaĝon de Oceanio al Ameriko? Kiam? Kiel?

Tri specoj de atestaĵoj estis proponitaj por apogi la migrad-teorion: lingvistikaj, etnografiaj kaj antropologiaj. Provoj montri parencecon inter sudamerikaj indianaj lingvoj kaj tiuj de la aborigenoj de Aŭstralio fiaskis; la elementoj uzataj por komparado estis tre limigitaj, do la similecoj estis nur supraĵaj, apenaŭ konvinkaj. Simila sorto atendis la provojn de etnografoj demonstri la ekziston de kulturaj kontaktoj. Kvankam troviĝas ĉe popoloj ambaŭflanke de Pacifiko komunaj kulturaj trajtoj kiel bumerangoj, petroglifoj, lancpintoj, kupol-similaj (abelujformaj) loĝejoj, felmanteloj, korboj faritaj per plurfadenaj volvaĵoj kunligitaj per nodoj, kaj plurpecaj kanuoj el kunkudrita arboŝelo, tiuj objektoj estas relative simplaj kaj

estas faritaj ankaŭ de popoloj el aliaj mondregionoj, vivantaj sur la sama ekonomia kaj teknologia nivelo kiel la aŭstraliaj aborigenoj kaj la marginaj indianoj de Sudameriko. Cetere, tre zorga ekzameno de kelkaj el la menciitaj trajtoj montras, ke ili ne estas identaj. Similaj krudmaterialoj prilaboritaj per simplaj teknologiaj rimedoj rezultigas samspecajn produktaĵojn. Sekve de tio, estas erare supozi, ke nepre okazis kultura difuzado, t.e. la transdono aŭ transporto de objektoj aŭ ideoj de unu homa grupo al alia tra vastaj distancoj.

Restas la antropologiaj atestaĵoj. Unu tendaro de antropologoj asertas, ke fizikaj trajtoj karakterizaj de aŭstraloidaj popoloj estas troveblaj ĉe kelkaj indiĉenaj grupoj en Ameriko, kaj por klarigi tion, ili hipotezas intergeneriĝon de indianoj kaj praaŭstraliaj enmigrintoj. Unu el la ĉefaj probatalantoj de tiu vidpunkto estis la franca antropologo kaj etnografo Paul Rivet. Li klasifikis supozitajn prahistoriajn skeletajn trovaĵojn de la groto Lagoa Santa en Brazilo kiel aŭstraloidajn kaj malkovris similajn tipojn ĉe antikvaj kaj modernaj

popolacioj de Ekvadoro kaj Brazilo ĝis Fajrolando. Rivet akceptis la antikvecon de la nomaj restaĵoj de Lagoa Santa, kiuj estis elfositaj en la 1830-aj jaroj, sed reesploro de la groto pli ol unu jarcenton poste indikis, ke ne ekzistas arkelogia asociigo inter la kranioj de homoj kaj la ostoj de formortintaj bestoj, kiujn inundoj hazarde kunmetis. Reekzameno de la homaj kranioj, kiuj jam ne havas plejstocenan aĝon, indikas, ke ili similas antropometrie al kranioj de kelkaj nuntempaj brazilaj indianaj grupoj. Tamen, la nocio de aŭstraloida komponanto ĉe indigenoj de la Okcidenta Hemisfero ne malaperis. La argentina antropologo José Imbelloni starigis tipologion enhavantan dek indianajn grupojn, inter kiuj estas komponantoj tasmania, aŭstraloida kaj melanezia krom aliaj, sed lia sistemo ne estas universale akceptita. Laŭ aliaj antropologoj, indianaj loĝantaj de la nord-okcidenta Kanado kaj la pacifika marbordo ĝis la sudokcidenta Usono (ataspaskaj tlingitoj, apaĉoj kaj navahoj) havas fizikajn trajtojn nomatajn vedoaŭstraloidaj aŭ ejiropoidaj (kaŭkasoidaj).

Malgraŭ la malabundaj atestaĵoj apogantaj migradon de Aŭstralio al Ameriko, teoriemuloj ne hezitas elpaŝi kun siaj hipotezoj, plenigante la mankon de faktoj per iom da fantazio. Eble la plej senbaza rekonstruo de la prahistoria prilogo de Ameriko fare de aŭstraloidaj popoloj estas tiu de la franca antropologo Georges Montandon. Li supozis, ke la aŭstraloida etna komponanto atingis la Novan Mondon tra Polinezio, kien prahistoriaj aŭstralianoj estis deportitaj kiel sklavo. Poste tiuj homoj partoprenis en ekspedicioj al Ameriko organizitaj de loĝantoj de Paskinsulo. Kelkaj sklavoĵoj eble akiris liberecon kaj tiel fariĝis parto de la populacio de Ameriko.

Paul Rivet elpensis du eblajn marajn vojojn por venigi praaŭstralianojn al la Nova Mondo. Laŭ unu hipotezo, loĝantoj de Aŭstralio antaŭ 3000 jaroj iris al Ameriko tra la insularo de Melanezio kaj Polinezio. Rivet mem forlasis tiun ideon pro la granda malfacilo vojaĝi sur tiu vasta mara vojo. Laŭ lia dua hipotezo, la migrado okazis tra Antarkto antaŭ 6000 jaroj. Bedaŭrinde, Rivet ne povis provizi siajn teorion per iuj ajn pruvoj.

Fakte, Rivet ne estis la unua, kiu elpensis antarktan migradvojon. Pli frue la portugala antropologo A. Mendés

Corrêa elektis surteran vojon por minimigi la bezonon navigi surmare. Li apogis sin sur la teorio de Wegener, laŭ kiu Antarkto estis ligita per kontinentaj bretoj ne nur kun Aŭstralio sed ankaŭ kun Ameriko. Plue, li supozis, ke la marbordo de Antarkto kune kun la apudaj insuloj estis liberaj de glacio, kaj la klimato de tiu periodo estis pli milda por ebligi tian migradon. Inkluditaj en la itinero estis la insuloj Tasmanio, Aŭklando, Campbell, Macquarie kaj Balleny, la landoj Wilkes kaj Edŭardo la 7-a (apud la glaĉero Ross) kaj la arkipelago Palmer. De tiu regiono la vojo iris al la Sudŝetlandaj insuloj kaj fine al Fajrolando. Laŭ Mendés Corrêa tiu tuta teritorio estis prilogata post la lasta glaciigo de la Tero, sed arkeologiaj atestaĵoj mankas. Pro la nuna klimato en tiu parto de la mondo, estas neeble akiri tiuspecajn donitaĵojn. Geologiaj esploroj indikas, ke ne estis grandaj klimataj diferencoj antaŭ 6000 jaroj. Meze de la postglaciiga periodo kondiĉoj en Antarkto estis pli polusaj ol nuntempe, kaj nek la aŭstraliaj aborigenoj nek la fajrolandaj indianoj kapablas vivi en tiu regiono eĉ en la nuna klimata situacio. La prahistoriaj migrantoj devis havi arbojn por fari kanuojn, kabanojn kaj uzi kiel brulaĵon. La subnulaj temperaturoj de Antarkto hodiaŭ kaj en la pasinteco tute ne taŭgas por la kresko de arboflaŭro.

Eĉ se la praaŭstralianoj estus povintaj vivi en Antarkto, ili apenaŭ povis atingi ĝin. La distancoj de Aŭstralio al la sporadaj insuloj, kiuj laŭ Rivet servis kiel ripozlokoj, estas grandaj: 1000 mejloj inter Tasmanio kaj Macquarie, 800 mejloj inter Macquarie kaj Balleny, kaj 500 mejloj inter la arkipelago Palmer kaj Kabo Korno. Tiel, la plej malforta punkto en la ĉeno de rezonado de Rivet kaj Mendés-Corrêa estas la posedo de adekvataj boatoj kaj bona navigadscio por povi transiri marregionojn kaj trovi la dise situantajn insulojn. La polinezianoj ja estus povintaj fari tiajn vojaĝojn, sed ĉiuj esploroj pri la prahistorio de Aŭstralio indikas, ke la uzo de akvoveturiloj estis tre limigita. Cetere ne estas subtenebla la pensado de Rivet, kiu konjektas, ke la praaŭstralianoj havis pli bonajn boatojn en la pasinteco, kaj kiam ili finis sian migradon al Sudameriko, ili forlasis tiun manieron vojaĝi.

Estas sciate, ke Aŭstralio estis prilogata fare de la prauloj de la nunaj aborigenoj, venantaj el Sudorientazio

proks. antaŭ 35 000 jaroj. La unuaj enlogantoj, do, havis la kapablon transiri akvaĵn barilojn, sed ne nepre vastajn regionojn de akvo. La kontraŭa marbordo estis videbla almenaŭ ĉe la mezvoja punkto. Por plenumi tiajn vojaĝojn ne estis bezonataj komplike elaboritaj akvoveturiloj, kvankam la geografio de la regiono estus favorinta iruajn eksperimentojn pri akvotransportado. Sed la praaŭstralianoj ne farigis marnavigantojn. Antropologoj kaj etnografoj opinias, ke ne ekzistas kialo supozi, ke la praaŭstralianoj forlasis Aŭstralion aŭ partoprenis ekspansian agadon en Pacifiko, aŭ ke ili iam okupis un parton de Pacifiko oriente de Nov-Gvineo.

Se oni tiel eliminas la eblecon, ke la praaŭstralianoj mem alportis la aŭstraloidan komponanton al la amerikaj indiĝenoj, kiel ĝi atingis ilin? Laŭ la ĝenerale akceptita raso tipologio de la amerikaj indiĝenoj, la ĉefa komponanto estas la mongoloida, manifestiganta plej rimarkinde ĉe la eskimoj. La antropologo J. B. Birdsell hipotezas, ke la mongoloida raso evoluis el arkaika blanka raso ĉe la fino de la plejstoceno en Nordorientazio rezulte de naturaj arktaĵ kondiĉoj. Tiu arkaika blanka raso, la vedo-aŭstraloida grandraso, reprezentas la plej fruan stadiojn de **Homo sapiens**, la moderna formo de la homo. Apartenas al ĝi jenaj rasoj: aŭstraloidoj (Aŭstralio), tasmano'idoj (Tasmanio kaj Kvinlando), vedoidoj

(suda kaj sudorienta Azio) kaj ajnuoidoj (Japanio). La aŭstraloidoj konsistas el du subrasoj: la muraja tipo (sudorienta Aŭstralio en la cirkaŭaĵo de la rivero Murray) kaj la karpentaria tipo (norda kaj centra Aŭstralio). La prauloj de la mongoloidoj, do, estis arkaikaj kaŭkasoidoj aŭ homoj de amur-tipo, el kiuj evoluis la ajnuoj en Japanio kaj la aŭstraloidoj de la muraja tipo. Birdsell hipotezas, ke Ameriko estis prilogata de azia popolo, kiu estis posteuloj de duhbridaj amur-mongoloidaj kaj muraj-mongoloida populacio. Tio klarigas, kial troviĝas kaj mongoloidaj kaj aŭstraloidaj komponantoj inter la fizikaj trajtoj de amerikaj indianoj. Kaj nun oni devas refoje fari la demandon: kiel tuj komponantoj atingis la Okcidentan Hemisferon?

La diskuto pri vojaĝaj malfacilaĵoj surmare evidentiĝis, ke neniu hipotezo pri sudaj migradvojoj, ĉu transpacifikaj, ĉu transantarktaj, estas apogebla. Restas nur la norda migradvojo, la surtera vojo ebliganta al la homo migradon de Orientazio al Nordameriko trans la relative mallarĝan Beringan markolon. Tiu ĉi hipotezo pri nordazia-nordamerika migrado de homoj estas nuntempe ĝenerale akceptita fare de arkeologoj kaj antropologoj por klarigi la ĉeeston en la Nova Mondo de la indianoj kaj eskimoj, kiuj ne evoluis surloke sed alportis sian genetikan heredajcon, jam hibridiĝintan, el Azio.

VESPERO KUN PLATO

RALPH HARRY

La 22-an de junio, 9 membroj de la Kanbera Esperanto-Klubo konatiĝis kun nova instruisto, PLATO, afabla komputero, kiu scipovas Esperanton.

La kunveno okazis dank'al Ian Poliard kaj Jaĉjo Shaw (ŝo), kiuj laboras en la fako de Komputera Esplorado de CSIRO (Komunuma, t.e. tutaŭstralio Organizaĵo por Scienca kaj Industria Esplorado) en laboratorio je la piedo de Nigra Monto en Kanbero. La grupo sidis komforte en brakseĝoj kontraŭ 'terminalo' konsistanta el televidsimila ekraneto kaj klavaro.

Komence ni petis al PLATO kiujn programojn 'li' disponas. Li informis nin, ke li povas oferti, inter aliajn, lecionojn pri Esperanto verkitaĵoj kaj programitaĵoj de Judith N. Sherwood

(ŝevud) kaj ŝia edzo en la Universitato de Illinois (Usono).

Kiam ni petis la unuan lecionon (nomoj kaj prepozicioj) anonco aperis sur la ekranon: 'PLATO pretiĝas'. Post momento ni vidis: 'Bonan tagon. Mi estas PLATO'.

Tuj PLATO prezentis floran, tablon kaj stelon, kaj montris la rilatojn super, sur, sub kaj apud. Tiam li petis niajn respondojn al demandoj en kiu la decida vorto mankis. Kiam ni korekte respondis li gratulis nin per 'Tre bone aŭ per kelkaj steloj. La spertuloj informis nin, ke PLATO registras statistike niajn rezultojn!

Por lerni la sistemon ni faris eraron. PLATO skribis 'NE', kaj substrekis la eraron. Se ni sukcesis, la duan fojon PLATO prezentis novan problemon. Sed se ni duan fojon malsukcesis li skribis (angle) 'Se vi bezonas helpon premu la butonon HELP! Kiam ni petis

helpon PLATO sugestis eblajn elektojn. Fine, se ni tute ne povis diveni la korektan respondon, li sugestis, ke ni premu la butonon RES (PONDO).

Post la nomoj kaj prepozicioj venis la nombroj—unu, du, tri . . . ĝis dek, kun bildoj de hundoj, seĝoj, tabloj, balenoj, k.t.p. Ni bone ekzercis nin pri grandaj nombroj, aĉicio kaj subtrahado. Unufoje PLATO petis, ke ni donu la ciferojn por la nombroj, kiujn li indikis. Kiam ni respondis per vortoj, PLATO respondis, iom bruske, 'NE, bonvolu ne skribi vortojn!'

Estis aliaj lecionoj pri gramatiko, kaj ni trovis PLATO-n bona kaj klara instruisto. Tiam li indikis, ke li havas kelkajn vortolistojn por pligrandigi nian vortaron. Ni elektis la liston de bestoj en zoologiaj ĝardenoj. PLATO petis, ke ni atendu momenton, dum li preparis kelkajn bildojn el sia stoko. Aperis, sur la ekranon, la insigno:

PLATO PRETIGAS SIN

Post kelkaj sekundoj aperis ĉirkaŭ 20 bildoj — elefanto, leono, kamelo, aligato k.t.p. Kiam PLATO skribis 'leono' ni tuŝis la bildon sur la ekranon per fingro. Se ni tuŝis la korektan beston PLATO skribis alian nomon. Se ni eraris (intence aŭ nescie), li diris 'NE', kaj indikis per palpebruma lumado la korektan bildon. Kiam ni pruvis, ke ni konas ĉiujn bestojn PLATO demandis, ĉu vi deziras denove lerni la bestojn aŭ ĉu ni preferus alian liston. Kiam ni petis, ke li demandu denove pri la bestoj, li ŝanĝis la poziciojn de la bestoj, anstataŭigis kelkajn (la kamelon per simio k.t.p.) kaj tuj rekomencis la demandadon. Poste PLATO prezentis listojn de la partoj de la korpo kun 'alumentviro', dombestoj, veturiloj k.t.p.

La finaj ekercoj estis pli malfacilaj—longaj frazoj kiaj: 'La geknaboj estas la gefiloj de Plato' aŭ 'La aĉa bopatrino de Plato dormas en la granda hundejo!' Se ni eraris PLATO ĝentle korektis, ĉiam pacienca! Kutime li ignoris mankon de majusklo, sed kiam mi malicete tajpis 'plato' li tuj respondis per 'NE!' kaj substrekis la insultan minuskolon. Per la RED (AKTA) butono

mi ŝanĝis la 'p.' al 'P' kaj PLATO kontentĝis! unufoje, kiam mi skribis angle 'The son of Karl (tradukante 'la filo de Karlo') PLATO protestis: 'Oni ne uzas tiun vortordon en la angla' kaj mi devis skribi mian propran lingvon pli elegante!

Mi rimarkis, ke PLATO havis neniun problemon rilate la supersignojn, kiam li skribis. Sed mi devis premi specialan klavon, tiam tajpi 'X' por produkti '^' kaj 'v' por tajpi 'v'.

Fine por amuzo kaj instruo PLATO prezentis krucvorton kaj ni plenigis la kvadratojn. PLATO plenumis niajn instrukciojn senkomente kaj ne indikis erarojn antaŭ la fino, kiam ni petis la aprobon de nia instruisto. Tiam li indikis, per krucetoj, niajn makulojn. Post nia korekto li aplaudis 'Brave!'

La horo malfruiĝis. Ian kaj Jaĉjo montris al ni kiel ludi ŝakon kun PLATO. Tiam ni dankis ilin kaj nian novan instruiston; Ni ankaŭ sendis per la komputero mesaĝon de danko kaj gratulo al la kreinto de la programo, Judith Sherwood.

GROENLANDO AKTUALE

La 23-an de februaro 1982 la popolo de Groenlando (50.000 loĝantoj) voĉdonos por aŭ kontraŭ plua aparteno al EK (Eŭropa Komunumo), stato heredita de konstitucia komuneco kun Danio.

Tiu tradicia, jarcenta komuneco grade evoluigis for de koloniismo trans loka mem-administracio ĝis plena aŭtonomio sub la dana krono (paralele kun ekz. Feroaj Insuloj).

Ekde la 1-a de majo, 1979, bonorde funkcias loka parlamento kaj registaro, **landsstyre** cetere kun maldekstrema plimulto.

Ĝus la **landsstyre** akceptis buĝeton por 1982 kun enspezo de 904 milionoj kronoj, el kiuj ne malpli ol 533 milionoj kr. konsistas el subvencioj de Danio. Por 1981 EK kontribuas el siaj sociaj kaj regiona fondusoj per 35 milionoj kr., kaj iom paradokse la nova buĝeto kalkulas pri subteno de 62 EK-milionoj da kr., eĉ se la **landsstyre** rekomendas forlason de EK!

Anstataŭ la nuna iom severa porciolimigo de alkoholaĵoj, kies konsekvenco estis senbrida nigra kupon-merkato, oni antaŭvidas enkondukon de tre altaj akcizoj.

Interesa detalo:

Armeo ne estos en la nova Groenlando! Oni pretigas stablon de socia servo de ambaŭ seksoj anstataŭ soldatigo. Gejunuloj devas dum duona jaro servi per komunaj bonfaroj je minimumaj elspezoj.

La socia servo konstruos ŝipkajojn, ŝafejojn, vojojn kaj proprajn domojn. Krome ekestos pli da lernejoj kaj somerrestadejoj. La gejunuloj riparos publikajn domojn kaj flegos maljunulon, helpos inspekti la fiŝ-teritoriojn kaj precipe tenos Groenlandon pura.

—Poul Thorsen, Kopenhago.

23rd AUSTRALIAN ESPERANTO CONGRESS

Jan. 2-9, 1982 — Adelaide, S.A.

This congress will be held at the 'Lincoln College' in North Adelaide, not too far from the city centre. All congress members will be accommodated in comfortable rooms in the College and the cost for the room and all meals will be approximately \$20 per day.

Congress Fee: \$20.00 Pensioners and Full-time Students, \$15.00.

Mail your Congress Fees to the Treasurer, **Mrs. B. Randles, 35 Roslind Street, Kensington Gardens, S.A. 5068.** If you wish to stay at the College, please add \$10 for room deposit and a stamped, addressed envelope for your receipt

10th List of Congress Members:

- 117. Marjorie Duncan, Manly
 - 118. Berilo Loh, Manly
 - 119. Jack Wright, Sydney
 - 120. Katie Wright, Sydney
 - 121. Catherine Sullivan, Brisbane
 - 122. Rosemary Harris, Jingli, N.T.
 - 123. Pam Harris, Jingli, N.T.
 - 124. Frank Mangan, Manly
- State Distribution: N.S.W. 41; Victoria 24; Queensland 22; Western Australia 18; South Australia 8; A.C.T. 6; Tasmania 3; Northern Territory 2.

Drama Konkurso: La Esperanto-Ligo de Okcidenta Aŭstralio ĵus anoncis, ke ĝi partoprenos en la konkurso per du teatraĵoj:

- 1. La Surda Profesoro
 - 2. La Fatala Miskompreno
- Ambaŭ teatraĵoj daŭros 20 minutojn.

BONA INFORMO

La 1982-a abonvarba kampanjo de "EL POPOLA ĈINIO" jam komenciĝis. Ekde 1-a de nov. 1981 ĝis 28-a de feb. 1982 vi povos profiti 20%-an rabaton el la abontarifo.

Ne perdu la ŝancon kaj abonu kaj varbe abonigu parencojn kaj amikojn. Se vi unufoje sukcesis varbi 4 abonantojn vi ricevos "Libro-kuponon" kiel donacon. La kupono valoras US \$5.00. **Abontarifo:** 1 jaro \$5.70, rabatigita prezo \$4.60; 2 jaroj \$9.60, rabatigita prezo \$7.68; 3 jaroj \$14.40, rabatigita prezo \$11.52.

Abonu ĉe K. G. Linton, 4/2 Lyons St., Glenhuntly, Vic. 3163.

LA "A.E."

SUBTEN — FONDUSO

Antaŭe raportita	\$1315.10
S-ino Gladys Burmeister, Melbourne	3.00
	\$1318.10

FONDUSO POR ESPERANTO-STIPENDIO

Antaŭ raportita	\$2168
Melbourne Esperanto-Societo ..	20
Ray and Peggy Ross, Brisbane, (2-a Donaco)	30
S-ro Stan Kelly, Melbourne ..	5
W.A. Esperanto-League, Perth ..	40
S-ino L. Troy, Perth	10
H. Hyams, Perth	5
S-ino N. Palmer	2
S-ro M. Lorian	5
S-ro H. Hoffman, Perth	100
S-ro Ken Steele, Perth	50
S-ro W. L. Illingworth, Perth ..	5
S-ino L. Gauntlett, Perth	2
Oakleigh Esperanto Group	5
Malvern Esperanto Group	240
S-ino Agnew-Coffey, Perth	5
Esperanto-Federacio de Viktorio (2-a Donaco)	25
	\$2717

RESTAS NUR \$283

Okaze de la 22-a Aŭstralio Esperanto-Kongreso en Sidnejo, la Launceston Klubo proponis donaci al A.E.A. \$1500 por starigi fonduson por Esperanto-Stipendio, kondiĉe ke A.E.A. aldonu

\$3000 por komenci fonduson de almenaŭ \$4500.

En septembro 1980 A.E.A. Prezidanto Ralph Harry invitis ĉiujn Esperantistojn en Aŭstralio, kiuj deziras certigi la progreson de nia movado, donaci malavare al la "Fonduso Stipendio". Li mem jam kontribuis \$300 al tiu Fonduso.

En Okcidenta Aŭstralio S-ino I. Einihovici adoptis kun entuziasmo la ideon kaj kun kun sia edzo sukcesis kolekti \$1061 el la ĝis nun tutlande kolektita sumo de \$2717. Lastatempe, S-ino Adrienne Paling kaj la komitato de la Malvern E-Grupo donacis malavare \$240 al la Fonduso. Koran dankon al ili!

Laŭŝtate kontribuis al la Fonduso: Okcidenta Aŭstralio \$1061; Viktorio \$740; Kanbero \$325; Kvinŝlando \$253; N.S.K. \$78; Tasmanio \$50; Suda Aŭstralio \$10 kaj Ges-roj Bossong (Nederlando) \$200.

Ĝis la fino de 1981 ni nur bezonas **fliajn \$283** kaj ni esperas, ke tiuj kiuj voĉdonis en Sidnejo por la akcepto de la propono, sendu malgrandan donacon al la A.E.A. Kasisto S-ino Ivy Fallu, 10 Sumersett Ave., Oakleigh South, Vic. 3167.

AŬSTRALIA= =KRONIKO

● **PERTH:** Je la kunveno de 9-a de septembro S-ro Illingworth prelegis pri vojaĝoj en Afriko kaj Japanujo, speciale pri vizito al Nagasaki, kie esperantistoj veturigis lin ĉirkaŭ la urbo. Samvespere grupoj diskutis la temojn "Ĉu ni sufiĉe prizorgas niajn piedojn", kaj "Ĉu ni venkas en la batalo kontraŭ malsanoj."

Je 23-a de septembro ni diskutis la eblecon organizi aŭstralian Esperanto-kongreson en Perth en 1984.

● **ADELAIDE:** Je 19-a de oktobro okazis kunveno en la Universitato. Ĉeestis ankaŭ du instruistinoj de la "Mount Barker High School", kiuj intencas lerni Esperanton. Krome ni diskutis preparlaborojn por la kongreso.

Esperanto-ekspozicio okazos en la biblioteko je 2-a de novembro. La materialojn por la ekspozicio provizis S-ro Cerald Tumman en Healesville (Viktorio).

● **MELBOURNE:** Nia ĉiam populara bazar-vespero "American Tea" okazis je 28-a de septembro. Partoprenis 21 el la Melburna E-Societo kaj la Oakleigh E-Grupo. Post vigla marĉandado kaj loterioj, ĉeestantoj ĝuis luksan vespermanĝeton. La profito de la vespero estis \$55.70, kiun dividis proporcie la 2 grupoj.

Je 5-a de oktobro, Harry Beechey prelegis pri "Vitaminoj" — la signifo de la nomo, la specoj kaj la utiloj.

Je 19-a de oktobro Henry Rosengren rakontis pri transportado kaj re-enkarcerigo en Prago antaŭ ol reiro al la militkaptitejo en Oppeln, Germanio kaj plua periodo en punmalliberejo tie.

Ĉe la amuzvespero de la 26/10 ĉeestantoj aŭskultis la rakonton de Ken Linton, kiu montris diapozitivon pri sia vizito al Usono.

● **LAUNCESTON:** Ruth kaj Hugh McGrath el Perth estis niaj bonvenaj gastoj ĉe nia kunveno de la 9-a de novembro. Ruth informis nin pri la movado en Okcidenta Aŭstralio. Si kaj Hugh intencas veturi ĉirkaŭ nia insulo kaj renkontos min denove ĉe la Parla-mentejo en Hobart venontan semajnon. —Mac LeFevre.

● **CANBERRA:** La klubo organizis budon en la "Pac-Pikniko", kiu okazis la 31-an de oktobro sub la aŭspicio de "Aŭstralia Asocio por Unuiĝintaj Nacioj". Nia membro Ian Pollard preparas programon por instrui Esperanton per malgrandaj komputeroj en lernejoj kaj domoj. La klubo ricevis valoran subtenon per senkosta publiko de Ian Warden, la konata kanbera satiristo. La "Canberra Times" publikigis rimarkojn de S-ro Warden kaj leteron de nia Prezidanto, S-ro Ralph Harry.

● **ST. LUCIA:** La jarkunveno okazis en la hejmo de S-ro A. Mason kaj elektigis la sekvanta estraro: Prez: S-ro Allan Mason; Vic-Prez: S-ino Ruth Morrison; Sekretario: S-ino Decia Shonhan; Kasisto S-ino June Cullen; Libro-Peranto: S-ino W. Greenhalgh. Komitatanoj: S-inoj Ruth Mason, Ruth Philp, Berneice Patterson, Annie Spencer.

Membroj de la klubo kunvenas ĉiun merkredon ĉe la domo de S-ino W. Greenhalgh, 39 Ryan's Rd., St. Lucia.

Dum sia restado en Brizbano, la Prezidanto de A.E.A., S-ro Ralph Harry, vizitis S-inon W. Greenhalgh kaj alparolis la membrojn.

—Decia SHONHAN

● **ROCKHAMPTON:** La sabata konversacia rondo daŭras, en diversaj hejmoj. Joyce Turner veturis al Brisbane por la konferenco de la Kvinlanda Federacio kaj la malfermo de la Esperanto-Muzeo.

—Joyce TURNER.

● **KAPRIKORNA MARBORDO:** De junio ĝis decembro, Julie kaj Hermann Heck vojaĝadis tra Eŭropo. La (sen ili, malgranda) mardvespera klaso kunvenadas ĉe "La Nesto", Emu Park.

—John MOORE.

Kiu havas, sed ne plu uzas, la libron DEK KVIN PAŬOJ? Via Korespond-Kursa Servo urĝe bezonas ĝin kaj danke pagos po \$5 por uzebla ekzemplero. Sendu ĝin tuj al John Moore, 7 Pelican St., EMU PARK, QLD. 4702.

RECENZOJ

TUTMONDA ESPERANTISTA ADRESARO 1981: Oni ofte diras, ke la disvastiĝo de Esperanto iel similas al tiu de la telefono: Ju pli granda kaj densa la telefonreto estas, des pli utila estas ĉiu unuopa telefonaparato. Sed la grandeco de la telefonreto per si mem ne utilas, oni bezonas telefonlibron. Simile estas pri Esperanto: oni bezonas adresaron por praktike utiligi ĝin.

La ĵus aperinta **TUTMONDA ESPERANTISTA ADRESARO** servas tiun celon. Ĝi havas formaton de 10.5 x 14.5 cm, ampleksas 220 paĝojn, kaj enhavas ĉ. 2700 adresojn el ĉ. 60 landoj. Tre multaj personoj indikis, krom sia adreso, siajn aĝon, profesion, hobiajn, gradon de lingvosciado, deziron korespondi, kaj pretecon gastigi aliajn esperantistojn.

Jen unika konsultlibro, utila por ĉiu aktiva esperantisto. Havebla en Aŭstralio de la honorofica reprezentanto Herbert Koppel, 41 Byfield Street, Re-ervoir, Vic. 3073. Prezo \$2.75 plus \$0.55 por afranko (entute do \$3.30).

INTERESA KOMPARO

La ĉi-jara kongreso de la Esperanto-Ligo por Nord-Ameriko altigis la membro-kotizojn por 1982. Jen la novaj

kotizoj kaj en krampoj la kotizoj en Aŭstralio:

Individua Membro \$25.00 (\$16)
 Fam'lia Kotizo \$37.50 (\$20.00)
 Junuloj/Studentoj \$12.50 (\$8.00)
 Pensiuloj \$12.50 (\$8.00)

LETERO AL LA REDAKTORO

Vere vundas min kontraŭargumentian karan kaj altestimatan amikon, Wre, Chandler, sed mi ne povas ne riproĉi lin pro lia recenzo de la libro "Metropoliteno" (p.37, A.E., julio/aŭgusto, 1981).

Mi konfesas, ke se mi ne estus petita provlegi la anglalingvan tradukon (far Marta Evans) de 'Metropoliteno', mi eble ne estus dediĉinta la necesajn intelektostreĉojn al studado de la originalo, ĉar Wre tute pravus, ke oni ne povas rekomendi ĝin al komencantoj. Eĉ progresantoj preferu ĝin unue legu sub la gvidado de spertulo, ekzemple en studrondo.

Mi opinias valora la penon sindediĉi al serioza legado de la libro. Konsentite, ke pro la stilo de la unua kvindeko da paĝoj la leganto emas ĝeme protesti:

Tio, kion skribas via plumo estas
 Kiel nokto perdinta kaj lunon kaj
 stelojn.

kaj rekomendi:

Se spirito via volas
 Kaŝi sian belan penson
 Diru, kiu al vi povas
 Malpermesi la silenton?

Sed priskribi la ceteron kiel "kolekto de nerilataj anekdotoj", — ho, Wre! Kiel vi povus? Mi asertas, male, ke tiu leganto, kiu persistas en la legado baldaŭ trovas sin absorbita per romano pri amo kaj politika idealismo, delikate kreita sur fono de malgrandanima burokratismo, koruptado, malkompetenteco, kiuj tiom malhelpis la strebojn de la sinceraj revoluciuloj en post-revolucia Sovietio. La Metropolitenoj, tiu konstruata en Berlino, urbo kie la revolucion spiriton ankoraŭ nutris la idealismo de la Ruĝa Fronto, kaj tiu planata en post-revolucia Moskvo laŭ la berlina modelo, formis kadron por la kreata teksaĵo, kies ruseco post iom da tempo pli ĉarmas ol ĝenas.

Ankaŭ la angla traduko valoras legadon — donacu ĝin al viaj neesperantistaj ĝeamikoj!

—Audrey C. E Childs-Mee.

WHO'S WHO IN AUSTRALIAN ESPERANTO

14. — JOHN MOORE

It is no great wonder that John has interested himself in postal courses. His father was a telegraphist in Bowen: John himself joined the Post Office at 14.

Bowen, at the time of John's birth when this century was a little younger, was by no means a metropolis though it was an important centre, repeating telegrams for all points north and west. (And telegrams, at 5c each, were important! No radio or telephone and mail, brought by sea, once a week.) As a boy, John often strolled through the bushland listening to the koalas calling to each other (like human babies crying), as they woke up to go feeding. Too, he often went swimming, for Bowen was Paradise.

Shortly after he started work, John built his first radio receiver — the 4th in Bowen — and was proud that his "one valver" could — static permitting — receive Melbourne and Adelaide. John remembers with delight and wonder when, in 1920, an aeroplane miraculously landed on the stump-covered paddock out of town. He can still smell the castor oil used as lubricant.

Our communications expert worked at various postal jobs in Mackay, Mount Isa, Brisbane (where he trained as a telegraphist) and Townsville, where he married a wife and begat 3 children who have now compounded his original investment by giving him 9 grandchildren.

Words were John's job. He had to handle millions of them in telegrams and had to make sure — using a dictionary if necessary — whether all the words used qualified for "plain language" rates. Words became his joy. The more he learned of them, the more he learned to love them. And he got to know more than a few.

In Rockhampton, John met Esperanto. Like many people, he vaguely knew that it had been "proposed" but only after Heber Petley advertised the forming of a class did he discover that it had been living, growing and spreading all the time though many otherwise knowl-

edgeable folk were totally ignorant of its extent and usefulness; some even of its existence. No, John was not a linguist. His attempts at French some 40 years before had been a dismal failure. What surprise and pleasure when he realised that he — "even he" as he put it — could learn this language!

When he found that he could understand a short, simple speech by a visiting Esperantist, his satisfaction turned to rabid enthusiasm and he really began to study. He became inescapably "hooked" when, after a year, he visited Brisbane where Len Parry and Karl Gunster slowly and patiently talked to him in Esperanto for hours.

Finding he enjoyed helping others learn, he became involved in Adult Education classes and himself a student in Reg Banham's postal translation courses. When "Tiny" Goldsmith began postal courses and asked for tutors, John volunteered and found he enjoyed this most of all. In 1978 he took over the A.E.A. Correspondence Courses Service. Offers of help came from all sides. Les Scott answered enquiries and Mabel Wybenga helped John adapt her school course BONAN TAGON, while Tom Elliott had it printed. Mean while, John had spent a year compiling a set of course papers for the "Esperanto Teacher". Advice and help gave much encouragement. JEN NIA MONDO was neatly incorporated, giving five graded courses to suit all comers.

Several eminent teacher Esperantists have found time to act as tutors: clubs and federations have helped with publicity: the reorganised KORESPOND-KURSA SERVO, with continuing and much appreciated help, is functioning well. There are students from all over Australia, from Singapore, Fiji and even Tonga.

John's ambition? That the correspondence courses may continue to grow and flourish. That he might induce you, gentle reader, to help with publicity of all sorts and in all possible places.

—ARTHUR COCKING.

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscriptions to A.E.A. \$16
(Individual, Club & Federation)
Additional Family Member \$4
Pensioners & Full-time Students
pay a minimum of \$8.



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.

Prezidanto: R. L. HARRY, AC, CBE, 8 Tennyson Crescent, Forrest, A.C.T., 2603

Sekretario: S-ro F. J. FALLU, 10 Sumersett Avenue, Oakleigh South, Vic., 3167

A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. ELLIOTT, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036.

Kasisto: S-ino I. FALLU, 10 Sumersett Avenue, Oakleigh South, Vic., 3167

Korespondaj Kursoj: S-ro J. Moore 7 Pelican Street, Emu Park, Queensland, 4702

N-ro 193 (273)

MELBOURNE

Decembro, 1981

KRISTNASKA MESAĜO DE LA PREZIDANTO

Mi salutas vin ĉiujn kaj deziras por vi kaj viaj familianoj tre feliĉan Kristnaskon kaj pacan kaj prosperan Novan Jaron!

Antaŭ jaro mi sciigis la rezoluciojn, kiujn mi faris por la jaro 1981 kaj invitis vin fari similajn decidojn. El la progreso de nia Asocio dum la pasinta jaro mi kredas, ke ĉiu membro kaj ĉiu organizaĵo certe fidele plenumis sian devon. Ĉiu laboregis en sia propra loko kaj cirkonstancoj.

Mi raportos pri la jaro al la Ĝenerala Kunveno en Adelajdo, kaj mi ne deziras anticipi tion. Tamen estas unu afero, pri kiu mi ŝatus diri kelkajn vortojn nun. Tio estas nia 23-a Aŭstralia Kongreso.

En januaro, 1980, en Sidnejo, kiam la grupeto de Adelajdo invitis AEA okazigi la 23-an en tiu urbo, kelkaj realistoj dubis ĉu la adelajdanoj kapablas organizi taŭgan kongreson—almenaŭ kongreson tiel bonan kiel tiu, kiun ni spertis en Sidnejo. Sed post diskutado la Estraro decidis akcepti la inviton. Mi taksis, ke eble nur 80 povos vojaĝi al Adelajdo. Sed 127 jam registris sin, kaj eble estos 130 antaŭ la fino de la jaro. Tio indikas, ke la 23-a povas esti ne nur taŭga, sed eĉ sukcesega. Sed por

atingi tiun celon estas kelkaj paŝoj ankoraŭ farendaj.

Kvankam la Loka Kongresa Komitato, kun Bob Felby kiel motoro, faris la necesan preparadon, la sukceso de iu ajn kongreso dependas ĉefe de la partoprenantoj. Do, ni iru al Adelajdo rezolutaj ludi nian rolon por certigi, ke ĝi estu ĝuebla kaj utila okazo.

En tiu kadro mi nun rivelu miajn rezoluciojn por 1982!

(a) Kiam mi alvenos, freŝa kaj preta por amuzo kaj ludoj, mi memoros ke LKK laboregis dum monatoj. Mi dankos kun rideto.

(b) Se ĉio ne estas preta, mi estos paciencna. Nenio tiel urĝas, ke mi ne povas atendi. Dum atendado oni povas babili.

(c) Se la lito estas malmola, aŭ la bifsteko, mi plendos al la ĉielo, ne al la gastiga societo.

(d) Se la Vic-Guberniestro parolos plejparte en la angla, mi tamen aplaŭdos. Ne-esperantisto rajtas krokodili. Nur se li atakus nin ni rajtus defendi nin!

(e) Se la dramoj estos amatoraj, mi memoros, ke la aktoroj ne ricevas salajron. Ilia nura rekompenco estas niaj ridoj.

(f) Se prelego aŭ profesoro enuigas, mi oscedos kiel diplomato, silente kaj sen malfermo de la buŝo.

(g) Mi nek krokodilos nek arogante esperantos; mi komunikos.

(h) Mi partoprenos en la kantado kaj dancado arde eĉ se mallerte.

(i) Mi portos la verdan stelon ne nur sur la brusto, sed en la koro. Mi ne kaŝos miajn ideojn, sed mi bonvenigos la ideojn de aliaj.

Unu fina vorto. La adelajdanoj organizis, antaŭ la Kongreso, ekspozicion en la Ŝtata Biblioteko. Povus okazi, ke interesitoj vizitos nian kongreson. Ili trovu ĉe ni homojn, kiuj evidente ĝuas la vivon, vivon pli riĉan dank' al la internaciaj kontaktoj eblaj nur per la internacia lingvo.

Ĝis la revido en Adelajdo nia kongresurbo.
—RALPH HARRY.

Esperanto-elsendo de Radio Vieno

ĈU LANDAJ (REGIONAJ) ESPERANTO-GAZETOJ, AŬ NURAJ BULTENOJ ?

Foje kaj refoje laŭtiĝas la postulo, ke la esperantistoj rezignu pri la multnombro kaj diverseco de siaj landaj —aŭ sole regionaj—gazetoj, kiuj tiom ofte, pro financaj malfaciloj nur vegetas —senprestiĝe mizeraspektaj. Ni koncentru la displititajn fortojn sur la grandaj, centraj, vere internaciaj gazetoj —plejbone sur nur unusola tia, kiu povus aperi, dank' al tiu unuigo, des pli ofte, amplekse kaj altkvalite — kiel digna, efike prestiĝa organo de la tutmonda Esperanto-movado. Por la landaj kaj lokaj bezonoj—la anoncado de kunvenoj, kursoj ktp.—sufiĉus koncizaj, laŭ okazo malmultekoste eldoneblaj "bultenoj".

Certe bonaj argumentoj! Sed ĉu ni ne konsideru ankaŭ iujn kontraŭajn? Ekzemple:

La vivo de la diversaj grupoj kaj regionaj asocioj dependas de la ofte tre streĉa, nelacigebla laborado de iliaj gvidantaj membroj, kiuj ne ricevas alian eksteran rekompencan ol honorigan mension kaj aprezon en la koncerna gazeto. Multaj membroj, kiuj ne povis partopreni en la lokaj Esperanto-eventoj, ŝatas legi raportojn pri ili. Ankaŭ la partoprenintoj mem tre ofte ŝatas perraportan retravivon de la koncernaj aranĝaĵoj. Tiaj honorigoj kaj raportoj impresus kiel malmulte dignaj, eble eĉ malsataj sur malmultekosta bultena papero.

Konsentite: tio estas argumentoj per si mem apenaŭ decidaj. Oni ja rajtas postuli, ke bonaj esperantistoj rezignu pri tiaj honorigoj kaj aliaj homaj vantaĵoj. Sed decaj, racie ampleksaj landaj gazetoj necesas ankaŭ kiel fonoj por la loka literatura, beletra kaj popularscienca Esperanto-vivo, eĉ ne nur por tiu loka, kvazaŭ "provinca", sed ankaŭ por la ĝenerala, kvazaŭ "metropola".

Esperantistoj, kiuj kapablas kaj deziras uzi la lingvon ankaŭ publike, ĵurnalisme, troviĝas, dank' al Dio, preskaŭ ĉie. Kelkaj el ili skribemas pri temoj, kiuj certe interesus la publikon de sia kaj eble ankaŭ tiun de najbaraj regionoj, sed ne sufiĉe tiun de tutmondo. La verkajoj de aliaj havas eble tian intereson, sed ilia nombro superus la kapaciton de la centra organo. Necesus, do, rigora elekto flanke de la centraj redaktoroj, de kies bontrovo nun ĉiuj dependus. Kaj estas pli ol nur probable, ke la bontrovo ofte degenerus al arbitro, ke formiĝus, plimalpli baldaŭ, tipe klika reĝimo, aroga kaj partiana. Ĝi povus fariĝi eĉ nacie antaŭjuĝema, ĉar eblus apenaŭ, ke ĉiuj nacioj estus egale reprezentataj en la redakcia stabo.

Aliflanke ĉio en regiona Esperantogazeto aperinta, sed ankaŭ por la tutmonda publika intereso, ja povas esti transprenata de la centraj organoj. Kaj simile al aktoro, kiu debutinte, perfektinte kaj renomiginte en provinca teatro, konkeras fine ĉefurban scenejon, ankaŭ loka Esperanto-gazetisto sufiĉe kompetenta kaj spertoriĉa povas atingi la kvazaŭ altan staton de ĉefgazeta redakciano.

La ekzistado de multaj diversnaciaj Esperanto-gazetoj utilas ankaŭ al la internacia lingvo mem. La respugliĝo en ĉi de propraspecaj, sed tamen ankaŭ internacie uzeblaj nacilingvaj esprimformoj vivtenas ĝian elastecon, la ĉerpado el kiel eble multaj malsamaj lingvokreaj fontoj kontribuas al ĝia riĉeco. La redakcia stabo de eĉ potenca centra organo, kontraŭe, ne povus ampleksi reprezentantojn de ĉiuj, aŭ nur de la plejmultaj naciaj lingvoj. Minacus do la danĝero de plimalpli limigita, unufanka plukreskado de nia lingvo.

—Dr. Karl Beckmann, Vieno.

Ĉi tiu NAŬA NUMERO por 1981 venas al vi pro la malavaraj donacoj de 116 esperantistoj kaj Esperanto-organizoj, kiuj kontribuis al la "Subten-Fonduso" de nia gazeto.

MONUMENTO DE KLereco

Plena analiza gramatiko de Esperanto, de K. Kalocsay kaj G. Waringhien. Rotterdam, UEA, 1980. (4-a tralaborita eldono). 599 p. 22 cm. Bindita. ISBN 92 9017 022 0. Havebla por \$18 ĉe AEA Libroservo, P.O. Box 230, MATRAVILLE, N.S.W. 2036.

Kalocsay, la koloso de nia poezio, kaj Waringhien, nia ĉefa vortaristo, eminenta eseisto kaj (kiel oni antaŭ nelonge konfirmis) poeto, estis unike kompetentaj por sekvi kaj priskribi la evoluon de la postzamenhofa lingvo. Ĝus aperis en kvara eldono, ĉi-foje kun "analiza" en la titolo, la masiva komuna produkto de ilia gramatika esplorado kaj klereco.

La kvar antaŭparoloj bone respiegulas la tiutempe aktualajn problemojn. En 1935 K. kaj W. Sciis, ke ili ofendos la "fundamentistojn", kiuj asertis, ke "la liliputa 16-regula gramatiketo de 1887" sufiĉas por ĉiam. La duopo postulis agnoskon de "la milforma, ĉiamvaria homa penso", kiu necesigas tre detalan studon. Ili asertis, ke ilia verko atestas la vivantecon de la lingvo, kiu sola inter ĉiuj planlingvoj transvivis sian kreinton. (Oni komprenu: la ŝoko de la Ido-skismo estigis ian mensan atrofion en multaj koncervativuloj).

Tri jarojn poste ili ankoraŭ defendis sin kontraŭ la akuzo, ke ilia gramatiko estas "tro plena" (Lanti). Ili asertis — tute prave — ke ili ne dekretas, sed nur konstatas, kion bonaj verkistoj fakte skribis, kaj provas kribri kaj rekomendi. Aldone ili asertis, ke ilia laboro celas helpi atingi unuecan lingvouzon: "se unuecigo de lingvo kaj stilo estas io grava . . . ĝi povas efektiviĝi nur sur la bazo de kompleta, al ĉiuj alirebla gramatiko".

Kiam aperis la tria eldono en 1958, la influo de la ĝisostaj "fundamentistoj" ne plu ĝenis — sed la -ita/-afa-disputo aktualis. Defendo de la itisma interpreto okupis la ĉefan lokon en tiu antaŭparolo. Nu, la itistoj venkis: kaj kiu povas dubi, ke la prestiĝo de PG grave kontribuis al tiu venko?

La antaŭparolo de la ĵus aperinta kvara eldono markas novan etapon. Intertempe la grandioza hungaro forlasis nin, kaj la maljuna Waringhien skribis pri sia propra "adiaŭa momento". Sed

mencio pri debatoj inter teoriistoj en la movado apenaŭ troveblas. Esperanto estas nun relative matura kaj unueca, kaj W. turnis sian rigardon ekstermovaden; li trovis necese klarigi, kial li ne utligis la prezentmetodon de tiaj mondkonataj lingvistoj, kiaj Ĉomski. Lia klarigo: ni ne sekvas la plej novan modon. La tono estas iomete melanolia, sed ankoraŭ sentigas la kontentecon de meritoplena homo, kiu rajtas diri: Nunc dimittis.

Tia monumenta verko spitas ĉian mallongan recenzon. Ili dedicas proksimume dudek paĝojn, dense presitajn kaj kun abundaj citaĵoj el Zamenhof, al klarigo pri la aspektoj de la verbo, tiu interpreto, kiu siavice pravigas itismon; kiel oni priskribu tion? Ĉi-loke mi diru nur: Iliaj argumentoj konvinkas min. Ĉu iu leganto havas problemon pri la (ne)uzo de la artikolo? Regulo 1 de la **Fundamento** estas ne nur neadekvata, ĝi estas eĉ erariga. Pri tiu tikla problemo oni trovas kvinpaĝan eron en **PAG**. Kiam oni legas en la eseejo de Waringhien: "Ni supozu unu Hungaron, aŭ eĉ unu Germanon antaŭ jenaj vortoj", tiu uzo de unu kiel kvazaŭa nedifina artikolo ĝenas; sed se oni sekvas la historian evoluon de tiu uzo en **PAG**, oni malpli dogmeme kondamnas ĝin.

Laŭ mi la plej grava akuzo estas, ke K. kaj W. elpensis grandan balaston da gramatikaj terminoj (ĉefe laŭ la modelo provizita de esploristoj de la latina) por premi nian lingvon en la kategoriojn de naciaj lingvoj. Ili ja konfesis, ke ili inventis tiajn foje kilometrajn vortojn. Ĉu vere necesas paroli pri la tri concern-adjektivo, la traktativa, dativa kaj ablativa? Unuavide oni kredas sin en monstromuzeo. Sed K. kaj W. ja celis fiksi ĉiun esprimeblon en la lingvo, kaj tre atenta legado foje devigas nin akcepti ilian vojon. Ekzemple: ili parolas pri tri kazoj de la pronomoj (nominativo — mi; akuzativo — min; prepozitivo — je mi). Kial tiu tria? Sed poste oni alfrontas la problemon klasifikii si. Si ne povas esti nominativa, nek akuzativa, ĝi do estas . . . prepozitiva.

Mallonge: se vi volas havi ĝisfundan konon de la gramatiko, aŭ eĉ nur konsulti de tempo al tempo pri problemoj

ne pritraktita en viaj aliaj libroj, **PAG** estas havenda.

Estus ironie, se oni trovus en tia verko gramatikajn erarojn. Fakte la pekolisto estas sensignifa; mi legis plurajn centojn da paĝoj kaj trovis nur unu. Sur paĝo 62 vi legos: "Oni ne devas konfuzi tiun okazon kun tiu . . ." Inversigu ne kaj devas.

La volumo havas sobre plaĉan aspekton kaj la mano volonte karesas ĝin. Nun ĝi kostas \$18. Post nelonge vi certe devos pagi pli.

—TREVOR STEELE

KONSTRUU KUN NI.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO laboras senĉese por kreskigi la uzadon de la Internacia Lingvo en ĉiuj landoj kaj en ĉiuj medioj. Dank' al sia politika kaj religia neŭtraleco, ĝi havas landajn asociojn en ĉiuj kontinentoj kaj kunlaboras kun granda nombro da fakaj kaj diverstendencaj organiza'oj. Individuaj membroj de U.E.A. troviĝas en 90 landoj. En ĝia Centra Oficejo en Rotterdam (Nederlando) laboras por la movado grupo de profesiuloj kaj volontuloj varbitaj el pluraj landoj. En la Domo de U.E.A. troviĝas unu el la tri plej grandaj Esperanto-bibliotekoj de la mondo: la biblioteko Hodler—kiel ankaŭ la arĥivoj de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED). La Grafika Centro de UEA en Antverpeno estas plene ekipita presejo, kiu staras je dispono ne nur de UEA sed de la tuta Esperanto-movado. Nova Oficejo en Nov-Jorko efike argumentas por Esperanto ĉe la instancoj kaj delegitoj de Unuiĝintaj Nacioj.

Cio ĉi formas fortikan bazon por la ĉefa agado de la Asocio. Ĝiaj plej gravaj taskoj estas: disvastigi la lingvon per internacia informado kaj helpo al la instruado; disvolvi la praktikajn, sciencajn kaj kulturajn aplikojn de la lingvo; daŭre atentigi la registarojn kaj internaciajn instancojn pri ĉio atingita kaj atingebla per Esperanto.

Triuce Universala Esperanto-Asocio reprezentas la organizitan Esperantomovadon antaŭ Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko (kun kiu ĝi havas konsultajn rilatojn). Ĝi organizas la ĉiujarajn Universalaĵn Kongresojn de Esperanto kun meze 1,800 partoprenantoj. Ĝi starigis Internacian Kongresan Universitaton, la Belarta'n Konkursojn kaj diversajn praktikajn servojn, ekzemple la mondampleksan Delegitan Reton, la Korespondan Servon, la plej grandan Esperantan libro-servon kaj multajn aliajn.

La adresaro de la 2300 delegitoj de UEA kaj utilaj informoj pri multaj aspektoj de la Esperanto-movado formas la ĉefan enhavon de la plurcentpaĝa Jarlibro. La monata revuo "Esperanto" kaj la kvaronjara revuo "Kontakto" spegulas la aktualan aktivecon de UEA kaj de ĝia junulara sekcio TEJO. Tiujn ĉefajn asociajn eldonaĵojn la ekstereŭropaj membroj ricevas aere. Krom ĉio ĉi, la Asocio eldonas librojn, diskojn, informilojn kaj diversajn bultenojn.

Ĉiu socio, ĉiu komunumo bezonas organizon. La komunumo de la Esperanto-parolantoj des pli forte bezonas organizon, ĉar ĝiaj celoj estas mondaj kaj ĝiaj anoj estas tiel vaste dissemitaj. Via membreco en UEA helpas la progresigon de Esperanto kaj donos al vi multajn praktikajn avantaĝojn. Volonte disdonas informon, S-ro Ken Lniton, 4/2 Lyons St., Glenhuntingly, Vic., 3163. Cefdelegito en Aŭstralio.

Aŭtoro kun aŭ sen publiko

La nuna situacio por aŭtoroj-kandidatoj en la internacia lingvo, estas malfacila. Tre malmulte da libroj vere troviĝas en la listo de ĉiam-vendeblajoj, kaj la koncernaj aŭtoroj estas nombreblaj sur la fingroj de nur unu paro da manoj. La kaŭzo por tio ne estas, kiel oni povus kredi, ke Esperantistoj kiel apartaj homoj, ne havas 'ion por diri', sed nur pro tio, ke la merkato estas tre malgranda. Tre malmulte da libroj vendiĝas post la mila ekzemplero, kaj multe pli ofte la eldonkvanto estas limigita al nur centoj da ekzempleroj, kaj el ili, oni ne povas ĉiam fidi, ke la tuta eldonkvanto elvendiĝos. La Esperanto-publiko ne sufiĉe aĉetas librojn. Sen merkato, neniu eldonisto havas intereson.

Eĉ se la eldonisto mem estas dediĉita Esperantisto, la konstanta barakto kontraŭ la kostoj eldoni libron aŭ broŝuron en la limigita kvanto verŝajne vendebla, pli-aŭ-malpli rapide kondukas al senluziigo, al redukto de aktiveco, foje ĝis tuta ĉeso de la entrepreno.

Tamen, la aperado de listoj de novaj eldonaĵoj en la Esperanto-gazetaro, atestas, ke inter ni ja ekzistas verkantoj, kaj inter tiuj estas verkisto-aspirantoj, se nur la merkato iel elflorus. Bedaŭrinde, la rezulto estas, ke eĉ kapablaj verkantoj devas uzi rimedojn taŭgajn por malgranda preskvanto, kaj rezulte de tio ni havas librojn kaj broŝurojn de malalta kvalito rilate la aspekton, kvankam foje de alta valoro pro la enhavo.

Pli bedaŭrinde estas, ke aliaj Esperantistoj, kiuj vere havas 'ion por diri', simple rezignas de la peno akiri publikon. Se novaj titoloj konstante aperadas, tro ofte ili aperas nur ĉar la aŭtoro mem entreprenas la eldonon, ofte per nesufiĉe da rimedoj kaj kun povra rezulto.

Por ni Esperantistoj, la ekstera aspekto de libro ne ĉiam multe gravas, se la enhavo estas valora, sed se, propagandcele, ni montras tiajn eldonaĵojn aĉaspektajn al ne-konvinkitoj ni riskas forpuŝi, anstataŭ allogi ilin; ni ne miru, se foje iu tia persono, ne povante taksii la enhavon, akiras la ideon, ke ni estas asocio de amatoroj kaj nenio pli ol tio. Aĉaspektaj publikaĵoj ja kreas malbonan impreson; ni kreu situacion en kiu ili nature forvelkos!

La kapablo transformi la situacion troviĝas ĉe la Esperantistoj. Ni ĉiuj, individue, devas subteni—per aĉetoj—la aktivecon de la malgranda nombro de profesiaj Esperanto-eldonistoj, lasante al tiuj profesiuloj la elekton de nia legadmateriale, kaj fidante je ties kapablo elekti legindaĵojn.

La situacio ne transformiĝos en la daŭro de kelkaj tagoj. Nepraĵo estas dediĉo flanke de ni ĉiuj aĉeti librojn kaj daŭre aĉeti librojn ĝis la financa stabileco de la eldonistoj estas certigita. Kaj ne nur librojn! Bonkvalitaj revuoj ankaŭ bezonas tian subtenon. La revuo MONATO estas elstara tia entrepreno, de profesia Esperantista eldonisto.

Per la kvalito de la legaĵoj ni altiros novajn apogantojn al niaj vicoj; pro la valoro de niaj legaĵoj ni altiros ĉiam pli valorajn aŭtorojn, kaj la damninda cirklo estos rompita.

Aŭtoro sen publiko ne estas aŭtoro. Se ni deziras reteni por nia kulturo la kapablajn aŭtorojn, kaj allogi al nia kulturo aŭtorojn ankoraŭ ne-konatajn, ni devas estiĝi vera publiko por la skribita vorto.
—Lawrence Mee

Mortis Edward McKenzie Multjara Prezidanto de M.E.S.

Edward (Ted) McKenzie naskiĝis 15-an de okt., 1892 kaj gajnis sian vivrimedon plejparte en tanejoj. Meze de la 30-aj jaroj, li fariĝis fabrikestro de "Pyrotan" en Burnley. Tiun poste ekposedis la firmao "Pizzey's", por kiu li daŭre laboris ĝis emeritiĝo en la aĝo 76.

Intertempe li klopodis plibonigi sian edukadon. Post la lerneaj jaroj li studis

la muzikon kaj kantadon kaj vizitis la Laboristan Kolegion (nun R.M.I.T.) por studi la kemion. Li studis ankaŭ la italan lingvon por helpi la kantadon. Li posedis bonan voĉon kaj ofte kantis ĉe festaj okazaĵoj, inklude Zamenhof-festojn.

Kiam li estis 21-jara li aliĝis al la Raciisma Societo kaj proksimume tiutempe li konatiĝis kun Roy Rawson, librovendisto, esperantisto kaj poste parlamentano, de kiu li informiĝis pri la internacia lingvo. Inter la ge-esperantistoj li renkontis sian edzinon Monica. Ted estis preskaŭ 40-jara kiam li edziĝis en 1931, sed malgraŭ tio li travivis por festi la oran datrevenon. La geedzoj restis fidelaj subtenantoj de Esperanto, kaj instigis ke la du filoj, David kaj Graeme kiel ankaŭ ties kuzino Nada, iom studu la lingvon.

Larĝmensa, tolerema, ĉiam bonhumora kaj aminda, Ted regule vizitis la kunvenojn de la Melburna E-Societo, de kiu li estis Prezidanto inter 1953 kaj 1971. Dum kelkaj jaroj ĝis januaro 1956, li ankaŭ servis kiel A.E.A.-kasisto.

Kune kun la edzino li partoprenis plurajn A.E.A.-kongresojn, kaj en 1976 ili kune vojaĝis al Ateno por partopreni La Universalan Kongreson tie, kiel parton de 3-monata veturo tra Eŭropo.

En 1959 Ges-roj McKenzie transloĝiĝis al kampara Warrandyte kaj daŭrigis la ĝardenan hobion en pli vasta spaco, sed Ted daŭrigis sian vizitadon al la Esperanto-kunvenejo ĝis sia 80-jariĝo.

Nur kelkajn tagojn post sia 89-a naskiĝtago, li suferis apopleksion kaj mortis je la 30-a de oktobro, 1981. Li estis kremaciita ĉe Fawcner je 4-a de novembro. Ano de la Raciisma Societo, kiu faris funebran paroladon, multe emfazis la pri-esperantan okupiĝon de la mortinto. Kvar M.E.S.-anoj ĉestis honore al la pasinta Prezidanto kaj la societo sendis florbukedon.

—Fay Koppel.

23rd AUSTRALIAN ESPERANTO CONGRESS

Jan. 2-9, 1982 — Adelaide, S.A.

11th List of Congress Members:

125. Winsome Grenhalgh, Brisbane

126. Margaret Liston, Manly.

127. Catherine Lamont, Manly.

State Distribution: NSW. 43; Vic. 24; Q'ld. 23; W.A. 18; S.A. 8; ACT. 6; Tas. 3; N.T. 2.

Mail last-minute enrolments to Mrs. B. Randles, 35 Rosling Street, Kensington Gardens, S.A., 5068. (Congress Fee \$20, Room Deposit \$10).

Tagordo de A.E.A. Generala Kunveno**LONDON, 4-1-82: 2 p.t.m.****Jarraporto de la Estraro**

(a) Prezidantoj/Komisiito pri Eksteraj Rilatoj

(b) Sekretario

(c) Kasisto/Kaskontrolisto

Raportoj de Komisiitoj

(a) Libro-Servo

(b) "A.E." "Australian Esperantist"

(c) Korespondaj Kursoj

(d) Ekzamenoj

(e) Korespondpetoj

(f) Nacia Esperanto-Biblioteko

Raportoj pri la Fondusoj

(a) "A.E." Subten-Fonduso

(b) Fonduso Stipendio

(c) Fonduso Simpkins

(d) Fonduso Zamenhof-Jubileo

MARDON, 5-1-82: 11.00 a.t.m.**Statutoj kaj reguloj**

(a) Statuto de Fonduso Stipendio

(b) Statuto de Nacia Esperanto-Biblioteko

(c) Registro de AEA en AĈT

Jubileo de Esperanto, 1987

(a) Komisiono de AEA

(b) Aŭstraliaj eminentuloj por honorpatrona komitato

(c) Speciala agado kaj eldonaĵoj
Jubilea eldono de "AE",
Aŭstralia Antologio
Historio de Esperanto en
Aŭstralio

(d) Esperanto-domo en Kanbero aŭ alia urbo

Kongresoj

(a) Oferto de ILEI

(b) Invito al UEA okazigi UK en Aŭstralio

Ekspozicioj, Lerneja Kampanjo, Instruado

Programoj por komputeroj k.t.p.

ĴAŬDON, 7-1-82: 10.30 a.t.m.**Organizado kaj Elektioj**

(a) Kotizoj 1982-83

(b) Loko de la 24-a Aŭstralia Kongreso

(c) Elektro de la Estraro, Komisiitoj kaj Kuratoroj

ĈU VI DEZIRAS HELPI

Aŭstraliaj Esperanto-Kongresoj jam fariĝis tiel ampleksaj, ke unu sola raportisto tute ne kapablas registri kaj priskribi ĉiun kongreseventon kaj prelegon. Ni devas, do, trovi solvon al tiu problemo.

Kiu kongresano ŝatus helpi? bezonas **raportistojn**, kiuj estas pretekroniki 2 aŭ 3 kongresaranĝojn en telegram-stilo. **Prelegantojn** ni petas doni la Redaktoro aŭ resuman enhavon kaj kopion de la prelego. **Estroj de fakuloj** sidu ĉiuj bonvolu tran doni raporteton pri viaj decidoj.

Ni serĉas ankaŭ **fotografiston**, kiu estas preta fari 3-4 blanke-nigrajn fotografiojn poŝtkart-formatajn kaj tran doni ilin proksimume je la **8-a de januaro** al la Redaktoro Tiujn fotografiojn ni uzos por "Australian Esperantist" kaj por raporto al "Heroldo de Esperanto".

Se vi deziras helpi, bonvole kontakmin en la kongresejo je la **2-a januaro**.
—Herbert Kopp

LA "A.E."**SUBTEN — FONDUSO**

Antaŭe raportita	\$1318.
S-ino A. Spencer, Brisbane	2.
S-ino Fay Koppel (3-a Donaco)	4.
	<hr/>
	\$1325.

FONDUSO POR ESPERANTO-STIPENDIO

Antaŭe raportita	\$27.
Dr. S. Minc, Perth	
S-ro Kenneth G. Linton, Melb.	
Ges-roj H. & F. Koppel (2-a donaco)	
	<hr/>
	\$27.

DONACOJ AL NOV-JORKA OFICEJO DE U.E.A.

Patronoj: S-ro L. V. Scott \$100; S-ro E. E. Tronerud \$100.
Amikoj: (po \$10) S-ino M. Chaldecot, S-ino S. Burkitt, S-ro T. G. Elliot, S-ino N. Netherall, S-ro O. H. Belncken, S-ro I. Slavoff, C-ino P. Floyd.

DUMVIVAJ MEMBROJ DE U.E.A.

Ni povas anonci novan Dumvivajn Membron de UEA en Aŭstralio, S-ro Svetislav Kanaĉki, sed la nombro efektive ne pligrandiĝis pro la malĉerdo de Ivan T. Maddern. Jen la listo:

F-ino W. E. Addis, S.A.
S-ro R. W. Baxter, N.S.W.
D-ro C. J. Caldera, Okc. A.

S-ino H. Cooper, Tas.
 S-ino M. Duncan, N.S.K.
 S-ro S. H. Grant, S.A.
 S-ro R. J. Hanney, S.A.
 S-ro R. L. Harry, AC, CBE, A.C.T.
 F-ino M. Hodge, S.A.
 S-ro S. Kanački, Vik.
 S-ino E. Kerr, Tas.
 S-ino F. Koppel, Vik.
 S-ro. K. G. Linton, Vik.
 S-ino R. A. McGrath, Okc. A.
 D-ro R. G. Robbins, Vik.
 S-ino K. R. Schwerin, N.S.K.
 S-ro L. V. Scott, N.S.K.
 S-ino D. M. Sinclair, Kvinisl.
 S-ro D. H. A Thorp, Okc. A.

Esperantistinojn, 18-23 jaran, el iu ajn lando de la mondo, dez. kontakti por krei esperantistan familion: Stefano Keller, Sh d'Entre-Bois 59 CH-1018 Lausanne, Svislando.

S-ro Peter Radig, Clara Zetkin Platz 21, 8028 Lresden (East Germany), 30-jara instruisto, dez. trovi geamikojn en Aŭstralio.

AŬSTRALIA= =KRONIKO

● **PERTH:** Subite mortis aktiva membro de nia Ligo, S-ro David Miller, en kies hejmo liganoj multfoje gatis. [Ni atendas nekrologon el Perto. Red.]

Je la kunveno de 14-a de okt. ni diskutis pri la temoj "Ĉu vi aprobas komputilojn" kaj "Ĉu mirakloj vere okazas?" Je 28-a de okt. D-ro Eimihovici raportis pri la Internacia Kongreso de E-Instruistoj en Hungarujo. Li ankaŭ montris bildojn pri vojaĝo tra Grekujo.

● **ADELAIDE:** Je 16-a de novembro okazis kunveno en la Universitato. Estis granda ĝojo, ke inter ni — pro la ekspozicio en la Stata Biblioteko — troviĝis du novaj esperantistoj. Ankaŭ ni povis bonvenigi gaston el Britujo, S-ino Anjo Acton el Manĉestro.

Estis decidite ke Zamenhofa Festo okazu je 14-a de decembro en Hotelo Angus. Ni ludis ludon sub la instruo de Anjo Acton kaj ni ĉiuj bone amuziĝis. Tio estis la lasta kunveno en la Universitato en 1981. Post la Zamenhofa Festo okazos nur kunvenoj de la Kongresa Komitato —Bob Felby.

● **MELBOURNE:** S-ro Jan Makowski, 2/11, klarigis pli pri la senfina laboro

de la sciencistoj, kies esplorado de la natura mondo etendiĝis ĉiam pli kaj pli foren, malkovris ĉiam pli kaj pli malgrandajn (est)-aĵojn kaj postulas ĉiam pli kaj pli bonajn aparatojn; sed ankoraŭ ne konas linojn.

Je 23/11 Henry Rosengren rakontis pri sia fina liberigo kiel militkaptito post la alveno de la rusa kaj amerika armeoj.

Ce la amuz-vespero de la 30/11 ni havis la plezuron bonvenigi inter ni S-inon J. S. Douma el Deventer, Nederlando. Ŝi rakontis pri la Esperanto-agado en la hejmurbo kaj pri vizitoj al Esperanto-Kongresoj en E-ropo. La parolanto por la vespero estis S-ro Ken Linton, kiu montris diapositivon kaj rakontis pri sia vizito en la ĉirkaŭaĵo de Washington, Usono. —F.K.

BONA INFORMO

La 1982-a abonvarba kampanjo de "EL POPOLA CINIO" jam komenciĝis. Ekde 1-a de nov. 1981 ĝis 28-a de feb. 1982 vi povos profiti 20%-an rabaton el la abontarifoj.

Ne perdu la ŝancon kaj abonu kaj varbe abonigu parencojn kaj amikojn. Se vi unufoje sukcesis varbi 4 abonantojn vi ricevos "Libro-kuponon" kiel donacon. La kupono valoras US \$5.00. **Abontarifoj:** 1 jaro \$5.70, rabatigita prezo \$4.60; 2 jaroj \$9.60, rabatigita prezo \$7.68; 3 jaroj \$14.40, rabatigita prezo \$11.52.

Abonu ĉe K. G. Linton, 4/2 Lyons St., Glenhuntly, Vic. 3163.

TUTMONDA ESPERANTISTA ADRESARO

Unika konsultlibro. 220 paĝoj, 2700 adreso el 60 landoj Havebla de la honorofica aŭstralia reprezentanto H. Koppel, 41 Byfield St. Reservoir, 3073. Prezo \$2.75, plus \$0.55 por afranko.

STOP PRESS

Due to the current Mail Drivers Strike, several Club Reports did not reach the Editor in time.

Also, last-minute Congress News and further donations to the Scholarship Fund could not be included in this issue.

WHO'S WHO IN AUSTRALIAN ESPERANTO

15 — BETTY CLEMINSON

"At Home in the Exotic East".

Circumstance, and, of course, her late husband, took Betty to the Orient where she lived for several years. Life was at times spiced not only by well known aromatic spices, but by acute dangers arising from tangled political situations and military coups, e.g. on one occasion she and her husband were driving innocently along a "quiet" country road in Thailand, and found themselves not only halted but surrounded by armed troops. She knew that things weren't exactly settled in that area; there had been several "unofficial" murders. Her husband had seen some but had been officially warned, "You only **thought** you saw killings: there were none: don't spread rumours". However, Betty was surprised to learn that they — foreigners — should be molested. Two soldiers sat behind them in the car. "No argument! Just wait." After several hours, an officer came along. "You should have more sense than to come here. This is a prohibited area. Go home quickly."

All this was a far cry from the peaceful village near the Norfolk Broads where Betty was born. She spent her childhood on a typical English farm — crops, an orchard, a river to swim in. A happy, nature-loving time!

Betty's father, who did not run the farm but worked in the city of Norwich, was transferred to Australia. The transfer was for "1-2 years" but the family (including Betty) stayed on (Though for Betty, there was that Oriental interlude.)

Many years later, Betty heard — for the second time, because her mother was an interested person with an active mind and had mentioned it — about Esperanto. The source of information? "The Manly Daily" per medium of an article by Marjorie Duncan. Marjorie was contacted and Betty has been involved in Esperanto affairs ever since.

She has been, for many years, Secretary of the Manly Club of which she is a foundation member. For several years she was President, and still is a keen member of the Board of Management of the N.S.W. Esperanto Federation. She has taught Evening College

classes, and currently guides two day classes at the School for Seniors.

She has travelled a lot and has used Esperanto extensively, has met "many wonderful people and made friends in many lands". It has been her thrill to attend four Universal Congresses — so far.

Betty was always fond of literature and art — especially that pertaining to the Orient. During her stay in Thailand and especially in Indonesia, she busied herself with the local culture. Among other things, she learned Chinese painting from a famous traditional artist. She is now quite adept at painting in the Chinese style. From time to time Betty leads art-oriented (no pun intended) excursions to Bali.

Though Betty finds Esperanto absorbing, it has not soaked up all her time and interest. She has learned Braille, and, as well as transcribing books for the blind at Schools and Universities in Malaysia, she has corresponded for years with blind groups in Germany and Holland. (In Esperanto, of course). This has been love's labour gained, for Betty appreciates the time to do not just what she ought to do, but what she wants to do. What a happy circumstance that, so often, what she wants to do has been what she should do!

An association with Child Welfare has afforded a happy combination of joy and duty. Betty has cared for many small children whilst the courts decided their future. This association began almost by chance, for Betty had heard an appeal for people to care for children from orphanages during the long Christmas holidays. With trepidation, she accepted two boys twelve and thirteen respectively, and then found she was "mother" to two more, because their prospective "fosters" couldn't take them. A daunting prospect, but it turned out to be a wonderful time.

In fact, looking back, Betty feels that — all things considered, she has had a wonderful life, and Esperanto has helped to make and keep it wonderful. — Arthur Cocking.